



Amikeco kaj Unuiĝo

V 19034 / 1972



EL POPOLA ĈINIO

人民中國報

1
1972



亚非乒乓球友好邀请赛

Afro-Asian table tennis friendship invitational tournament

Tournoi amical Afre-Asiatique de tennis de table sur invitation

مباريات الدعوة الودية لكرة الطاولة لآسيا و إفريقيا


アジア・アフリカ卓球友好招待試合

Tablotenisa Turniro de Azio kaj Afriko Plena de Amikeco




Koreaj kaj ĉinaj sportistoj man-en-mane eniras la konkursejon, kio manifestis la profundan batalan amikecon inter la popoloj kaj sportistoj de Koreio kaj Ĉinio.

◀ Varma bonvenigo al la amikoj el la aziaj kaj afrikaj landoj venintaj por partopreni la Tablotenisan Amikecan Invitan Turniron de Azio kaj Afriko (afiŝo)



Panoramo de la konkursejo de la Tablotenisa Amikeca Invita Turniro de Azio kaj Afriko





La Vjetnama Tablotenisa Delegacio gajnis bonan rezulton en la teama konkurso.

Sportistoj de Laoso (la Laosa Patriota Fronto) interbabilas kun gambiaj sportistoj.





Geamikoj el la Hinda Tablotenisa Delegacio vizitas iun fabrikon de Pekino.



Birmaj kaj nepalaj tablotenisistinoj intime interparolas en la konkursejo.

Koreaj, gvineaj kaj ĉinaj sportistinoj amike interbabilas.





Geamikoj el la delegacioj de la ĉilia kaj kolombia tablotenisaj federacioj, kiuj venis laŭ invito al Pekino por rigardi la Tablotenisan Amikecan Turniron de Azio kaj Afriko, promenas sur la Granda Muro.

Geamikoj el Singaporo pririgardas historian restaĵon elterigitan en la Granda Proletara Kultura Revolucio de Ĉinio — orfadenan jadveston.





Amikoj el Togolando aŭskultas lecion dum sia vizito al Kinghua-universitato de Pekino.

Sportistinoj el la Ekvatora Gvineo vizitas la Trian Kotonan Ŝpinejon de Pekino.





Senegalaj sportistoj kun
ĉinaj infanoj

Dahomeaj kaj alilandaj
amikoj kun siaj ĉinaj
geamikoj en amuza kun-
veno.



Plena Sukceso de la Tablotenisa Amikeca Invita Turniro de Azio kaj Afriko


DE la 2-a ĝis la 14-a de novembro 1971, okazis solene en Pekino la Tablotenisa Amikeca Invita Turniro de Azio kaj Afriko. Tiu ĉi amikeca invita turniro estis kune iniciatita de la tablotenisaj asocioj de la Demokratia Popola Respubliko de Koreio, Egiptio, Japanio, Maŭricio, Nepalo kaj Ĉinio. La iniciataj landoj komisiis al Ĉinio la preparadon de tiu ĉi invita turniro. Tio estis konfido kaj kuraĝigo de la popoloj kaj sportistoj de la aziaj kaj afrikaj landoj al Ĉinio. La ŝtatestro de Kamboĝo Samdek Norodom Sihanuk kaj lia edzino, Ĉefministro Penn Nouth kaj lia edzino, gvidantoj de nia Partio kaj ŝtato gekamaradoj Ĝoŭ Enlaj, Giang King, Je Gianjing, Ĝang Ĉunkiaŭ, Jaŭ Venjuan, Li Hiannian kaj Guo Mojuo rigardis iujn el la maĉoj.

La grandiozan turniron ĉeestis Roy Evans, prezidanto de la Internacia Tablotenisa Federacio, kaj lia edzino; Koji Goto, la unua vicprezidanto de ITF; A. K. Vint, honora ĝenerala sekretario de ITF; Jean Mercier, honora kasisto de ITF, kaj lia edzino; A. A. Heif, vicprezidanto de ITF, aganta prezidanto de la Afrika Tablotenisa Federacio kaj honora prezidanto de Egipta Tablotenisa Asocio; Jaime Munoz Campozano, vicprezidanto

de ITF, prezidanto de Sud-Amerika Tablotenisa Federacio kaj estro de ties delegacio; estroj de delegacioj de tablotenisaj asocioj de iuj latinamerikaj landoj kaj delegacioj de Hongkongo kaj Aŭmen.

La invitan turniron partoprenis pli ol 600 sportistoj kaj amikoj de sportaj rondoj el 51 landoj kaj regionoj de Azio kaj Afriko, nome: Afganio, Alĝerio, la Araba Jemena Respubliko, Birmo, Burundio, Kamboĝo, Kameruno, Cejlono, Dahomeo, la Demokratia Popola Respubliko de Koreio, la Vjetnama Demokratia Respubliko, Egiptio, la Ekvatora Gvineo, Etiopio, Gambio, Ganao, Gvineo, Hindio, Irano, Irako, Japanio, Kenjo, Kuvajto, Laoso (la Laosa Patriota Fronto), Libano, Liberio, Libio, Malajzio, Malio, Maŭritanio, Maŭricio, Maroko, Nepalo, Niĝerio, Pakistano, Palestino, la Popola Demokratia Respubliko de Jemeno, la Popola Respubliko de Kongolando, Senegalio, Siera-Leono, Singaporo, Somalio, Sudano, Sirio, Tanzanio, Togolando, Tunizio, Turkio, Ugando, Zambio kaj Ĉinio.

Tiu ĉi invita turniro ampleksis jenajn dek amikajn konkursojn: vira kaj virina teamaj konkursoj,



Grandioza akcepta kunveno okazigita de la 6 iniciataj landoj de la amikeca invita turniro je la 1-a de novembro


vira kaj virina duopaj konkursoj, konkurso de miksita duopo, vira kaj virina unuopaj konkursoj, knaba kaj knabina unuopaj konkursoj kaj veterana unuopa konkurso. La japana teamo gajnis la ĉampionecojn de vira teama konkurso, vira unuopa konkurso kaj virina duopa konkurso; la korea teamo gajnis la ĉampionecojn de konkurso de miksita duopo, knaba kaj knabina unuopaj konkursoj kaj veterana unuopa konkurso; la ĉina teamo gajnis la ĉampionecojn de virina teama konkurso, vira duopa konkurso kaj virina unuopa konkurso.

La tablotenisistoj kaj amikoj de sportaj rondoj el diversaj landoj vizitis respektive fabrikojn, kamparajn popolajn komunumojn, lernejojn, famajn kaj historiajn lokojn kaj partoprenis plurajn amu-

zajn kunvenojn plenajn de varma amikeco, aranĝitajn en Pekino.

Tiu ĉi Tablotenisa Amikeca Invita Turniro de Azio kaj Afriko estis grandioza kunveno de amikeco kaj unuiĝo.

De longa tempo, la popoloj de la aziaj kaj afrikaj landoj strikte kunlaboras kaj subtenas unu alian en la komuna batalado kontraŭ imperiismo, nova kaj malnova koloniismo, por nacia liberigo kaj defendo de la nacia sendependeco kaj ŝtata suvereneco. La pasinta komuna sorto kaj nunaj samaj taskoj firme kunligis la popolojn de tiuj landoj. Certe pli profundigos plue la amikeco kaj unuiĝo inter la ĉinaj popolo kaj sportistoj kaj tiuj de la aliaj landoj de Azio kaj Afriko!



En inaŭguro

Post la teama konkurso, ĉinaj sportistoj varme gratulas sportistojn de Egiptio, Ganao, Niĝerio pro iliaj bonaj atingoj en la konkurso.



Amikeco Disfloras en la Tablotenisa Sporto de Azio kaj Afriko

BRILIS la suno kaj aŭdiĝis sonoraj kantoj en Pekino je la fino de aŭtuno kaj komenco de vintro de 1971.

Ĝoje kolektiĝis ĉi tie amikoj el diversaj landoj kaj regionoj por partopreni la Tablotenisan Amikecan Invitan Turniron de Azio kaj Afriko kaj ili pasigis kune kun la pekina popolo belajn neforgeseblajn tagojn.


“Ni venis ne nur por tablotenisa ludo, sed ankaŭ

por pliiigi la amikecon inter la popoloj de la landoj de Azio kaj Afriko.”

“Ni lernos unu de alia kaj akcelos la disvolvon de la tablotenisa sporto de Azio kaj Afriko.”

Tio ĉi estas la komuna volo de la tablotenisistoj, venintaj el malsamaj landoj kaj regionoj, kun malsamaj lingvoj, haŭtokoloroj, diferencaj teknikoj kaj stiloj de tablotenisa ludo. Ili faris sian kontribuon por pliiigi la amikecon inter la popoloj kaj sportistoj de la aziaj kaj afrikaj landoj kaj

Sportistinoj de Cejlono kaj Vjetnamio subskribas reciproke.



Sportistoj de la Popola Respubliko de Kongolando kaj Kamboĝo varme salutas spektantaron.



por akceli la disvolvon de la tablotenisa sporto de Azio kaj Afriko.

Kiel en la ekzercejoj, la konkursa halo kaj amuza kunveno tiel ankaŭ dum vizitado al fabrikoj, popolaj komunumoj, lernejoj kaj vidindaĵoj, ĉie oni povis vidi ke sportistoj kore interparolas en amikeco kaj interŝanĝas sperton en tablotenisa ludo.

Alte tenante la flagon de la laosa teamo, somaliaj sportistoj gratulas laosajn amikojn pro ilia bona atingo en la vira teama maĉo.



LERNI UNU DE ALIA POR PROGRESI KUNE

Dum la amikeca turniro, la tablotenisaj sportistoj ofte kune ekzercis sin kaj interŝanĝis sperton por altigi sian arton de tablotenisa ludo kaj pliigi la amikecon.

Iutage, kuna ekzercado de vjetnamaj sportistoj kun laosaj kaj kamboĝaj sportistoj profunde impresis la ĉeestantojn. Ĉe la ludotablo, ili lernigis unu al alia vipe frapi kaj startigi per lerta frapo kaj intime kuraĝigis unu alian. Dum kuna ekzercado, vjetnama sportisto Nguyen Ngoc Phan donadis al la kamboĝa sportisto Ung Panharith oportunajn kazojn, por ke la lasta sin ekzercu pri malsuprenfrapado. Ung Panharith sinsekve faris sukcesajn frapojn kun ĉiam pli granda forto. Kvankam la junaj tablotenisaj sportistoj de Laoso (la Laosa Patriota Fronto) tre malofte sin ekzercis en la streĉa batala vivo, tamen post diligenta ekzercado antaŭ la konkurso, ili multe progresis en tablotenisa ludo. La vjetnamaj kaj kamboĝaj sportistoj ĝojis pro ilia progreso kaj diris, ke ili lernos de la revolucia spirito de la laosaj kunbatalantoj, kiuj ne timas malfacilojn kaj diligente sin ekzercas.

Spite al laciĝo post longa vojaĝo, la sportistoj de Gvineo, Kongolando (B), Maroko, Ganao, Kenjo, Siera-Leono kaj multaj aliaj afrikaj landoj komencis sin ekzerci kune kun ĉinaj, japanaj kaj alilandaj sportistoj, tuj post sia alveno al Pekino.

Foje, japana tablotenisa trejnisto Ŝigeo Ito sin ekzercis kune kun niĝeria sportisto Wilson. Ŝigeo Ito rimarkis, ke Wilson ne povas lerte malsuprenfrapi. Li do ĉesigis la ludadon kaj klarigis al li gestante per la frapilo, kiel fari bonan malsupren-



Sportistoj de Japanio kaj Ĉinio mano-en-mano iras en la konkursejon por la vira teama maĉo.

frapon kaj kiel fari suprenturnan frapon. La lasta diris ĝoje, ke tio, ke trejnisto de unu lando sin ekzercas kun kaj instruas sperton al sportisto de alia lando, estas konkreta manifestiĝo de amikeco.

BONA MORALO

En maĉo inter la ĉina kaj korea teamoj la korea sportisto Pak Sin Il ludis kun la ĉina sportisto Liang Geliang. Pak Sin Il estas fama korea sportisto de ofensiva tipo, kiu tenas la frapilon en plumtena maniero. En ludado, li frapadis kuraĝe, forte kaj decideme. Kiam iliaj poentoj atingis 18:18, Pak Sin Il faris fortan frapon de dekstre kaj la pilko frapis la dekstran angulon de la tablo ĉe la flanko de Liang Geliang kaj flugis foren. Liang rapidis malantaŭen por frapi la pilkon, sed li falis pro la impeta movo. Pak Sin Il tuj kuris al li por helpi lin leviĝi. Liang Geliang salte leviĝis kaj balancis sian kapon al la alkuranta kunbatalanto por esprimi sian dankon.

Pak Sin Il revenis al sia flanko de la tablo. La juĝisto faris mangeston kaj deklaris daŭrigon de la maĉo. Sed Pak Sin Il tenis en sia mano la pilkon kaj ne tuj komencis la ludon. Li mansvingis al la juĝisto kaj montris al la planko ĉe la flanko de Liang Geliang. Tiam la juĝisto komprenis,

ke Pak Sin Il timas, ke tie la tre glitiga planko minacas la sekurecon de la kunbatalanto. La konduto de Pak Sin Il profunde kortuŝis la ĉinajn sportistojn kaj la spektantaron kaj tuj eksplodis en la halo tondra aplaŭdo.

NOVA MORO EN KONKURSO

Iun posttagmezon, iris konkurso inter la virinaj tablotenisaj teamoj de Dahomeo kaj Sudano. Ĝi estis amika konkurso rompinta la rutinon de internacia sporta konkurso.

Laŭ la difinita tagordo, tiu konkurso devus iri vespere de la antaŭa tago. Sed bedaŭrinde, unu el la dahomeaj sportistinoj A. Mensah malsaniĝis kaj ne povis partopreni la konkurson. Laŭ internacia konkursa rutino, se oni ne povas partopreni la konkurson je la fiksita tempo, tion oni konsideras kiel rezignon de konkursa rajto.

Sed la estro de la Sudana Tablotenisa Delegacio M. A. Abubakr diris: "Plej grava estas la amikeco. Dahomea amikino malsaniĝis, ni do devas atendi ĝis ŝia resaniĝo por la konkurso." Kaj li speciale iris kun kelkaj teamanoj al la loĝejo de la dahomea sportistino A. Mensah por ŝin vidi. Kiam la konkursa komitato de la amikeca invita turniro sciigis al la Dahomea Tablotenisa

Alĝeriaj kaj ĉinaj sportistoj en interparolo



Delegacio la proponon de la Sudana Tablotenisa Delegacio pri prokrasto de la konkurso, la sportistoj de Dahomeo tre kortuŝiĝis kaj unuvoĉe laŭdis la noblan moralon de la sudanaj sportistoj.

Kvankam A. Mensah ankoraŭ ne tute resaniĝis en tiu posttagmezo, ŝi tamen partoprenis la konkurson kaj eĉ ludis tre energie. Ŝi diris: Kvankam hodiaŭ mi ankoraŭ ne tute resaniĝis, tamen miaj fortoj revenas al mi, kiam mi pensas pri la zorgo de la sudanaj fratinoj pri mi kaj pri mia devo plifirmigi la amikecon inter ni. Kvankam ni perdis la ludon, tamen ni gajnis amikecon.

KANTI POR AMIKECO


La 8-an de novembro estis ripoza tago de la Tablotenisa Amikeca Invita Turniro de Azio kaj Afriko. Tiutage, aziaj kaj afrikaj amikoj partoprenis amuzan kunvenon en la parko Somera Palaco en antaŭurbo de Pekino. Artistoj kaj amatoraj artaj trupoj de laboristoj, kamparanoj, soldatoj kaj studentoj de nia ĉefurbo prezentis diversajn programerojn por la aziaj kaj afrikaj amikoj. La prezentadon faris ankaŭ multaj aziaj kaj afrikaj amikoj.

Kiam koreaj amikoj venis al placo de la parko, ili kantis kune kun ĉinaj amikoj la korean kanton «Kanto al Generalo Kim Il Sen» kaj la ĉinan kanton «Ruĝas la Oriento» en la ĉina lingvo.

Ĉe alia loko, amikoj el Vjetnamio, Kamboĝo kaj Laoso venintaj de la kontraŭsona fronto kaj amikoj el Maroko, Sudano, Kameruno, Libio


kaj aliaj landoj prezentis programerojn je varma invitado de la ĉeestantoj. La vjetnamaj amikoj kantis la vjetnamajn kantojn «Liberigi la Sudon» kaj «Vjetnamio — Ĉinio» kaj kantis kune kun la ĉeestantoj la ĉinan kanton «Unuiĝo Estas Forto» en la ĉina lingvo. Kamboĝaj amikoj kantis la kamboĝan kanton «La Revolucia Flago» kaj poste kantis en la khmera kaj ĉina lingvoj la kanton verkitan de Samdek Norodom Sihanuk «Sopiro

Sceno el fina maĉo de vira kaj virina teamoj





*Sportistoj de Kenjo, Ugando kaj Sudano
interŝanĝas sperton en la konkursejo.*





Afgana sportisto (la maldekstr

Meksikaj amikoj vizitas la Muzeon de Malnova Palaco.



Malia kaj ĉinaj sportis





en maĉo

interŝanĝas teknikon.



Laboristino de Fabriko de Agrikulturaj Maŝinoj de la popola komunumo Ruĝa Stelo konigis amikojn de Ekvadoro kaj Urugvajo pri funkciado de rizplantilo.

Sportistoj de Kameruno kaj la Popola Demokratia Respubliko de Jemeno salutas spektantojn antaŭ la maĉo.





Varme manpremas sportistoj kaj trejnistoj de Nepalo kaj Libano post la maĉo.

al Ĉinio». La amikoj el Laoso invitis vjetnamajn, kamboĝajn kaj ĉinajn amikojn por kune kanti «Batala Kanto de Kontraŭaeratakaj Soldatoj». La batalantoj el la tri landoj de Hindoĉinio kantis kaj dancis kune kun siaj ĉinaj kunbatalantoj sur la scenejo. Ankaŭ afrikaj amikoj ascendis la scenejon unu post alia por partopreni la dancadon. Tiam tondra aplaŭdo de la rigardantoj intermiksiĝis kun la kanto sur la scenejo. Poste, amikoj el Maroko, Sudano, Libio, Kameruno kaj Tunizio prezentis unuj post aliaj naciajn kantojn kaj dancojn.

En la amuza kunveno en la parko, ankaŭ amikoj el Gvineo, Cejlono, Singaporo, Birmo, Hindio, Palestino, Libano, la Araba Jemena Respubliko, la Popola Demokratia Respubliko de Jemeno. Egiptio kaj Tanzanio faris prezentojn, je kies finiĝo senombraj bukadoj estis enmanigitaj al la aziaj kaj afrikaj amikoj kaj aŭdiĝis varma aplaŭdado.

GASTI ĈE FABRIKOJ KAJ POPOLAJ KOMUNUMOJ

Dum la tagoj kiam streĉe iris la amikeca invita turniro, parto de la amikoj de aziaj kaj afrikaj landoj vizitis pekinajn fabrikojn kaj popolkomunumojn kun profunda amikeco al la pekina popolo.

La Pekina Fabriko de Lanaj Litkovriloj varme akceptis amikojn el Egiptio, Irako, Kenjo, Kuvajto kaj Maŭritanio. La kenjaj amikoj interesiĝis pri speco de mola lana litkovrilo en brilaj koloroj produktita de tiu fabriko. Kun ĝojo ili informiĝis, ke la produktaĵoj de tiu fabriko estas eksportitaj al multaj aziaj kaj afrikaj landoj. La maŭritaniaj amikoj pririgardis atenteme kaj serioze. Ili diris, ke brutobredado okupas tre gravan lokon en Maŭritanio, tial ili tre interesiĝis pri la fabriko. Kaj ili esprimis sian esperon, ke la maŭritania kaj ĉina popoloj ofte interŝanĝos sperton kaj lernos unu de alia.

Amikoj el Hindio, Libio, Maŭritanio, Turkio, Malio kaj Ugando vizitis la Trian Kotonan Ŝpinejon de Pekino kunportante la bonan volon de plifirmigo de la amikeco inter la aziaj kaj afrikaj popoloj al la ŝpina kaj teksta laborejoj kun gaja bruado de maŝinoj kaj ricevis varman bonvenigon de la laboristoj.

La Palestina Tablotenisa Delegacio vizitis la Popolan Komunumon de Ĉina-Albana Amikeco. Kun bukedoj kaj koloraj rubandoj la kadroj, komunumanoj kaj lernejanoj de la komunumo varme bonvenigis la kunbatalantojn el malproksima regiono.

Tablotenisaj amatoroj de la komunumo lokis ludotablon en korto kaj invitis palestinajn amikojn kune ludi por lerni de ili. La brila tablotenisa arto de la gastoj vekis de tempo al tempo varmajn aplaŭdojn ĉe la rigardantoj. Post la ludado, la palestinaj amikoj kune kantis la palestinan kanton «Mia Patrolando». Tiu kanto plene montris la firman volon de la palestina popolo oponi kontraŭ la uson-izraelaj agresantoj kaj ilian firman decidon liberigi la patrolandon kaj reveni al sia hejmloko.

Parto de la amikoj de la tablotenisaj delegacioj de Nepalo, Pakistano kaj Kuvajto vizitis la Popolan Komunumon de Ŝuangkiaŭ. Komunumanoj tuj rapidis renkonte al la gastoj je halto de iliaj aŭtoj kriante: “Bonvenon! bonvenon!” Ili varme kon-

dukis la fremdlandajn amikojn al siaj hejmoj. Onklino Ĝang Ĵonghian varme akceptis la amikojn el Kuvajto en sian domon, kompleze prezentis teon al ili kaj komencis senĝene interbabiladi kun ili. Sunradioj penetris en la ĉambron tra la puraj fenestro-vitroj kaj pliintensigis la varman etoson en ĝi. Kiam onklino Ĝang rakontis pri la vivo de sia familio, la gastoj deziris al ŝi feliĉan vivon. Poste, la honorindaj gastoj vizitis la farun-muelejon, ĉeval-bredejon kaj aliajn entreprenojn de la komunumo. La fremdlandaj amikoj montris sian amikecon al komunumanoj ĉie kien ili alvenis.

Sur la revena vojo, iu pakistana amiko diris ĝoje: “Mi skribos artikolon kun jena komenco: ‘Jam komenciĝis vintro, tamen Pekino dronas en varma amikeco kaj impresas nin per etoso de printempo.’”


EKSKURSO AL LA GRANDA MURO

En la ripozaj tagoj post la fino de la konkurso de viraj kaj virinaj teamoj, ĉirkaŭ 30 amikoj de aziaj kaj afrikaj landoj ekskursis al la Granda Muro.

En tiuj tagoj estis serena vetero kaj kolektiĝis ĝojaj amasoj sur la Granda Muro. Suririnte la portikon sur la murego, oni vidis grandiozan pejzaĝon en fruvontra sunbrilo kun la murego serpentumanta jen supren jen malsupren trans montoj.



Zambijaj sportistoj kaj ĉinaj sportistinoj kaj trejnisto varme interbabilas en la konkursejo.




Sportistoj de la Araba Jemena Respubliko kaj Tunizio varme manpremas post la maĉo.



Amikoj de Malajzio en la amuza kunveno de la Somera Palaco.

Maŭritaniaj amikoj vizitas la Trian Pekinan Kotonan Spinejon.





Amikoj de Kuvajto kaj Irako vizitas la Muzeon de Malnova Palaco.



Respondeculo de la organiza komitato de la invita turniro bonvenigas turkan amikon je lia alveno al Pekino.

Multaj amikoj estis absorbitaj de la grandioza antikva konstruaĵo. Ili gaje babilis kaj demandis pri anekdotoj pri la murego, kaj kune fotigis sin kun plezuro.

Multaj aziaj kaj afrikaj amikoj unuafoje ekskursantaj al la Granda Muro montris apartan ekscitiĝon. Ascendinte la plej altan lokon de la murego, iu maŭritania amiko tuj faris fotojn kaj alia el ili diris: Vidante la grandiozan konstruaĵon, mi vere admiras la saĝon de la laboranta popolo.

Aparte viglaj estis la amikoj el Pakistano, Maroko, Ugando, la Araba Jemena Respubliko, la Popola Demokratia Respubliko de Jemeno kaj Zambio dum la ekskurso. Iuj el ili kantis kaj dancis dum ripozo kaj iuj eĉ ĝoje dancis afrikan popolan dancon man-en-mane sur la murego. Post dancado Hussein Yafee, estro de la Tablotenisaj Delegacio de la Popola Demokratia Respubliko de Jemeno, kaj aliaj aziaj kaj afrikaj amikoj diris emocie: "Neforgesebla por ni estas la amikeca invita turniro. Nun ni havas neniun alian manieron krom dancado por esprimi la amikecon inter ni kaj la aziaj kaj afrikaj amikoj."

ARBOJ DE AMIKECO

Antaŭtagmeze de la 14-a de novembro, 1971, kortuŝa sceno aperis en la korto norde de la Ĉefurba


Sporta Halo post la fino de la konkurso. Aziaj kaj afrikaj amikoj en diversaj kostumoj ĝoje kolektiĝis, kune fosis kavojn kaj plantis 6 pinarbojn. Ili estas arboj de amikeco kune plantitaj de la estroj de la tablotenisaj delegacioj el diversaj aziaj kaj afrikaj landoj laŭ la propono elmetita de la estro de la Japana Tablotenisaj Delegacio Koji Goto en la nomo de la iniciataj landoj por memorigi la plenan sukceson de la amikeca invita turniro.

Iu kriis: "Ni kune fotigu nin por memoro!" Je tiu propono la aziaj kaj afrikaj amikoj tuj ĝoje kolektiĝis por ke la ĵurnalistoj prenu foton simbolantan la amikecon inter la aziaj kaj afrikaj sportistoj. La estro de la Ĉina Tablotenisaj Delegacio Ju Buhjue diris: "Ni ĉina popolo kaj ĉinaj sportistoj certe zorge flegados ĉi tiujn pinarbojn por ke ili profunde enradikiĝu kaj kresku prospere." Li proponis nomi la ses pinarbojn propramane plantitajn de la aziaj kaj afrikaj amikoj "arbojn de unuiĝo kaj amikeco de la aziaj kaj afrikaj popoloj". Tiam eksplodis varma manklakado en la korto.

Longe vivu la amikeco inter la aziaj kaj afrikaj popoloj kiel pinarboj! Tio estas la deziro de la estroj de la tablotenisaj delegacioj de diversaj landoj en plantado de la arboj de amikeco kaj tio estas ankaŭ la komuna kora deziro de la centoj da sportistoj el diversaj landoj de Azio kaj Afriko.



Sportistoj de Liberio kaj Singaporo varme manpremas en la konkursejo.



Venki la Flavan Riveron

HUANG KJUN*

LA Flava Rivero estas la dua granda rivero de nia lando. Ĝi fontas en Bajan-kara-montaro kaj serpentas tra Kinghaj, Gansu, la aŭtonomaj regionoj de Ninghia kaj la Interna Mongolio, Ŝenhi, Ŝanhi, Henan kaj Ŝandong, kaj fine fluas orienten en Bohaj-maron. Ĝia totala longo estas 4,845 kilometroj kaj la areo de ĝia baseno estas 745,000 kvadrataj kilometroj.

En la longa pasinteco la baseno de la Flava Rivero estis la politika kaj ekonomia centro de nia nacio. Ĉe ĝi naskiĝis nia brila kulturo. Hodiaŭ, ĝi okupas gravan pozicion ankaŭ en la socialisma revolucio kaj socialisma konstruado. Ĝia vastega baseno havas 300,000,000 muojn 1 muo = $\frac{1}{15}$ hektaro) da agro kaj 110,000,000 loĝantojn. Ĉiuj ĝiaj branĉoj havas abundan akvan riĉfonton tre valoran por la konstruado de nia socialisma Patrio.

Sed dum la longa regado de diversaj feŭdaj dinastioj kaj kuomintang-aj reakciuloj, la Flava Rivero ne estis reordigita kaj ekspluatita, serioze daŭradis grunda erozio kaj okazadis inundegoj. Ĝi portis al la ĉina popolo fatalan suferon kaj famiĝis kiel katastrofa rivero. Iuj reakciaj burĝaj "specialistoj" antaŭdiris, ke la grunda erozio ĉe la Flava Rivero estas "eterna", "neŝanĝebla", kaj ke "en nimalproksima estonteco ankaŭ la Nordĉinia Ebenejo fariĝos dezerto", ktp. ktp, intencante per tiuj diroj kovri la kruelecon kaj sentaŭgecon de la reakcia reganta klaso kaj trompi la popolon.

Sub la gvido de sia gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio de Ĉinio, la ĉina popolo

renversis la tri grandajn montojn — imperiismon, feŭdismon kaj burokratan kapitalismon, fariĝis la mastro de la ŝtato kaj kondukas socialisman revolucion kaj socialisman konstruadon per brava heroismo. Ankaŭ la antikva Flava Rivero radias per pli vigla juneco.

Prezidanto Maŭ tre zorgas pri la reordigo de la Flava Rivero kaj multfoje venis al la rivero por inspekti. En 1952 dum la restariga periodo de nia nacia ekonomio, Prezidanto Maŭ jam faris la alvokon "**Bone faru la aferojn de la Flava Rivero**", kio spegulis la deziron de milionoj kaj dekmilionoj da loĝantoj en la baseno de la Flava Rivero, montris la heroan batalspiriton de nia popolo en nepra venko super la Flava Rivero.

Sub la direktado de la alvoko, ekirante de disvolvigo de agrikulturo, la vastaj amasoj disvolvis la revolucionan spiriton de sinapogo sur propraj fortoj kaj penema luktado kontraŭ malfaciloj, uzis la materiisman dialektikon, faris konadon pri la Flava Rivero kaj reformon al ĝi kaj akiris ĝojindan sukceson. La inundaj danĝeroj ĉe la malsupra parto de la Flava Rivero en la pasintaj 20 jaroj estis venkitaj kaj la danĝeriga stato de oftaj breĉiĝoj de la digoj antaŭ la Liberiĝo estis ŝanĝita. Ĉe la meza kaj supra partoj de la rivero kie serioze eroziĝis, oni faris multe da laboro por haltigi erozion; ĉe la ĉefa fluo de la rivero oni konstruis 5 grandajn akvokonservajn centrojn, ĉe branĉoj oni konstruis grandajn, mezgrandajn kaj malgrandajn akvokonservojn. La hidroelektrejoj kreskis el nulo kaj liveris movforton al industrio kaj agrikulturo. La areo

de irigaciata agro atingis pli ol 44,000,000 muojn, kio egalas al 3.7 obloj de tiu antaŭ la Liberiĝo. En 1970, la produktokvantoj de greno kaj kotono de la tuta baseno kreskis respektive je 79% kaj 137% kompare kun tiuj de 1949. Tiuj sukcesoj estas granda venko de nia popolo en plenumo de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ. La granda venko ĝisfunde frakasis la galimatiojn de la reakciaj burĝaj "specialistoj" kaj pruvis ke la ĉina popolo havas la kapablon venki la Flavan Riveron.



La reordigo de la Flava Rivero ne iris glate. Ĝin senĉese malhelpis la kontraŭrevolucia reviziisma linio de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj lia bando. La fokuso de batalo inter la du linioj ĉiam estas ĉu komandi per politiko aŭ per profesia laboro, ĉu sin apogi sur la amasoj aŭ sur "specialistoj". Sub la gvido de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, la vastaj amasoj faris firman batalon kontraŭ la kontraŭrevolucia reviziisma linio de Liu Ŝaŭki kaj garantiis al la jungado de la Flava Rivero iradon sur ĝusta vojo.

VENKI DILUVON

La malutilo de la Flava Rivero en la historio prezentiĝis precipe en okazo de diluvo ĉe la malsu-

pra parto. Granda kvanto da kunportata leŭso senĉese altigis la riverujon ĉe ĝia malsupra parto, tial la rivero fariĝis "supertera", la akvonivelo ĝenerale estas je 3-4 metroj pli alta ol la tero kaj en iuj lokoj je 10 metroj. La potenca ŝvela torento estis barata nur de la digoj ambaŭborde. La reakciaj regantaj klasoj de diversaj dinastioj tute ne zorgis la sekurecon de popolo, tiel ke kadukiĝis kaj breĉiĝis la digoj. Je forta ŝveliĝo de la fluo, superakvego inundis multe da tero. Laŭ statistiko en pli ol 2,000 jaroj antaŭ la Liberiĝo, okazis pli ol 1,500 digobreĉiĝoj kaj inundoj ĉe la malsupra parto kaj la rivero alivojiĝis 26 fojojn. La inundo atingis norde Tiangin, sude Huaj-riveron kaj kovris 250,000 kvadratajn kilometrojn da tero, serioze minacis la sekurecon de la vivo de la centmiliono popolo en la basenoj de la riveroj Hajhe kaj Huajhe. Ĉiu fojo de breĉiĝo aŭ alivojiĝo kaŭzis tragikan damaĝon al la popolanoj kaj iliaj posedaĵoj. Ekzemple, en 1933, la digo de la Flava Rivero breĉiĝis kaj la akvo inundis 67 guberniojn de la provincoj Hebej, Ŝandong kaj Henan kun totala areo de 12,000 kvadrataj kilometroj; 3,640,000 homoj suferis de la diluvo kaj 18,000 homoj mortis de ĝi. La damnindaj reakcioj ofte uzis la Flavan Riveron kiel instrumenton por masakri la popolon kaj protekti sian reakcian re-

Konduki akvon de la Flava Rivero por irigacii kampojn



gadon intence farante breĉojn sur la digoj. En 1938, Kuomintang de Ĉiang Kajŝek aplikis nerezistan politikon antaŭ la agreso de la japana imperismo kaj brute breĉis la digon de la Flava Rivero ĉe Huajuankou proksime de la urbo Ĝengĝou por ŝirmi sin en forkuro, tiel ke la rivero alivojiĝis suden, inundis 44 guberniojn de orienta Henan, norda Anhuj kaj norda Giangsu kun totala areo de 54,000 kvadrataj kilometroj, 12,500,000 homoj estis damaĝitaj de la katastrofo kaj 890,000 homoj mortis. Tie fariĝis vastega senhoma dezerto.

Post la Liberiĝo de la tuta lando, sub la gvido de la Partio, oni faris grandan riparon al digo por preventi inundon ĉe la malsupra parto de la rivero. En la pasintaj pli ol 20 jaroj, la popolo ĉe la malsupra parto riparis kaj firmigis 1,800 kilometrojn da digo, rekonstruis per ŝtonoj ĉiujn digojn antaŭe protektatajn per plektitaj tigoj, plenumis terlaboron de 350,000,000 kubmetroj kaj ŝtonlaboron de 9,000,000 kubmetroj. La digo aperis per tute nova fizionomio kaj fariĝis potenca materia bazo por venko super la Flava Rivero.


La venko super la diluvoj ĉefe dependas de la saĝo kaj forto de milione nombranta popolo ambaŭborde de la rivero. En 1958, okazis tre granda

diluvo ĉe la malsupra parto kaj la akvo multe superis la sekuran nivelon de la digo. Proksime de la urbo Ginan de Ŝandong-provinco, la akvonivelo estis nur je 5 coloj sub la supro de la digo. Sub la gvido de la Partio, du milionoj da loĝantoj kaj armeanoj rapidis al la rivero kaj faris firman decidon: "Se ni estos, ankaŭ la digo restos; kiom la akvonivelo leviĝos, tiom la digo altiĝos." En unu diurno ili konstruis sur la digo 600 kilometrojn da digetoj, per kiuj ili baris la potencan torenton kaj garantiis la sekurecon.

ĈESIGI GRUNDAN EROZION

Ĉe la meza kaj supra partoj de la Flava Rivero estas leŭsa altebenejo plej vasta en la mondo, kun totala areo de 430,000 kvadrataj kilometroj. Tie la grundo estas malkompakta, ondiĝas montetoj kaj interkruĉiĝas ravinoj, tie kreskis malmulte da arboj kaj herboj kaj en pluvego multe da supra argilo estis forportata de pluvakvo. Ĉiujare pluvo forportis de tie 1,600,000,000 tunojn da leŭso en la malsupran parton kiuj havas volumenon de 1,100,000,000 kubmetroj. Se oni konstruus per la leŭso digon altan kaj larĝan je 1 metro, ĝi povus ĉirkaŭi la ekvatoron 27 fojojn. La leŭso ne nur malvastigis la agraron ĉe la supra kaj meza partoj, malgrasigis la

Skiza Mapo de la Flava Rivevo



grundon, seriozigi sekegecon kaj malbonigi agrikulturon, sed ankaŭ senĉese altigis la riverujon de la malsupra parto kaj kaŭzis gravan inundon. Tial, konservi akvon kaj teron estas ŝlosilo por transformi la malriĉecon kaj postiĝintecon de la lokoj kaj estas la bazo por ĝisfunde jungi la Flavan Riveron.

Post la Liberiĝo, observante la instrukcion de Prezidanto Maŭ “**nepre doni atenton al konservado de akvo kaj tero**”, la vasta laboranta popolo firme apogis sin sur la forto de kolektiva ekonomio, aplikis inĝenieradon kaj verdigon en kombino. Ili koncentre, kontinue, longtempe ordigis montojn kaj valojn unun post alia kaj en tio akiris sukcesan sperton: krei ŝtuparajn kampojn sur montodeklivoj, bari leŭson en valoj per digoj, transformi kampojn sur riverbordejo per inundakvo kaj planti arbojn kaj herbojn sur krutaj kalvaj montoj. Kie tia sperto estis aplikita, tie grunda erozio estis ĉesigita. Tio ne nur akcelis agrikulturon, sed ankaŭ faris kontribuon en reordigo de la Flava Rivero. Nun sur la vasta leŭsa altebenejo aperis multaj progresaj unuoj kiuj aliformis kalvajn montojn kaj malutilajn riverojn.


Kjuju-brigado de Ŝanhi-provinco estas unu el la progresaj unuoj. Ĝi situas fronte al la Flava Rivero kaj dorse al montetoj. Ĝiaj ĉ. 20,000 muoj

da agro dise lokiĝas sur tri montkrestoj, en 12 valoj, sur unu riverbordejo kaj pli ol 10 montetoj. La grunda erozio estis tre serioza. Antaŭ la Liberiĝo, en pluvo tie okazis inundo kaj sen pluvo sekegeco, tial preskaŭ ĉiujare estis natura katastrofo. En 1952, la tieaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj organizis sin en elementan kooperativon kaj komencis la konservadon de akvo kaj tero. Post longtempa penema luktado, ili konstruis en la 12 valoj 370 digojn el tero kaj ŝtono, kreis pli ol 1,500 muojn da ŝtuparaj kampoj** sur la montoj, plantis pli ol 10,000 muojn da diversaj arboj kaj kulturis pli ol 2,200 muojn da herbo por bredado de brutoj. Laŭborde ili konstruis digoprotektan forstumazon longan je 5 kilometroj kaj larĝan je 20 metroj kaj konstruis pumpstacion. Nun la brigado kaŝas sin en verda ombraĵo kaj multe progresis ĝia agrikulturo, forstumado, brutobredado kaj flankokupo. La pomua produktokvanto de greno kreskis de 20-30 kilogramoj antaŭ la Liberiĝo ĝis pli ol 260 kilogramoj. Tiu de sorgo atingis 995 kilogramojn. Por ĉiam forpasis la stato de grunda erozio, ofteco de katastrofoj kaj malgrandeco de produktokvanto.

TURNI MALUTILON EN UTILON

Antaŭ la Liberiĝo, cirkuladis la diro: La Flava Rivero ĉie donas katastrofon krom en la Kurbiĝo.

Kontraŭinunda digo ĉe malsupra parto de la Flava Rivero



En miloj da jaroj, la akvo de la Flava Rivero estis uzata en irigacio nur en la Ebenejo de la Kurbiĝo situanta en la aŭtonomaj regionoj de Ninghia kaj la Interna Mongolio. Ĉe la malsupra parto ĝi alportis nur katastrofojn al la popolo.

Post la Liberiĝo de la tuta lando, samtempe kun akiro de venko en inundprevento kaj konservo de akvo kaj tero, la vastaj popolamasoj energie disvolvis irigaciadon per akvo de la Flava Rivero kaj hidroelektran aferon. Nun la fluo de la Flava Rivero ne nur irigacias la pli ol 40,000,000 muojn da kampo ĉe la rivero, sed ankaŭ liveris elektran energion al la industrio kaj agrikulturo. Por serĉi metodon de utiligo de akva riĉfonto de la malsupra parto de la Flava Rivero, en 1951 oni konstruis, en regiono de Hinhiang de Henan-provinco, Kanalon de Popola Venko — la unuan grandan irigacian konstruaĵon per akvo de la Flava Rivero. La kanalo iras tra la ebenejo de 5 gubernioj kaj 1 urbo norde de la rivero. Tie estis la antaŭa fluejo de la Flava Rivero kiu ofte suferis de sekegeco, akvostagneco kaj alkalo, kaj la agrikulturo estis tre postĝinta. En 1952, kiam la Kanalo de Popola Venko ĵus estis konstruita kaj ekuzita, Prezidanto Maŭ venis inspekti kaj faris gravan instrukcion, kio donis gigantan kuraĝigon al la popolo de la regiono. En la



Altaj arboj de Kjuju-brigado

Riĉrikolto de rizo akirita de la Huajuankoŭ-a Popola Komunumo



pasintaj 20 jaroj, la vastaj amasoj de laborantaj popolanoj strebis al pli alta normo, peneme luktis kontraŭ malfaciloj, fosis en la regiono kanaletojn por irigaciado kaj drenado kun totala longo de 7,500 kilometroj, konstruis kluzojn, kulvertojn kaj pli ol 2,500 maŝinputojn, per kiuj fundamente efektiviĝis "irigaciado en sekeco kaj drenado de superbe-zona stagna akvo". En la praktiko, ili analizis la malutilan flankon de multeco de leŭso en la akvo de la Flava Rivero kaj ŝtopiĝo kaŭzita de leŭso, kaj trovis la utilan flankon de uzebleco de leŭso en plibonigo de grundo. Ili laŭplane kondukis akvon de la Flava Rivero en dezertajn malaltejojn por precipiti leŭson kaj poste konduki la akvon en kanaletojn por irigacii kampojn. Dank' al tiu aranĝo, ne nur malmultiĝis sedimento en la kanaletoj sed ankaŭ multe da alkala tero estis transformita en bonajn kampojn. Laŭ la projekto, la areo irigaciata de la Kanalo de Popola Venko estis 400,000 muoj, sed nun ĝi estas plivastigita ĝis 600,000 muoj; la meznombra pomua pro-


duktokvanto de greno de la tuta irigacia regiono kreskis de 30-40 kilogramoj antaŭ la Liberiĝo ĝis 235 kg, kaj tiu de kotonu de 10 kilogramoj ĝis 52.5 kg.

La Kanalo de Popola Venko efike akcelis la disvolviĝon de afero de irigaciado per akvo de la malsupra parto de la Flava Rivero. Nun ambaŭborde de la malsupra parto oni jam konstruis pli ol 40 kulvertojn kaj pli ol 100 sifonajn irigaciajn konstruaĵojn, per kiuj oni irigacias pli ol 4,000,000 muojn da kampoj. En utiligo de akvo kaj turno de malutilo en utilon oni akiris novan sperton.


*La aŭtoro laboris pli ol 20 jarojn en reordigo de la Flava Rivero. Li estas inĝeniero de la Akvokonserva Komisiono de la Flava Rivero.

**Ŝtopara kampo — ŝtoparigi deklivojn de montoj kaj krei ebenajn kampojn sur ili. Tiaj kampoj kuŝas tavolon super tavolo kaj povas longe reteni akvon kaj firmigi grundon.

Ŝtoparaj kampoj borde de la Flava Rivero



Ŝanĝiĝo de Ali



Nova urbeto Ŝikjwanhe sur Ali-altebenejo

ĜENG VEN

ALI estas nomo de la okcidenta parto de King-haj-Tibeta Altebenaĵo kun meznombra alteco de pli ol kvin mil metroj super la marnivelo. Ĝi estas altebenaĵo de la nomita altebenaĵo. Tie estas malvarme kaj malsufiĉe je oksigeno kaj de ĉiam rigardata kiel “loko nekulturebla”.

Antaŭ la Liberiĝo, la loĝantoj ricevis grenon el la najbara lando interŝanĝe per siaj ŝafgregoj. Por tio ili devis longe vojaĝi trans montoj kaj riveroj kun siaj ŝafoj kaj pagi pli ol dudek diversajn impostojn. Kaj komercistoj ilin ekspluatis peze. Fine ili povis ricevi nur tre malmulte da greno. Dum la vojaĝo ilin atendis ankaŭ danĝeroj, kaj iafaje la vojaĝantoj perdis sian vivon kune kun la tuta ŝafaro, se ili renkontis grandan neĝoblovon. Post la Liberiĝo, la ŝtato transportas ĉiujare de aliaj lokoj grandajn kvantojn da greno por provizi la tian popolon. Kaj la liberigitaj servutuloj scias bone ke la ŝtato pagis sole por la transportkosto kvaroblon de la prezo de la greno vendata en la loko. Ili decidis solvi la problemon de nutraĵo mem per forto de la kolektivo. Post la demokratia reformo de Tibeto en 1959, la popolo de Ali, kiu antaŭe ĝemis sub la feŭda servuta sistemo de jarmiloj, komencis organizi produktajn interhelpajn grupojn, kaj de la jaro 1967 popolajn komunumojn.

La unua popola komunumo estis fondita de la liberigitaj servutuloj de Ĵegiaŭ-hiango, Ĵitu-gubernio

ĉe Bangong-lago. Ili akiris riĉan rikolton en agrikulturo kaj paŝtado jam en la unua jaro post ĝia fondiĝo. Ilia sukceso kaj sperto rapide altiris la atenton de la tuta regiono kaj leviĝis la alta tajdo de fondado de popolaj komunumoj en Ali. En aŭtuno de 1970 en pli ol cent *hiang*-oj senescepte stariĝis popolaj komunumoj kaj vastaj amasoj de terkulturistoj-paŝtistoj ĝoje akklamis la eniron en socialismon.

Ĉie en Ali liberigitaj servutuloj laŭdis la superecon de popola komunumo. En Menŝi-komunumo, Geer-gubernio ĉe la piedo de Ganggardesi-montaro, kie oni neniam kulturis grenplantojn, la kadroj kaj amasoj fosis kanalon sur montoj por alkonduki akvon kaj solvis la problemon de malvarma akvo, tiel ke ili sukcesis en provado de kulturado de sekalo sur la altebenaĵo 4,500 metrojn super la marnivelo. En 1970 tiu komunumo rikoltis sepdek mil kilogramojn da sekalo sur pli ol 400 muoj da kampoj kaj per tio ili fundamente provizis sin mem.

La tritiko, sekalo kaj pizo kulturitaj en Pulan-gubernio ĉirkaŭ 4,000 metrojn super la marnivelo sur la montaro Himalajoj donis meznombre rikolton de 3,225 kilogramoj po hektaro en du sinsekvaj jaroj. Tio plene elmontris la forton de popola komunumo. Oni fosis tie 21 kanalojn kun totala longeco de 135 kilometroj serpentumantaj sur montoj kaj konstruis 11 malgrandajn akvokonser-



Membroj de la revolucia komitato de Ĵitu-gubernio kore interparolas kun paŝtistoj.

vejojn per kolektivaj saĝo kaj forto, ebligante irigacion al la plejparto de la kampoj de la gubernio. En la lastaj jaroj per la kolektivaj monrimedoj la popolaj komunumoj aĉetis pli ol dudek novajn specojn de feraj agrikulturiloj por anstataŭigi la primitivajn ilojn el ligno aŭ ŝtono uzitajn de miloj da jaroj. Iuj el la popolaj komunumoj komencis uzi eĉ mantraktorojn.

Nun, la plejparto de la popolaj komunumoj, kiuj situas kvar mil ĝis kvin mil metrojn super la marnivelo, sukcesis en kulturado de grenplantoj, kaj 2 trionoj el ili povas plene aŭ duone provizi sin per memproduktita greno. En multaj areoj la paŝtado jam kombiniĝis kun agrikulturo kaj oni jam fiksloĝiĝis anstataŭ migradi. Dank' al tio oni povas pli efike batali kontraŭ naturaj katastrofoj kaj la brutaro duobligis en dek jaroj.

En la malnova socio ne ekzistis eĉ metiejo en Ali. Nun funkcias tie sep malgrandaj elektrejoj, pluraj fabrikoj de agrikulturiloj feraj kaj lignaj, de ledo kaj tapiŝo kaj du malgrandaj karbominejoj.

Nun en Ali ĉiu gubernio havas hospitalon, la plejparto de popolaj komunumoj havas kuracejon kaj nemalmultaj produktaj brigadoj havas proprajn

“nudpiedajn kuracistojn”. Dank' al la disvolviĝo de la kuracaj kaj higienaj laboroj kaj leviĝo de la popola vivo, la kreskado de la loĝantaro pliiĝis je 50% kompare kun tiu antaŭ la Liberiĝo.

Antaŭ la demokratia reformo en Ali ne troviĝis lernejo kaj neniu ido de laborulo ricevis klerigon. Nun funkcias en la areo 151 elementaj lernejoj. Por doni helpon al lernaĝaj geknaboj, kiuj ne povas viziti lernejon pro tro longa vojo, la instruistoj alterne vizitas rajde ĉiujn jurtojn por doni al ili lecionojn. Funkcias ankaŭ multaj vesperaj lernejoj por likvidi analfabetecon. Oni povas ĉie vidi en Ali, ke liberigitaj servutuloj fervore sin klerigas. Sur kampoj kaj paŝtejoj multaj viroj kaj virinoj diligente lernas dum laborpaŭzo. Paŝtistino Jihi perdis sian personan liberecon jam en la aĝo de ok jaroj kaj laboris ĉe brutposedanto por ne paroli pri ebleco de kleriĝo. Post la Liberiĝo ŝi fariĝis laboristino de la Bredejo de Bonrasaj Brutoj de Ĝada. Paŝtante ŝi utiligis ĉiun eblon por lerni el tibetlingva traduko de *Vortoj de Prezidanto Maŭ Zedong*, uzante branĉeton kiel skribilon kaj sablejon kiel paperon. Vespere ŝi vizitis vesperan lernejon por ricevi helpon de la instruistoj. Post klopodado de pli ol unu jaro ŝi jam povas legi kaj skribi kaj ankaŭ libroteni.



Membroj de la Jan-an-a Popola Komunumo de Ali konstruas ŝtuparajn kampojn.

La vasta liberigita servutularo diras, ke nur kun legoscio oni povas bone lerni el verkoj de Prezidanto Maŭ kaj informiĝi pri la gravaj aferoj de la lando. Pengcuo Cijen, kompartiano kaj tibetano, kies familio estis de generacioj sklavoj de la tri mastroj (la reakcia malnova tibeta loka registaro, nobeloj kaj temploj). En sia aĝo de ok jaroj li estis devigita servi kiel sklavoj ĉe iu templo, post kiam liaj gepatroj mortis sub la vipoj de la mastroj. Li paŝtis por la mastroj kaj ofte estis batita ĝis sangado. Post la Liberiĝo li aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio kaj estis elektita kiel sekretario de la partia filio en la produkta brigado. El sia propra travivaĵo li komprenis la veron, ke Prezidanto Maŭ estas la granda savanto de la diversaj naciecoj de la lando kaj lia instruo estas lumturo, montranta vojon al feliĉo por la liberigitaj servutuloj. Li persiste uzas Maŭzedongpenson por eduki la amasojn kaj gvidas ilin sen ia deflankiĝo sur la vojon al socialismo.

Lia pliaĝa frato Ŝigia estas kontisto de la brigado, kiu dediĉas sian tutan koron al la kolektivo, kalkulas plej detale en ĉio por ŝpari elspezojn por la brigado kaj faras siajn laborojn klare kaj korekte. Kaj pro tio li trovas ĉies laŭdojn.

En aŭtuno de 1970, Pengcuo Cijen kune kun sia edzino kaj frato ĉeestis la kongreson de aktivuloj de studo kaj apliko de verkoj de Prezidanto Maŭ en Ali. Kaj Hiakjulong-brigado, en kiu ili laboras, estas honorita kiel ruĝa flago de **“lerno de Daĝaj en agrikulturo”** sur Ali-altebenejo.

Alia juna tibeta kompartiano Kjugia estis servisto de mastro ekde la aĝo de ok jaroj. Post la Liberiĝo de Tibeto, li fariĝis laboristo en iu ŝtata paŝtejo kaj poste estis sendita al Pekino de la popola registaro por ricevi klercon. En 1959 li revenis al Tibeto kaj partoprenis en subpremado de la armita ribelo de la reakcia kliko de la supera tavolo de tibetanoj. Kiel en tiu evento, tiel ankaŭ en la demokratia reformo li laboris tre elstare kaj estis elektita trifoje kiel progresinta laboranto kaj akceptita en la Partion. Li funkciis kiel estro de subgubernia distrikto kaj vic-guberniestro kaj lastatempe estas elektita kiel vicsekretario de la partia komitato de la subprovinca distrikto. Nun en la gvidaj organoj de la niveloj de subprovinca distrikto, gubernio kaj popola komunumo la tibetaj kadroj okupas pli ol 80 elcentojn de la tuta kadraro. Same kiel Kjugia, ili kreskas sub la zorgado de la Partio kaj nutrado de Maŭzedongpenso.

Hoŭhang-brigado

Avangardiĝis

EN regiono katastrofoza kaj malaltprodukta sur la Hjuĝoŭ-Huajbej-a Ebenejo de Giangsu aperis avangarda unuo en lernado de Daĝaj, nome Hoŭhang-brigado de Gangtoŭ-komunumo de Hinji-gubernio, kiun oni laŭde kromnomas Riĉa Produktejo en la Hjuĝoŭ-Huajbej-a Regiono.

Alte tenante la brilan standardon “lernu de Daĝaj en agrikulturo”, la kadroj kaj amasoj de tiu brigado ŝanĝis la antaŭan postiĝintan fizionomion de tiu brigado, sub la gvido de la partia filio. En 1963, la pomua produktokvanto de greno de tiu brigado estis nur kelkdek kilogramoj, dum tiu en 1970 superis 500 kilogramojn.

Hoŭhang-brigado situas en malaltejo apud Luoma-lago en la malsupra baseno de Huajherivero. Ĝi estas triflanke ĉirkaŭata de akvo kaj ofte inundita. Post la Liberiĝo, la tieaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj suriris la vojon de kolektivigo montritan de Prezidanto Maŭ kaj atingis certan disvolviĝon en produkto. Sed pro saboto de Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj, la mizera fizionomio de tiu loko ne estis radikale ŝanĝita.

En aŭtuno de 1963, tiu loko estis atakata de inundo. La vivo de la komunumanoj estis malfacila. La Partio kaj registaro sendis de diversaj lokoj al ili bezonaĵojn por helpo. Rizo el regiono sude de Jangzi-rivero, maizo el la Nordoriento kaj

brasikoj el Ŝanhajo estis portataj al Hoŭhang en granda kvanto. La komunumanoj profunde sentis la zorgon de la Partio kaj la ŝtato kaj firme decidis venki la naturan katastrofon sinapogante sur la propraj fortoj.

En la jaro 1964, la granda gvidanto Prezidanto Maŭ elmetis la batalan alvokon “lernu de Daĝaj en agrikulturo”, kiu pliapaŝe montris al la kadroj kaj amasoj de Hoŭhang la vojon por antaŭenmarŝo. Sub la gvido de la partia filio, la vastaj amasoj de komunumanoj ripetade lernis la avangardajn farojn de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Daĝaj, retrorigardis la klasbatalon en sia brigado, forte kritikis la kapitalisman tendencon kaj laŭdis la avantaĝon de la socialisma kolektiva ekonomio. Post la amasa klasa eduko kaj linia eduko, ili akiris sian vidon kaj bone sin orientis. Ili diris, ke ankaŭ ili povos fari kion Daĝaj faris.

La partia filio de la brigado serioze analizis la naturajn kondiĉojn de la loko kaj resumis la sperton de batalado kontraŭ inundo en multaj jaroj kaj vidis, ke en batalo kontraŭ naturaj katastrofoj, oni ne devas agi ĉiam en defensivo, sed nepre devas ataki iniciative kaj turni malutilan akvon en utilan. Post ripetada interkonsiliĝo kaj vasta kolekto de opinioj de la amasoj, la brigado decidis prove kulturi rizon por ŝanĝi la fizionomion de la akvoriĉa loko kun malalta produktokvanto.

Sun Mingĝe, membro de la partia filio kaj aliaj 17 junuloj sin organizis en sturman grupon, konstruis pajlan budon ĉe la eksperimenta kampo kaj faris la unuan paŝon en ŝanĝo de senakvaj kampoj en rizkampojn.

Estis multaj malfaciloj por kulturi rizon sur la kampoj de Hoŭhang, kie oni kulturadis nur aliajn grenplantojn. Sed la sturmantoj laboris kun alta batalvolo kaj plena memfido. Ne havante bubalojn, ili do tiris plugilon per homoj; rizplantidoj estis mortigitaj de fiinsektoj, ili kulturis duafoje; ne scipovante transplanti, ili do faris ekzercon per herbo. Malfacile ili plenumis la transplantadon, sed la plantidoj velkis post nur kelkaj tagoj. Tiam, iuj el la sturma grupo malpacientiĝis. Iuj kiuj ne kredis, ke Hoŭhang povas ŝanĝi sian fizionomion, diris: “Ne revu pri manĝo de rizo, se la sorto difinis, ke ni manĝu bataton!”

La partia filio klare konsciis, ke marŝi plue antaŭen aŭ retroiri antaŭ malfaciloj estas ŝlosila demando koncernanta la venkon de batalo kontraŭ la naturo. La sekretario de la partia filio Sun Mingĉen diris al la membroj de la sturma grupo: “Neniu granda arbo ne travivis malbonajn veterojn kaj neniu ŝipo de longa vojaĝo ne spertis ondojn kaj ŝtormojn. Por iri la vojon de Daĝaj, ni devas havi persistemon kaj malcedemon!” La brila instrukcio de Prezidanto Maŭ “lerni de Daĝaj en agrikulturo” kuraĝigis la 18 membrojn de la sturma grupo kaj havigis al ili fortojn. Ili ĵuris: “Ni ne ĉesos batali, se ni ne sukcesos en kulturo de rizo!” Sub la helpo de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, ili trovis, ke la kaŭzo de la velkiĝo de la plantidoj estas tio, ke la rizkampoj serioze ellasas akvon. Ili plantis denove. Nelonge post la transplantado, la plantidoj verdiĝis. La rizkampoj vidiĝis kvazaŭ belaj brodaĵoj kaj ruliĝis en ili verdaj ondoj de plantoj. Ĉe Hoŭhang, kie neniam kreskis rizo, unufoje aromis rizfloroj. Post draŝado per mezurado kaj kalkulo oni konstatis, ke la meznombra pomua produktokvanto de rizo sur la 80 muoj da kampoj estis pli ol 200 kilogramoj kaj tiu de plej bona kampo eĉ superis 400 kilogramojn.

Hoŭhang-brigado havas 1,300 muojn da tero en tri malaltejoj. Tiuj lokoj malebenaj kaj herboplenaj aspektis kvazaŭ sovaĝejo. Akirinte la unuapaŝan venkon en sia batalo kontraŭ la naturo, la Hoŭhang-anoj elmetis al si novan taskon: batali kontraŭ la malaltejoj, kulturebligi virgan teron por produkti pli multe da greno. En vintro de 1966, Sun Mingĉen marŝis kun la komunumanoj de la

brigado sub sia gvido en tiujn malaltejojn. Ruĝaj flagoj flirtis kaj brakoj svingiĝis sur ili. La amasoj laboris entuziasme kaj vekiĝis la virga tero dorminta por miloj da jaroj!

Ili pene laboris tri vintro-printempojn. La 1,300 muoj da virga tero sin turnis sub la feraj manoj de la Hoŭhang-anoj en ebenajn rizkampojn.

En printempo de 1967, kiam oni streĉe transplantis rizplantidojn, Hoŭhang trafis seriozan trosekecon neniam okazintan en la pasintaj 100 jaroj. Rizplantidoj kaj transplantitaj rizplantidoj sur 150 muoj da rizkampoj estis tuj mortontaj pro sekeco.

Tiam iuj diris: “Se oni obstine volas kulturi rizon en tia serioza sekegeco, ĉu tio ne signifas peli nin al malsato!”

Ĉu oni devas kaj povas transplanti la rizplantidojn? Arda diskuto pri tiu problemo disvolviĝis en la tuta brigado.

Iuj diris: “La vojo de transformado de senakva kampo en rizkampon povas esti malfermita nur per penado, ni ne devas iri returne tuj je renkonto de malfaciloj!”

Aliaj diris: “Ju pli multas obstakloj antaŭ ni, des pli brave ni devas batali kaj venki la malfacilojn kiel la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Daĝaj!”

Post diskutado, pli firmiĝis la memfido de la kadroj kaj amasoj kaj ili elpensis rimedojn. Ili profundigis putojn kaj fosis pli ol 200 putojn sur la seka fundo de rivero. Tage kaj nokte ili batalis kontraŭ la sekegeco. Por porti du sitelojn da akvo al la kampoj, ili devis iri pli ol unu kilometron, sed neniu deprimiĝis. Ili portadis akvon per vektoj kaj siteloj en 40 tagoj. La akvumitaj kampoj baldaŭ sekiĝis, tiam ili akvumis ilin denove. Ĉiuj portadis senĉese kaj meznombre ĉiu portis pli ol 2,000 sitelojn da akvo kaj la ŝultroj de multaj el ili frotvundiĝis aŭ fariĝis kalaj pro vektoportado. La kontraŭsekeca batalo venkis. Ili ne nur konservis la plantidojn kaj jam transplantitajn rizplantojn, sed ankaŭ transplantis aliajn 150 muojn da rizo akvumante per alportita akvo. En julio, tie falis sufiĉe granda pluvo. Spite al la laco post longtempa batalo kontraŭ trosekeco, ili finis la tutan transplantan laboron en unu spiro. En la tempo de aŭtuna rikoltado, verdis salikoj kaj oris rizo ĉie sur la vasta tero de Hoŭhang. De tiam disvastiĝas ambaŭborde de Huajhe-rivero la kromnomo Riĉa Produktejo en la Hjuĝoŭ-Huajbej-a Regiono.

Intelektaj Gejunuloj en Kamparo

EN la lastaj jaroj, la vastaj amasoj de intelektaj gejunuloj, kiuj iris en la kamparon kaj tie loĝiĝis, hardiĝas kaj kreskas en la tri grandaj revoluciaj movadoj de klasa batalo, produkta batalo kaj scienca eksperimentado, kaj kontribuas sian forton en la heroa afero de konstruado de nova socialisma kamparo.

NOVAJ KOMUNUMANOJ EN VUJI-MONTARO

En la komenco de 1969, pli ol 200 intelektaj junuloj de Fuĝoŭ kaj aliaj urboj venis por loĝiĝi kaj labori en Hutoŭ-brigado, Hiaŭsong-komunumo de Gian-oŭ-gubernio en la montregiono de norda Fugian. Sub la nutrado de Maŭzedongpenso kaj edukado de la vastaj amasoj de malriĉkamaranoj kaj malsuperaj mezkamaranoj, ili rapide progresis kaj fariĝis freŝa forto en konstruado de nova socialisma kamparo.

Tiuj junaj lernantoj antaŭe vivadis de sia infanaĝo en urboj, tial en la komenca periodo post la alveno al kamparo iuj el ili ŝanceliĝis. Tiam plenumo da klasaj malamikoj faris agitadon al ili por subfosi socialismon. En tia stato la partia filio de la brigado gvidis malriĉkamaranojn kaj malsuperajn mezkamaranojn fari ideologian edukon al la intelektaj junuloj.

Alveninte al la kamparo, intelekta junulo Huang Kinĉeng, kiu neniam spertis malfacilan vivon, ne nur malmulte partoprenis en kolektiva produktado, sed eĉ atencis la solidarecon inter si kaj kunlernantoj. Komunisto Huang Ĵongcaj faris al li klasan edukon. Iun vesperon, maljuna Huang venigis malgrandan Huang en sian hejmon kaj rakontis al li sian tragikan familian historion. Li diris: "Mia patrino mortis en mia aĝo de 4 jaroj. Kvankam mia patro laboregis tutforte tamen ne povis vivteni la tutan

Intelektaj junuloj de Hutoŭ-brigado ŝprucigas insekticidon kune kun komunumanoj.



familion kaj devis fordoni kun larmoj mian fratinton al alia. En la antaŭvespero de Printempa Festo de la jaro kiam mi aĝis 7-jara, la kruela bienulo venis por devigi nin pagi ŝuldon kaj mia malsanega patro mortis pro la mizero. De tiam mi fariĝis orfo tute senhelpa. Mi migris en alian lokon kaj tie paŝtis bovojn aŭ faris aliajn laborojn por bienulo kiel ŝarĝbruto dum dekoj da jaroj. . .” La tragika familia historio de maljuna Huang donis profundan edukon al malgranda Huang. Post tio maljuna Huang daŭre zorgis lin en politiko kaj studis la tri popularajn artikolojn kaj partoprenis en kolektiva produktado kune kun li. Dank’ al pacienca helpo de maljuna Huang, malgranda Huang diligente studas verkojn de Prezidanto Maŭ, klopodas por remuldi ideologion kaj progresas rapide.

La malriĉkampanoj kaj malsuperaj mezkampanoj de Hutoŭ-brigado zorgis ne nur ilian ideologian progreson, sed ankaŭ ilian vivon tre bone.

Zeng Ginming kaj aliaj du intelektaj junuloj loĝis en la hejmo de malriĉkampano onklo Ĝang. Iun fruon matenon, ili triope iris sur monton por haki lignon por iu malsana komunumano. Vespere, kiam ili hakis sufiĉe da ligno kaj pretis reveni, subite ekpluvegis. Kiam ili revenis al la vilaĝo, jam noktiĝis. Ili estis tramalsekigitaj de la pluvo. Ili maltrankviliĝis pensante, ke ili ne preparis manĝon. Sed kiam ili paŝis en la hejmon, onklo kaj onklino Ĝang renkontis ilin kun varma sukera zingibra vino kaj diris ameme: “Tuj trinku la vinon ke vi ne malsaniĝu pro la malvarmo!” Trovinte, ke la



Sekretario de la partia komitato Tan Dongjoŭ sunumas kotonon kune kun komunumaninoj.

Tan Dongjoŭ (la dua de maldekstre) kaj membroj de la partia komitato de la kultivejo en studado.



junuloj ne revenis dum pluvo, onklo Ĝang tuj diris al sia edzino ke ŝi deoktu zingibron per sukera vino kaj pretigu manĝon kaj varman akvon por ili.

Prenante la vinon, la tri junuloj sentis varman fluon tra la tuta korpo kaj diris kun emociiĝo: "La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj estas niaj veraj gepatroj, ni enradikiĝos por ĉiam en la kamparo!"

Dank' al la rigora eduko kaj varma helpo de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, tute noviĝis la spirita fizionomio de la intelektaj junuloj en la brigado. 9 el ili estis elektitaj kiel gvidantaj membroj de la brigado kaj 76 el ili fariĝis politikaj asistantoj, librotenistoj, kasistoj, konservistoj, "nudpiedaj kuracistoj", meteologiaj laborantoj kaj hidroelektraj teknikistoj. La kolektivo de tiuj junuloj estis elektita kiel avangarda kolektivo de intelektaj junuloj de la provinco kiuj iris en kamparon. La vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ĝoje laŭdis ilin, ke ili estas novaj komunumanoj en Vuĵi-montaro.

ĈIAM MODESTE LERNI DE AMASOJ

En septembro de 1964, Tan Dongjoŭ, diplomito de malsupera mezlernejo de la urbo Nanĉang, venis al Hinĝoŭ-kultivejo de Giugiang-gubernio por tie loĝi kaj partopreni agrikulturan laboron. Ŝi estis varme bonvenigata de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Tamen, bone kombini sin kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ne estas afero facila. Iufoje, la produkta grupo sendis ŝin ŝoveli bovfekajon. Starante ĉe la fekaĵa fermentejo ŝi ŝoveladis kaj post multa tempo plenigis nur du korbojn. En tiu tempo iu komunumanino-malriĉkamparanino venis tien, saltis en la fekaĵejon kaj entuziasme eklaboris. Malgranda Tan sentis varmon sur la vangoj kaj tuj saltis en ĝin kaj imite laboris.

Vespere, sidante ĉe lampo, ŝi absorbite legis verkon de Prezidanto Maŭ por kompari instruon de Prezidanto Maŭ kun sia penso. Ŝi pensis, ke ŝia salto en la fekaĵejon post la onklino estas ne nur diferenco de vicoj, sed ankaŭ diferenco de penso. Ŝi dolore sentis, ke ŝi ne povos vere kombini sin kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, se ŝi ne forigos la burĝaran ideologion formitan pro la edukado en la malnova lernejo.

De tiam malgranda Tan proksimigis sian senton paŝon post paŝo al tiu de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj modeste lernis de ili. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj tre zorgis kaj varme helpis ŝin.

Malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj lernigis ŝin plugi, erpi, bredi porkojn, prepari manĝon kaj fari sciencan eksperimenton kaj lasis ŝin partopreni en klasa batalo. En la arda amasa batalo malgranda Tan glorie aliĝis al la granda Komunista Partio de Ĉinio.

Hardite en la Granda Proletara Kultura Revolucio, Tan Dongjoŭ fariĝis ankoraŭ pli energia kaj vigla. Malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj elektis ŝin kiel vicedron de la revolucia komitato de Giugiang-gubernio kaj sekretarion de la partia komitato de la kultivejo. En decembro de 1970, en la Tria Kongreso de la Partio de Gianghi-provinco, ŝi estis elektita kiel membro de la provinca partia komitato.

La Partio kaj popolo donis al ŝi grandan fidon kaj honoron, kio multe ekscitis ŝin. Ŝi rememoris sian kreskadon kaj konsciis, ke ĉiu paŝo en ŝia progreso estas kondukata de Maŭzedongpenso kaj nedisigebla de la diligenta eduko de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Ŝi diris: "La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj estas miaj plej bonaj instruistoj kaj mi ĉiam restos ilia modesta lernanto!"

Post kiam Tan Dongjoŭ fariĝis kadro, ŝi ĉiam klopodas por partopreni en produkta laboro, kiel ajn okupata ŝi estas. En unu jaro ŝi laboris pli ol 240 tagojn.

En aŭgusto de 1970, la kultivejo Hinĝoŭ trafis eksterordinaran sekegecon kaj la pli ol 530 hektaroj da kotonaj kampoj frontis plagon. Ĉu senfare atendi pluvon? Ne! Tan Dongjoŭ trairis ĉiujn filiojn de la kultivejo kaj interkonsiliĝis por trovi taŭgan rimedon kontraŭ sekegeco kun sekretarioj de partiaj filioj kaj spertaj maljunaj malriĉkamparanoj kaj fine la partia komitato de la kultivejo decidis malfermi la kluzon sur la digo por enlasi la akvon de Jangzi-rivero kaj difinis kune kun la amasoj projekton de malfermo de la kluzo.

La kluzpordo estis malfermita. La torenta akvo de Jangzi-rivero obeeme fluis en la pli ol 530 hektarojn da kotonaj kampoj suferantaj sekegecon. Tion vidinte Tan Dongjoŭ sentis neesprimeblan ĝojon kvazaŭ ŝi trinkus mielan akvon.

En la sep jaroj post sia alveno en la kamparon, Tan Dongjoŭ senĉese forigas sian malnovan penson en praktiko de revolucio kaj produkto kaj grandpaŝe marŝas sur la vojo de kombino kun laboristoj kaj kamparanoj.

Himno de Unuiĝo kaj Amikeco



—Pri la Tablotenisa Amikeca Invita Turniro de Azio kaj Afriko



Tablotenisistoj de Kamboĝo, Vjetnamio kaj Laoso (la Laosa Patriota Fronto) interŝanĝas sperton en tablotenisa ludo por kuna progreso.



En amuza kunveno pakistana amiko tenas la pakistanan kaj ĉinan flagojn por esprimi la unuiĝon kaj amikecon inter la du popoloj.



Diverslandaj amikoj ricevis varman bonvenigon.

Libiaj amikoj vizitas
la Muzeon de Malnova
Palaco.







Tablotenisistoj de la Demokratia Popola Respubliko de Koreio en amuza kunveno

Cejlonaj amikoj vizitas la Pekinan Tinkturejon.



Palestinaj amikoj ricevis varman bonvenigon de la komunumanoj dum sia vizito al la Popola Komunumo de Ĉina-Albana Amikeco en la antaŭurbo de Pekino.



Nepalaj kaj ĉina tablotenisistoj en intima interparolo







La estroj de la tablotenisaj delegacioj de aziaj kaj afrikaj landoj kaj regionoj plantas arbojn de amikeco en la korto de la Cefurba Sporta Halo.



Supre maldekstre: Japanaj Tablotenisistoj entuziasme kantas en amuza kunveno.

Sube maldekstre: Egiptaj amikoj interparolas kun laboristino de la Pekina Metiarta Fabriko dum sia vizito.



Nigeria amiko inter ĉinaj geknaboj



Siriaj amikoj promenas sur Tian-anmen-placo.

Etiopijaj kaj ĉinaj tablotenisistoj interparolas amike.





Maŭriciaj amikoj kaj pekinaj popolanoj kune sin amuzas en la Somera Palaco.




Irana kaj ĉinaj tablotenisistoj reciproke donacas insignojn.





Marokaj kaj egiptaj amikoj rigardas akupunkturan anestezon en la Tria Hospitalo Dependanta de la Pekina Medicina Kolegio.



Tanzaniaj amikoj sur la Granda Muro



Floroj de Venko

Pompas Pare

en Prospero

EN la limregiono inter la provincoj Hunan kaj Gujĝoŭ, cirkulas rakontoj pri la unuiĝo kaj kuna batalo de mjaŭaj kaj hanaj popolanoj.

En julio, super kampoj flirtis ruĝaj flagoj kaj sonoris kantoj. En la nomita limregiono la mjaŭoj kaj hanoj urĝe sin okupis pri rikoltado kaj transplantado kun la revolucia spirito de batalo por ĉiu tempeto. El la junulinoj mjaŭaj kaj hanaj iuj falĉis, aliaj draŝis kaj triaj vektportis, ĉiuj sinforĝese laboregis en rikoltado de frua rizo. En kantado la rikoltado progresis rapide, freŝa rizo estis senĉese portata per korboj al la vilaĝoj, aŭdiĝis ĉie ridoj kaj kantoj. El la junuloj mjaŭaj kaj hanaj sin okupantaj pri transplantado de malfruaj rizplantoj, iuj plugis, aliaj erpis kaj triaj transplantis, ĉiuj plenumis siajn taskojn en ŝvito. En tiu montregiono kie kune loĝas mjaŭoj kaj hanoj, nun ruliĝas ondoj de maturiĝinta rizo kaj ĉie regas prospero.

Sed, antaŭ la Liberiĝo, troviĝis abismo de nacia malharmonio inter la mjaŭoj kaj hanoj en tiu loko. Por teni sian reakcian regadon kaj kruele eksplati kaj subpremi mjaŭajn kaj hanajn popolojn, la mjaŭaj tiranoj kaj hanaj bienuloj de tiu regiono senĉese agitis kaj provokis naciajn malpaciĝojn, tiel ke reciprokaj mortigoj kaj malpaciĝo longe daŭris inter la mjaŭoj kaj hanoj. Vintre de 1941, por ruze proprigi al si kampojn de suferplenaj mjaŭoj, la mjaŭa tirano de Hangliu-vilaĝo de Fenghuang-gubernio de Hunan-provinco komplotis kun banditoj de Jan-aŭ-vilaĝo de Songtaŭ-guber-

nio de Gujĝoŭ-provinco, por ke la lastaj faru bruiligojn, mortigojn kaj prirabadon en Hangliu-vilaĝo. La 22-jara solfilo kaj la bofilino de mjaŭa malriĉ-kampano Long Hiugi estis de ili mortigitaj. Post tio, la tirano senhontè kalumniis, ke la hanoj intencas ekstermi la mjaŭojn en ĉiu domo por okupi iliajn montojn kaj kampojn. Pro tiu krima agitado, eksplodis sanga batalo inter la mjaŭoj kaj hanoj profite al la tirano. De tiam ankoraŭ pli profundigis la abismo inter la tieaj loĝantoj de la du frataj nacioj.

Kiel la leviĝanta suno kaj unua blovo de printempa vento venis al la limregiono, en februaro de 1950, trupoj de ĈPLA persone kreita kaj gvidata de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ alportis al la mjaŭaj kaj hanaj popolanoj la brilan Maŭzedongpenson. La krimaj bienuloj kaj mjaŭaj tiranoj estis punitaj de la popola registaro kaj la multe suferintaj mjaŭaj kaj hanaj popolanoj en la malnova socio fariĝis mastroj. Sub la briloj de la naciaj politikoj de Prezidanto Maŭ, la malriĉaj mjaŭaj kampanoj de Hangliu-vilaĝo kaj la malriĉaj hanaj kampanoj de Jan-aŭ-vilaĝo akriĝis siajn okulojn kaj levis sian klasan konscion.

La komuna revolucia celo kaj sincera sento de klasa solidareco unuigis la mjaŭojn kaj hanojn, ili liberigis sin el la feŭdaj katenoj postlasitaj de la historio kaj ekmarŝis antaŭen ŝultro ĉe ŝultro sur la larĝa socialisma vojo.

Antaŭ nelonge, la mjaŭoj de Luoĉaŭging-komunumo de Fenghuang-gubernio de Hunan konstruis hidroelektran stacion per siaj propraj manoj, ĉiu familio de la komunumo ekuzis elektrajn lampojn kaj ĉiuj vilaĝoj instalas fadenan disaŭdigan sistemon. Por ke la hanaj komunumanoj de najbara vilaĝo kun malfacila komunikado pli bone informiĝu pri la ŝtataj aferoj kaj firme marŝu antaŭen laŭ la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, la mjaŭaj kadroj de tiu komunumo interkonsiliĝis kaj decidis plilongigi elektran linion al la hanaj komunumanoj. Informite pri tio, la mjaŭoj de Hangliu najbara al la vilaĝo de hanoj tre ĝojis, opiniante ke tio estas bona afero por komuna progreso kun la hanaj gefratoj. Ili aktive starigis stangojn kaj transportis materialojn. Post nelonge, elektra fadeno estis instalita trans montoj kaj riveroj ĝis la vilaĝo de la hanoj. Kiam la lastaj ŝaltis elektran lampon kaj aŭdis la melodion «Ruĝas la Oriento», ili ĉiuj emocie kriis “Vivu Prezidanto Maŭ!” Ili forte premis la manojn al mjaŭaj fratoj kaj diris: “Fratoj, dankojn al vi pro la helpo.”

Kaj la hanaj komunumanoj same prizorgas la progreson de la mjaŭaj fratoj. Iutage en majo 1971, sarkante siajn rizkampojn la komunumanoj de Jan-aŭ-vilaĝo de Vajaŭ-komunumo, Songtaŭ-gubernio, Gujĝoŭ-provinco trovis ke la plantoj de Hangliu-vilaĝo trans la rivereto kreskas malbone, kaj pensis: Kial malsame kreskas la samtempe transplantitaj rizplantidoj sur la du bordoj de la rivereto? Post esploro, ili eksciis ke Hangliu koncentris siajn homfortojn al konstruado de irigacia kanalo kaj ne havis tempon por kolekti kaj ĝustatempe doni sterkon al siaj fruaj rizplantoj. Post la laboro, la hanaj komunumanoj proponis al sia grupestro helpi al Hangliu per la rezervitaj pli ol 1,500 kg. da kemia sterko de sia grupo. La estro tute subtenis tion, tuj interkonsiliĝis kun la aliaj kadroj kaj grupanoj kaj akiris ĉies aprobon. En la sekvinta tago, ili jam transportis la kemian sterkon al Hangliu. La tieaj mjaŭaj komunumanoj diris dankeme: “Kiel bone vi hanaj fratoj prizorgas nin! Ni nepre lernos de vi en tenado de la revolucio kaj stimulo de la produkto, por fari kontribuon al la socialisma konstruado de la patrolando.”

Nun al ambaŭ vilaĝoj estas aljuĝita la titolo de avangarda unuo. Ĉiufoje, kiam anoj de la du vilaĝoj iras al kampa laboro, ili esprimas sian senton unuj al la aliaj per kanto:

*Ne povas la riveroj nek la montoj apartigi
La mjaŭojn kaj la hanojn, kunigitajn kor’ al koro,
Ili impetas kune, Prezidanton Maŭ sekvante
Ĝis la mondfino ĉiam sen ŝanĝeto de la volo.*

La mjaŭoj kaj hanoj en la Hunan-Gujĝoŭ-a limregiono disvolvis la noblan spiriton de komunismo kaj akiris ree kaj ree venkojn en klasbatalo, produktado kaj scienca eksperimentado.

Hingguang-brigado de Vajaŭ-komunumo de Songtaŭ-gubernio kaj Niujan-brigado de Luoĉaŭging-komunumo de Fenghuang-gubernio troviĝas en alta kaj malvarma montregiono kun intertuŝigantaj kampoj. Responde al la granda alvoko de Prezidanto Maŭ “lerni de Daĝaj en agrikulturo”, la hanaj komunumanoj de la 5-a produkta grupo de Hingguang-brigado kaj la mjaŭaj komunumanoj de la 5-a produkta grupo de Niujan-brigado decidis instali pumpilon apud Niujan-akvokonservejo por levi akvon sur monton kaj konduki ĝin per kanalo por irigacii ŝtuparajn kampojn de ambaŭ grupoj.

Komenciĝis la konstruado. Vidinte ke la 5-a grupo de Hingguang-brigado estas tre okupata, la mjaŭaj komunumanoj de la 5-a grupo de Niujan-

brigado pro tio venis al la konstruejo je unu tago pli frue, sub la gvido de la grupestro Long Kiaŭ-en.

Ili fosis teron por fari bazon, kaj por akiri ŝtonojn, ili eksplodigis rokon. Aŭdinte la bruon, komunumanoj de la 5-a grupo de Hingguang-brigado informis la grupestron Hiang Mingŝeng por vidi, ĉu la 5-a grupo de Niujan-brigado jam komencis labori. Flugrapide kurinte al la konstruejo, la grupestro vidis ĉion, tuj revenis kaj kondukis pli ol 30 komunumanojn al la konstruejo. Inter la homamasoj li trovis la grupestron Long de Niujan kaj diris: “Kara Long, konstrui la pumpstacion ja estas komuna tasko de niaj du grupoj, kial via grupo alvenis sola antaŭdate? Ankaŭ vi estas tre okupataj.” Long respondis kun rideto: “La mjaŭoj kaj hanoj ja estas samfamilianoj. Vi estas tre okupataj, do ni eklaboris pli frue. Tio ĉi ja ne indas mencion!” Tiel babilante ambaŭ sin ĵetis en streĉan laboron.

En la tago, kiam estis liverita la mendita pumpilo, ekbolis la du grupoj. La estro de la 5-a grupo de Niujan transiris montojn por alporti la pumpilon kun kelkaj junuloj. La estro de la 5-a grupo de Hingguang-brigado ankaŭ iris kun siaj grupanoj kaj renkontis ilin survoje. Tiel, la mjaŭoj kaj hanoj kune portis la pumpilon per siaj ŝultroj al la stacio.

Por instali la pumpilon, la 5-a grupo de Hingguang komencis labori sola sen informo al la 5-a grupo de Niujan-brigado konsiderante ke tiu estas tre okupata. Tamen, baldaŭ tion jam eksciis la 5-a grupo de Niujan. Kaj la mjaŭaj komunumanoj tuj venis al la konstruejo. La junuloj de ambaŭ grupoj ŝultroportis kaj muntis ŝtalajn tubojn kaj la junulinoj kune konstruis kanalon sur la montoj. Dank’ al kuna klopodo, fine ili instalis ĉe Niujan-akvokonservejo potencon pumpilon.

En la tago de ekfunkciigo de la maŝino, la mjaŭoj kaj hanoj en festaj vestoj kolektiĝis kaj kantis ĉe la pumpstacio. Pura akvo ŝprucis el la tubo kaj fluis tra la kanalo ĉirkaŭ la montoj al rizkampoj de ambaŭ grupoj.

Dank’ al akvumado per la klara fluo en la irigacia kanalo ĉirkaŭ la montoj la ŝtupaj kampoj plenas de aromaj rizplantoj kaj tute likvidiĝis la minaco de sekeco kiu antaŭe plagis la montajn kampojn de la du grupoj. Rigardante la prosperajn montvilaĝojn, la mjaŭoj kaj hanoj kantas plengorĝe:

*La ruĝa suno super niaj montvilaĝoj brilas,
Radias ĝoje ĉiu monto kaj rivero.
La mjaŭoj kaj la hanoj vojon de Daĝaj suriras,
Floroj de venko pompas pare en prospero.*


Rejuniĝo de Kajluan- karbominejo

1

En frusomera tago de 1970, du aŭtoj kuris sur la ŝoseo inter Pekino kaj Tangŝan. Per ili gvidantoj kaj ministoj de Kajluan-karbominejo veturis revene al Kajluan post aŭskultado de avangardaj spertoj de frataj minejoj en la ĉefurbo.

En la lastaj jaroj, la situacio de revolucio kaj produktado de Kajluan-karbominejo estis bonega. La superplane produktita kvanto de karbo en 1968 kaj 1969 sufiĉis por kontentigi la ĉiutagan uzon de urbo kun pli ol miliono da loĝantoj en unu jaro; kaj la superplane produktita kvanto de karbo de la unuaj monatoj de 1970 egalis al la totala kvanto de la du antaŭaj jaroj. Sed iuj el la gvidantoj dronis

Veterana ministro Zong Ĝenduo hidraŭlike fosas karbon.



iom post iom en memkontentiĝo pri tiuj atingoj. Ĉifoje la bonaj spertoj de frataj unuoj prezentitaj en la kunveno de Pekino ebligis al ili vidi sian postiĝintecon. Tial survoje ili jam komencis diskutadi en la aŭtoj.

Parolante pri sia postiĝinteco, ili provis elpensi projekton por ekspluati latentajn fortojn de la malnova minejo. La diskuto iris vigle kaj fervore.

Reveninte al la minejo, ili komencis varme diskuti pri la elpensita projekto en kunveno de la konstanta komitato de la revolucia komitato. Sed la kunveno ne tuj faris konkludon. La ĉeestantoj decidis iri en la amasojn por lerni ilian revolucian spiriton, koni iliajn opiniojn kaj fari konkludon kune kun ili.

En la bazaj unuoj, la akraj kritikoj de la ministoj en dazibaŭoj kaj la labora fervoro skuis ilian animon. La karbofosa skipo de Ma Jongguang de la minejo Ĝaŭgeĝuang montris en iu dazibaŭo: “Ni akiris sukceson en la pasinteco kaj ricevis laŭdojn; ĉu ni nun iru malrapide aŭ marŝu rapide?” Laboristoj diris: “Grandajn latentajn fortojn nia minejo havas. Se ni gvidos nin per Maŭzedongpenso, la malnova minejo faros novan kontribuon.” En la minejo Tanggiaĝuang, ili vidis, ke la ministoj duobligis la produktokvanton de karbo ĉe loko kie la karbotavolo estas plej maldika. En la minejo Fangeĝuang, ili vidis ke oni pli-ol-kvaroble altigis la produktokvanton de karbo ĉe iu fosejo. En la minejo Tangŝan, la laboristoj plenumis en 19 tagoj la taskon por duona jaro, dank’ al rapida reformo de la ventola puto.

Poste ili ellaboris planon por grandskale pli-produkti karbon per ekspluato de latentaj fortoj de la malnovaj minejoj kaj difinis rimedojn por efektiviĝi la planon. La amasoj ekagis tuj post kiam la gvidantoj publikigis la planon.

2

Dum sia klopoda ekspluatado de latentaj fortoj de la malnovaj minejoj, ministoj diris brave: La vasta minejo estas nia batalejo kaj ni servos kiel gigantaj kolonoj subtenantaj kilometre dikan roktavolon.

Veterana ministro Zong Ĝenduo, kiu laboris jam pli ol 30 jarojn en mineja galerio, jam proksimiĝis al la aĝo de 50 jaroj. Ĉiutage li iras fosi karbon tiel akurate kiel horloĝo, kaj li ĉiam laboras kun sinforĝesa fervoro. Oni kromnomas lin Senlaca Karbofosanto.

Veterana ministro Lin Ŝoulian de la minejo Ĝaŭgeĝuang projektis novan metodon de ekspluatado de karbo sub la helpo de aliaj laboristoj, teknikistoj kaj kadroj kaj sukcesis en prova apliko. La nova metodo ne nur povas malpliigi la intensecon de la laboro de la ministoj, plialtigi la laborefikon pli-ol-duoble sed ankaŭ garantii sekuran laboradon kaj ebligi ŝparon de granda kvanto da ligno.

Disvolvante la revolucian spiriton de sentimeco al malfaciloj kaj morto, la fosistoj senĉese faris avangardaĵojn. Iu fosista grupo de la minejo Ljujiatuo elmetis por si taskon de galeria fosado de 1,000 metroj en unu monato, kiu kvanto estas trioblo de la antaŭa. Gvidantoj de tiu minejo konsilis, ke ili difinu la laborkvanton je 800 metroj, konsiderante ke ili ne havas sufiĉe da ekipaĵoj kaj krome la geologiaj kondiĉoj estas malbonaj. La laboristoj diris: “Farante revolucion, oni devas marŝi spite al malfaciloj. Se ni ne povos pretigi karbofosejojn, tio malhelpos produkton de granda kvanto da karbo. Ni nepre plenumos la taskon de fosado de 1,000 metroj en unu monato!” Kaj fine la ministoj sukcesis starigi la novan rekordon de mil metroj en unu monato, venkinte multajn malfacilojn.

Vigle disvolviĝis la amasa movado por ekspluati latentajn fortojn de la minejo. La laboristoj de la elektrejo energie produktis elektron je supernorma kapacito por provizi la minejon per pli multe da elektro. Teknikistoj forlasis sian oficejon, laboris kaj projektis kune kun laboristoj kaj senĉese altigis la transportan kaj levan povon. La administrataj kaj servantaj laborantoj estas ĉiam pretaj por servi al la fronto en la ŝaktoj. Kaj la diligenta laboro de la miloj kaj miloj da ministoj donis revolucian junecon al la malnova minejo kun diametro de 50 km.

3

Revolucia entuziasmo devas esti kombinita kun scienca sinteno. Ankaŭ tion faris tre bone la vastaj amasoj de oficistoj kaj laboristoj de Kajluan-karbo minejo.

Iun posttagmezon, kiam kadroj kunsidis en la kunvenejo de la minejo Tangŝan, aŭdiĝis tamtamado kaj tamburado. Grupo da junaj laboristoj alportis dazibaŭon por kritiki la gvidantajn kamaradojn pro neakcepto de ilia propono.

Antaŭ nelonge, laboristoj lernis de alia minejo novan teknikon de fosado de galerio kaj ŝakto. Frata unuo jam sukcesis fosi ŝakton laŭ tiu metodo

kaj ili ricevis bonan rezulton en eksperimento en galerio de sia minejo. Ili diris ĝoje: “Fine ni trovis metodojn por konstrui ŝakton multe, rapide, bone kaj ekonomie.” Nemalmultaj proponis fosi la ŝakton n-ro 7 per tiu metodo. Sed longe post elmeto de tiu propono al la gvidantoj, ili ankoraŭ ne ricevis respondon. Ili malpacientiĝis kaj alportis la dazibaŭon.

Kiamaniere oni do fosu la ŝakton n-ro 7? Tiu problemo maltrankviligis ankaŭ kamaradon Ĝu, vicestron de la revolucia komitato, kies tasko estas zorgi pri la produktado. Materialo liverita de geologia fako montris, ke la tieaj rokoj estas malbonaj. Tial li timis, ke la nova tekniko ne taŭgas por tiu loko kaj intencis interkonsiliĝi kun aliaj. Li ne atendis, ke laboristoj jam alportas dazibaŭon.

En la sekvinta tago, kamarado Ĝu invitis la laboristojn, kiuj alportis al li dazibaŭon, al kunveno kaj diris al ili sian opinion. En la kunveno iu veterana ministro diris: “Se la geologiaj kondiĉoj estas malbonaj, tiu metodo ne estas aplikebla. Fosi ŝakton estas tute alia afero ol fosi galerion. Se galerio difektiĝos, oni povos ĝin ripari je iu ajn tempo; se ŝakto difektiĝos, la fossejoj sub ĝi ne povos produkti karbon.” Post diskutado, fine ili venis al komuna kono kaj konsentis la opinion de kamarado Ĝu.

Post komenco de la konstruado de ŝakto n-ro 7 oni trovis, ke la geologiaj kondiĉoj vere estas malbonaj, en la tertavolo estas malgrandaj ŝtonoj kaj granda kvanto da elŝprucanta akvo. Tio montris ke la nova tekniko ne taŭgas por tiu loko. Iu juna laboristo diris: “Kamarado Ĝu faris bonan prienson, alie ni trafus grandan perdon.”

Dank’ al tio ke la vastaj amasoj de laboristoj, kadroj kaj teknikistoj de Kajluan-karbonejo plene atentis pri kombino de revolucia spirito kun scienca sinteno, la produktado de tiu karbonejo senĉese disvolviĝas. De januaro ĝis aŭgusto de 1971, la produktokvanto de karbo pligrandiĝis je pli ol 7% kompare kun tiu de la sama periodo de 1970 kaj superis la plej altan nivelon en la historio.



Veterana ministro Lin Ŝoulian (la meza) studas pri novtipa karbofosa maŝino kune kun membroj de la grupo de teknika renovigo.



Ministro de Kajluan-minejo fosas karbon per maŝino.

Pli kaj Pli Boniĝas la Vivo de Nia Popolo

SUB la saĝa gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la ĉina popolo persistas en la principo “sendependeco kaj memstareco, sinapogo sur propraj fortoj”, vanigis la blokadon kaj detruon de imperiismo, reviziismo kaj reakciularo, kaj sen-

ĉese disvolvis la industrian kaj agrikulturan produktadon, tiel ke la popola vivo pli kaj pli boniĝas.

Laŭ la instrukcio de Prezidanto Maŭ, nia registaro faris taŭgan aranĝon kaj kompletan planon

Diversaj produktaĵoj de la Kunming-a Fabriko de Emajlaĵoj



por solvi la problemon de popola vivo elirante el la interesoj de la sepcnt milionoj da popolanoj.

En la pasintaj pli ol dudek jaroj, kun disvolviĝo de la produktado kaj senĉesa altiĝo de la produktiveco, la ŝtato plurfoje reĝustigis la salajron de la oficistoj kaj laboristoj, tiel ke iom post iom altiĝis ilia salajro, precipe la salajro de tiuj kies salajro estas malalta. La meznombra persona jara salajro de niaj oficistoj kaj laboristoj, escepte de tiuj, kiuj partoprenis en laboro en la lastaj jaroj, estas ĉ. 650 juanoj, t. e. je pli ol 50% pli multe ol en 1952. Tre malgranda estas la diferenco inter la salajroj de la laboristoj, kaj la plej alta salajro estas malpli ol kvar obloj de la plej malalta. Por plifortigi la unuiĝon inter la laboristoj kaj kamparanoj kaj plifirmigi ilian aliancon, la difinita nivelo de la salajroj de laboristoj kaj oficistoj estas nealta. Tamen pro ĝenerala laborhaveco, malalta lupago de loĝejo, malalta prezo de varoj kaj nepago de persona enspeza imposto, la tuta salajro de la laboristoj kaj oficistoj estas uzata por propra konsumo, kaj ilia vivo ne nur estas garantiata, sed ankaŭ altiĝas paŝon post paŝo.


Post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, nia registaro alprenis multajn aranĝojn por ke la plenaĝaj loĝantoj de urboj kaj urbetoj ricevu laboron, tiel ke la laborhavantoj multiĝas jaron post jaro. Jam antaŭ pli ol dek jaroj nia lando likvidis senlaborecon. Nun la nombro de laboristoj kaj oficistoj de nia lando pli-ol-sesobliĝis kompare kun tiu antaŭ la Liberiĝo. En nia lando la diplomitoj de altaj kaj mezaj lernejoj estas laŭplane asignitaj de la ŝtato al diversaj laborpostenoj en la socialisma konstruado. Nun multaj familioj havas po plurajn laborantojn. La prezoj de vivbezonaĵoj de nia lando estas malaltaj kaj longperioide stabilaj. La pago de ĉiu familio por loĝejo kaj uzitaj akvo kaj elektro okupas ĝenerale 4-5% de la salajro de la laboristo. Krom salajra enspezo la laboristoj de nia lando ankaŭ ĝuas laboran asekuron kaj bonstigitan zorgon, kia senpaga kuracado. Akuŝintoj, maljunuloj, malsanuloj, vunditoj kaj kripluloj ĉiuj estas zorgataj. Tial en la lastaj pli ol 20 jaroj senĉese pliboniĝas la vivo de urbaj laboristoj kaj aliaj laborantaj popolanoj de nia lando.

En nia kamparo efektiviĝis popolkomunumigo kaj ĉiu laborkapabla kamparano partoprenas en kolektiva produktado. Dum la dekkelkaj jaroj, kun la disvolviĝo de la kolektiva ekonomio la efektiva enspezo kaj mona enspezo de la kamparanoj havis certan pliiĝon. Ĉiujare la produktaj grupoj



Varĉaro de Hinjuan-gubernio de Hingiang venis al Tianŝan-paŝtejo. Kazahaj paŝtistoj aĉetas ĉiutagajn vivbezonaĵojn.

Nove konstruita Lana Teksejo de Linĝi en Tibeto produktas lanajn litkovrilojn.



kaj brigadoj de popolaj komunumoj prenas nombron da mono el la totala enspezo kiel publikan bonstatigan fonduson por socia asekuro kaj kolektiva bonstato. Grupo vivtenas senhelpajn maljunajn, malfortajn, kriplajn komunumanojn, orfojn kaj vidvinojn, kaj tiujn kiuj trafis malfeliĉan akcidenton aŭ renkontis malfacilojn en la vivo. Kiam la popolaj komunumoj aŭ produktaj brigadoj kaj grupoj malmulte rikoltas pro naturaj katastrofoj kaj ties vivo renkontas portempan malfacilon, la ŝtato aktive movas ilin al disvolvo de produktado kaj donas al ili certan helpon. Nun la vivo de niaj kamparanoj multege ŝanĝiĝis kompare kun tiu en la malnova Ĉinio.

Dank' al senĉesa disvolviĝo de la agrikultura produktado, la procento de agrikultura imposto en la totala valoro de agrikulturo kaj flankaj okupoj malmultiĝis de 20 en 1953 ĝis 6 en 1970.

En la malnova Ĉinio, sub la reakcia regado de Kuomintango la popolo vivis en mizero pro inflacio kaj rapidega altiĝo de prezoj. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la Partio kaj ŝtato alprenis principon de stabiligo de prezoj. Krom tio, kun la disvolviĝo de industria kaj agrikultura produktado oni laŭplane faris reĝustigon al maljustaj prezoj formitaj en la malnova Ĉinio, precipe al tiuj de agrikulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj. Nun la prezoj laŭ kiuj la ŝtato aĉetas ĉefajn agrikulturajn kaj flankokupajn produktaĵojn de nia lando altiĝis je ĉ. 90% kompare kun tiuj en 1950, dum la produktaj materialoj provizitaj de la ŝtato al la kamparo iom post iom malaltiĝis, interalie la prezoj de kemia sterko, agrikulturaj insekticidoj kaj mazuto trione aŭ du-trione reduktiĝis kompare kun tiuj en 1950. La vendaj prezoj de porkonsumaj produktaĵoj de nia lando estas ĝenerale stabilaj. Dum la lastaj dekelkaj jaroj, malofte ŝanĝiĝis la prezoj de la ĉefaj

La Unua Grenvendejo de laborista kvartalo en Tiehi de Ŝenjang tutkore servas al la popolo.





Fruktovendejo en Tiangin

vivbezonaĵoj kiaj greno, kotona ŝtofo, pormanĝa oleo kaj salo. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, la aĉeta prezo de greno plurfoje leviĝis, dum la vendprezo de greno ĉiam restas stabila. La ŝtato pagas la malprofiton kaj administran koston en aĉeto kaj disvendo de greno. Tio estas tute nerealiebla en ĉiu ajn kapitalisma lando. Tio plene montras la zorgon de niaj Partio kaj ŝtato al la laborantaj popoloj en la vivo kaj plene manifestas la superecon de nia socialisma sistemo.

En la Granda Proletara Kultura Revolucio paŝon post paŝo malaltiĝis la prezoj de medikamentoj, libroj, ĵurnaloj kaj gazetoj, radioriceviloj, plastaj produktaĵoj, emajlitaĵoj, k. a. Kun la disvolviĝo de produktado de medikamentoj de nia lando iliaj prezoj plurfoje malaltiĝis. En 1969 en la tuta lando efektiviĝis grandmezura reduktiĝo de prezoj de medikamentoj. Nur en tiu jaro la totala valoro de la malaltigitaj prezoj atingis pli ol mil milionojn da juanoj. La preza nivelo post la reduktiĝo malpliĝis je 80% kompare kun tiu en 1950. Tio multe malgrandigis la medicinan elspezon de nia popolo.

Dank' al alprenado de tiuj politikoj rimarkinde altiĝis la vivnivelo de niaj popoloj; ankaŭ la vivnivela diferenco inter la urboj kaj kamparo, inter laboristoj kaj kamparanoj malgrandiĝis iom post iom.

Sur la bazo de pliiĝo de sia enspezo kaj altiĝo de la vivnivelo de la vasta amaso de laboristoj kaj kamparanoj de nia lando ili deponis sian ŝparmonon en banko por subteni la konstruadon de la lando. Ĝis la fino de 1970 la totala sumo de ŝpardepono de la tuta lando pliiĝis je 20% kompare kun tiu en 1965.

Kun la senĉesa kresko de la industria kaj agrikultura produktado, iom post iom leviĝis la aĉetpovo de la urbaj kaj kamparaj popoloj kaj nia merkato estas en prospero. Post la Liberiĝo de la tuta lando la totala kvanto de podetale venditaj varoj pliiĝis je pli ol 5 obloj.

Sub la ĝusta gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio, la industria kaj agrikultura produktado de nia lando daŭrigos sian rapidan disvolviĝon. Ankaŭ la vivo de nia popolo pli kaj pli boniĝos.

Vizito al Nova Vilaĝo de Korea Nacimalplimulto

IUTAGE ni vizitis la novan vilaĝon Aladi de koreoj en Ulagie-komunumo de Jonggi-gubernio, Gilin-provinco.

Kamarado Piaŭ Giĉun, vicsekretario de la brigada partia filio, kiu akompanis nin dum la vizito, diris al ni, ke antaŭ la Liberiĝo Aladi estis malriĉa kaj malalta, preskaŭ izola vilaĝo kun kadukaj domoj. La koreaj loĝantoj ĉi tie suferis klasan kaj nacian subpremadon kaj vivis tre mizere. Post la Liberiĝo, direktate de la naciaj politikoj de Prezidanto Maŭ, la agrikultura produkto de Aladi disvolviĝis rapide, la kolektiva ekonomio grandiĝis senĉese kaj la vivnivelo de la komunumanoj altiĝas jaron post jaro. La pomua produktokvanto de greno kreskis de pli ol 130 kg. antaŭ la Liberiĝo ĝis

pli ol 430 kg., la greno kolektive rezervata de la brigado atingis pli ol 150,000 kg. kaj la komuna akumulita mono atingis preskaŭ milionon da juanoj.

SUR LA FUTBALA TERENO

Post la tagmanĝo, ni venis al la brigada futbala tereno en arbaro. Sportistoj en ruĝaj kaj bluaj vestoj estis en streĉa futbala maĉo. Koreaj viroj kaj virinoj, junuloj kaj maljunuloj sidis ĉirkaŭ la tereno kaj rigardis kun granda intereso. La blankaj bluzoj, nigraj jupoj kaj aliaj koloraj naciaj kostumoj portataj de koreaj popolanoj montriĝis tre belaj antaŭ la fono de verdaj arboj. Sur la tereno, sportisto "5" en blua vesto saltis supren kaj haltigis per la kapo demalproksiman pilkon kaj

La pomua produktokvanto de rizo en Aladi-brigado superis 400 kilogramojn en la lastaj sinsekvaj jaroj, jen la komunumanoj en la aŭtuna rikoltado.



transdonis ĝin al avanulo, kiu piedbatis la pilkon alten. La sportisto "5" kuris al ĝi renkonte kaj en aero piedbatis ĝin en la golejon. Eksplodis aplaŭdoj kaj ĝoje hurais la spektatoroj.

Kamarado Piaŭ diris al ni, ke la sportistoj en ruĝaj vestoj apartenas al la amatora futbala teamo de la Giangbej-a Maŝin-fabriko de la urbo Gilin, la sportisto "5" estas komunisto Nan Ĝajji, lertulo de la brigado en transplantado de rizidoj kaj estro de la amatora futbala teamo de la brigado. La futbala teamo de la brigado ofte konkuras kun vizitanta teamo, de tempo al tempo ĝi ankaŭ iras aliloken por konkurso. La brigado donas grandan atenton sur sportajn aktivadojn kaj ĉiujare okazigas tradician sportokunvenon.

Post la konkurso grupo da gejunuloj en koloraj vestoj alvenis ludante muzikilojn por saluti la sportistojn-gastojn. La koreaj komunumanoj lertaj en kantado kaj dancado nedeteneble ekkantis ĥore, takte frapante siajn manojn.

Ni estis absorbitaj de la okazaĵo antaŭ niaj okuloj. Kamarado Piaŭ Giĉun divenis nian senton kaj diris, ke la koreoj tre ŝatas kanti kaj danci. Antaŭ la Liberiĝo, la mizera vivo nuligis la interenson de multaj homoj pri tiaj aktivadoj. Post la Liberiĝo, ili fariĝis mastroj de la nova socio, ilia vivteno estas garantiata kaj disvolviĝis la aktivadoj de kantado kaj dancado. Nun la brigado havas amatoran propagandan grupon, kiu ofte prezentas al la amasoj malgrandajn programerojn de kantado kaj dancado.

EN LA LERNEJO

Forlasinte la futbalan terenon, ni venis al la lernejo. La respondeculo de la revolucia komitato de la lernejo Giang Bingjun kaj aliaj instruistoj varme nin bonvenigis. Kamarado Giang diris al ni: "Prezidanto Maŭ tre zorgas kaj alte taksas la disvolviĝon de la eduka afero de la naci-malplimulto. Post la Liberiĝo la ŝtato senĉese sendis al ni koreajn instruistojn, instrumentojn de instruado kaj sporto kaj postlecionajn legaĵojn por la lernantoj. Sed kiu zorgis pri la eduko de nia nacio en la malnova socio!"



Komunumanoj aĉetas radioricevilon.

Juna instruisto Lu Longgjun diris al ni: "Antaŭ la Liberiĝo, oni malpermesis koreajn knabojn uzi la korean lingvon en la lernejoj. Tial estis multaj analfabetoj kaj la korea skriba lingvo estis preskaŭ ekster uzo. Post la Liberiĝo mi kaj mia fratino vizitis lernejon por koreoj. Fininte lernadon en malsupera mezlernejo ŝi eklaboris en Hinhua-librejo de Jonggi-gubernio. Diplomite en la Ĉangĉun-a supera mezlernejo por koreoj, mi fariĝis instruisto en la hejmloko kaj glorie aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio."

Kamarado Giang daŭrigis: "Nun, en nia lernejo oni lekcias per la korea lingvo, kaj ankaŭ la lernolibroj estas en la korea lingvo. Por plifortigi la unuiĝon inter la nacioj, la lernantoj lernas ankaŭ la hanan lingvon. La geknaboj lernas senpage. De 1958 la brigado jam ĝeneraligis edukon de malsupera mezlernejo, ĝis nun ni jam kulturis pli ol 500 diplomitojn el malsupera mezlernejo. Inter ili iuj daŭrigas lernadon, iuj laboras kiel traktoristoj, elektristoj, librotenistoj aŭ instruistoj de la brigado, aliaj fariĝis laboristoj kaj triaj aliĝis al la Ĉina Popola Liberiga Armeo. Ni neniam vanigos la esperon de Prezidanto Maŭ pri ni kaj nepre klopodos por plibonigi la nacian edukon kaj kulturi pli multajn kaj pli bonajn daŭrigantojn de la proletara revolucia afero."

EN LA KOMERCA KOOPERATIVO

Post kamplaboro, ni vizitis la komercan kooperativon de la brigado. En ĝi estas vendataj diversaj varoj: bluzoj en brilaj koloroj, longaj jupoj,

buntaj ŝtrumpoj, lanfadenoj, lanaj kaj silkaj ŝtofoj, diversaj koreaj manĝiloj en antikvaj formoj. Ĝi estas vera ĉiovendejo.

Koreaj komunumanoj, kiuj staris duope aŭ triope antaŭ la servotabloj kaj estis afable akceptataj de la vendistoj, elektis por si ŝatatajn objektojn.

Kelkaj kamaradinoj staris antaŭ servotablo de silkaj ŝtofoj kaj parolis ridante. Pridemandante, ni informiĝis ke ili helpas onklinon Ĝoŭ en elektado de donacaĵoj al la fianĉino de ŝia filo. Ili fervore donis konsilojn al onklino Ĝoŭ, kiu fine aĉetis kelkajn pecojn da ŝtofoj kaj ĝoje eliris kun la aliaj.

En alia ĉambro por ĉiutagaj kaj metalaj varoj, ni intervidiĝis antaŭ la servotablo kaj interparolis kun komunisto Piaŭ Tajĉun, la respondeculo de la komerca kooperativo. Li diris al ni, ke antaŭ la Liberiĝo, la japanaj imperiistoj kaj la kuomintangaj reakciuloj rigardis la koreojn ne kiel homojn, por ne paroli pri zorgo de nia bezono kaj provizado per varoj ŝatataj de ni koreoj. Tiam en Aladi oni devis piediri kelkajn kilometrojn nur por aĉeti kudr-

ilon. Post la Liberiĝo, direktate de la principo de Prezidanto Maŭ “**disvolvi ekonomion kaj garantii provizadon**”, ĉi tie oni fondis la komercan kooperativon, kiu ĝustatempe liveras al la popolamasoj ĉiutagajn bezonaĵojn kaj produktajn materialojn.

Pri la distribuado de varoj, la popola registaro tre favoras al la nacimalplimulto kaj liveras al koreoj la varojn ŝatatajn kiaj estas blankigita ŝtofo, silkaj kaj lanaj ŝtofoj, koreaj kaŭĉukaj galoŝoj, ledŝuoj, ledkesto, kaldronoj kun kovrilo, bicikloj, radioriceviloj, kudromaŝinoj, brakhorloĝoj ktp. Ĉiujare nia kooperativo mendas pli ol 500 kg. da lanfadenoj diverskoloraj. Iutempe, laŭ postulo de komunumanoj ĝi rekte elsendis personojn por mendi varojn. Foje, kiam ni informiĝis ke kaŭĉukaj botoj produktitaj en Ŝenjang tre taŭgas por akvokampaj laboroj, ni elsendis personojn por aĉeti ilin por livero al niaj komunumanoj. Unuvorte, sub zorgo de la popola registaro, ni ĉiamaniere servas al la komunumanoj laŭ la naciaj karakteroj de koreoj.



*Instruistino helpas ge-
knabojn en lernado.*

GASTADO ĈE MALRIĈKAMPARANO NAN TIANŝOŬ

Vespere, ni gastis ĉe malriĉkamparano Nan Tianŝoŭ.

Kvankam Nan Tianŝoŭ estas jam 63-jara, tamen li estas sana kaj fortika. Lia 96-jara patrino afable altablĝis kun ni. Liaj edzino kaj bofilino preparis vesperan manĝon por ni en la kuirejo.

Dum nia interparolado, lia plejaĝa filo envenis kaj diris post saluto: “Ni kernaj milicianoj ĵus kunvenis, tial mi kaj la unua fratino revenas iom malfrue.”

“Antaŭ du jaroj li demobiliziĝis de la armeo kaj nun estas kerna milicano.” Onklo Nan diris en ĝojo: “Antaŭ kelkaj monatoj naskiĝis al ni nepo. Nun kvar generacioj kune vivas en nia domo.”


Baldaŭ la tablo estis plene ŝarĝita per manĝaĵoj. Onklo Nan intime diris: “Estu kiel hejme. Nur simplan manĝon ni preparis por vi.”

La vespermanĝo estis nekutima por ni: blanka rizaĵo en kupraj pelvoj, pladoj da dolĉaj pastoj el glueca rizo, frititaj fiŝoj, diversaj paprikaj peklitaĵoj kaj vianda supo. La komplezo de onklo Nan kaj liaj familianoj sentigis al ni la sinceran amikecon de la koreaj popoloj, kaj tiel senĝene ni interbabilis dum la manĝado, kvazaŭ ni revenus al la longe forlasita hejmo.

Onklo Nan diris: “Mia dua filo armeaniĝis lastjare; la unua filo kaj lia edzino, la unua filino laboras en la brigado. Oni diris ke mi jam estas maljuna, kaj la samlokanoj konsilis al mi ripozi hejme, mi tamen neniam emas ripozi. Ĉiujare post pago de manĝa, vesta kaj aliaj kostoj el la enspezo de nia familio restas 700-800 juanoj. En la lastaj jaroj ni aĉetis biciklon, radioricevilon, brakhorloĝon, kudromaŝinon kaj aliajn.” Ni diris: “Sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio de Ĉinio, la nuna bona vivo de la diversnaciaj laborantaj popoloj ja estas multe pli bona ol tiu antaŭ la Liberiĝo.” Onklino Nan tiam diris: “Antaŭ la Liberiĝo, ni ambaŭ laboregis por bienuloj, sed ni manĝis nur bran-legoman kaĉon kaj dormis sub pajla kovrilo. La suferoj de la malriĉuloj estis sennombraj. Printempe de 1947, Aladi estis liberigita, Prezidanto Maŭ sendis al ni ĈPLA-anojn por helpi nin en batalo kontraŭ bienuloj kaj divido de iliaj kampoj, la malriĉaj koreaj kamparanoj fariĝis mastroj kaj komencis vivi feliĉe. Nun ĉiu familio havas sufiĉe da greno kaj vestoj.”




Virinoj ludas sur salttabulo.



Maljuna kompartiano Pej Juanĝi rakontas al junuloj pri klasa sufero en la malnova socio.

Onklo Nan diris kore: “Prezidanto Maŭ ja bonege prizorgas nin koreajn komunumanojn! Antaŭ du jaroj, la ŝtato helpis nin en konstruado de brikaj loĝdomoj. Ni koreaj popoloj ne forgesos la favoron de Prezidanto Maŭ generacion post generacio!”



La Hodiaŭa Kvartalo Kukurbejo

ŜI HAJ

INTER la laboristaj loĝkvartaloj de Ŝanhajo estas kvartalo nomata Kukurbejo. Se iu unuafoje venas tien, li neniel povas imagi al si, ke antaŭ pli ol 20 jaroj tie estis la mizera kvartalo Kukurbejo.

Antaŭe tiu loko estis nomata Jaŭ-familia Ŝtonponto, loĝpunkto de Ĝabej-distrikto de Ŝanhajo. En 1937, japanaj agresantoj bombadis la lokon kaj ĝi fariĝis ruinejo kun bombkavoj. Poste, malriĉuloj almigris kaj loĝiĝis ĉe tiu loko dense kovrata de herboj. Iu semis kukurbon kaj la planto donis grandan frukton, kiun oni povis vidi de malproksime, tial oni nomis la lokon Kukurbejo.


Antaŭ la Liberiĝo, la nomo de Kukurbejo estis nedisigeble ligita kun sennombraj tragikaj katastrofoj kaj makulita de sango kaj larmo.

La tiama Kukurbejo konsistis el malaltaj malvastaj pajlkabanoj. Tie loĝis pli ol 20,000 homoj. Ĉiu familio havis nur 7-8 kvadratajn metrojn, tiel ke oni eĉ ne povis facile turniĝi en la domaĉoj. En pluva tago pluvetis ankaŭ en la domaĉoj. Tie ne estis pavimita vojo, tial post unutaga pluvo, tri tagojn oni devis vadi nudpiede en koto. En somero, la dekoj da haladzaj kanaletoj fariĝis paradizo de

kuloj kaj muŝoj. Ofte okazis tie, ke infano falis en kanaleton kaj mortis.

En tiu kvartalo estis nek elektro nek akvosistemo kaj eĉ ne estis puto. La loĝantoj devis iri duonkilometron al Suĝoŭ-rivero por porti trinkakvon. En frosta vintro, multaj homoj mortis survoje en nokto pro malsato kaj frosto. En iu vintro, tie mortis 23 sole el la infanoj.

Post la Liberiĝo, la loĝantoj kiuj antaŭe estis ĉifonistoj aŭ almozpetantoj nun laboras en fabrikoj, lernejoj, doko ktp. En la komenca periodo de ekonomia restarigo, la financo de nia lando estis tre malfacila, sed la Partio kaj ŝtato donis monon por plibonigi la vivkondiĉojn de la Kukurbejo. Tegolaj domoj anstataŭis la pajlkabanojn. En la Kukurbejo oni instalas elektran draton, trinkakvajn staciojn, konstruis kloakojn, plenigis la haladzajn kanaletojn, pavimis vojojn kaj plantis arbojn, kaj per tio multe plibonigis la vivmedion kaj vivkondiĉojn de la loĝantoj. En 1963, komenciĝis granda konstruado. Tie estis konstruitaj 35 kvinetaĝaj domoj bone ekipitaj per elektro, akvosistemo, necesaja bezonaĵo kaj gaso. Ne malproksime de la



*Nova fizionomio
de la kvartalo
Kukurbejo*



Familio de Vang Fuking


domoj oni konstruis lernejojn, infanĝardenojn, sanitarajn staciojn, kulturajn domojn, poŝtejon, magazenojn, librejon, grenvendejojn, legombazarojn, razejojn k. a. La loĝantoj vivas en oportunoj kaj faciloj.


En frua mateno, geknaboj kun ruĝa kravato iras saltetante al lernejoj. Laboristoj kaj iliaj familianoj ofte faras sportan kaj amuzan aktivadon en parko, kulturaj domoj kaj kinejoj. La familio de Hua Zajfu estas konvinka ekzemplo pri la ŝanĝiĝo de la Kukurbejo.

Hua Zajfu loĝis 29 jarojn en la Kukurbejo. En la malnova socio, li estis doka portisto kaj spertis ĉiajn ekspluatojn kaj subpremojn de kapitalistoj. Tiam lia familio loĝis en tre malvasta pajlkabano. Sed nun la geedzoj kun sia filo loĝas en du ĉambroj kun areo de 25.3 kvadrataj metroj kaj uzas gason en manĝopreparado. Li laboras en doko kaj ĉiumonate akiras 88 juanojn kiel salajron, krom sia ĝuo de labora protekto. Sed li elspezas ĉiumonate nur malpli ol 8 juanojn kiel lupagon por la du ĉambroj. Antaŭe li havis preskaŭ nenion, sed nun liaj du ĉambroj estas meblitaj per granda kaj mezgranda ŝrankoj kaj skribo-

tablo. Krom tio li havas transistoran tablohorloĝon, biciklon kaj tri litojn. Lia filo lernas en mezlernejo kaj la tri filinoj jam akiris laboron. La unua filino estas dokistino, membro de la revolucia komitato de la Ŝanhaja Buroo pri Havenaj Aferoj; la dua estas metilernanto en gasfabriko; la tria jam loĝiĝis en kamparo responde al alvoko de Prezidanto Maŭ kaj kontribuas sian forton al konstruo de nova socialisma kamparo.

Vang Fuking rakontas al geknaboj pri sia mizera vivo en la malnova socio.





Profunda Amikeco

KOMISIITE de la popolo de nia patrio, ni venis al Tanzanio por konstrui tie tanejon. Tiam al ni mankis ĉarpentisto. Iun fruan matenon, Walik, tanzania laboristo de la konstruejo haste venis en nian kabanon el manglarbaj trunkoj kaj kokosarbaj folioj kaj diris al ni: “Jen venas ĉarpentisto kiun vi bezonas.” Tiam mi vidis post li fortan junulon kun mallongaj krispaj haroj kaj dikaj brakoj. Li senĝene prezentis sin: “Sinjoroj, mi nomiĝas Mechini kaj hieraŭ venis de Pemba-insulo per ŝipo.”

“Bonvenon, amiko Mechini.” Mi altiris du seĝojn kaj petis ilin sidiĝi. “Ni ne estas sinjoroj,” mi diris, “sed fratoj kaj amikoj de la tanzania popolo.” Mechini balancetis la kapon kaj de tempo al tempo pririgardis min per sia paro da grandaj okuloj. Profunde impresis min lia honesteco kaj nefleksiĝemo montrita sur lia vizaĝo.

Mechini estis sendita al la konstruejo de senhariĝejo. Ni tre ĝojis, ke li venis dum nia streĉa konstruado. Li estas tre vigla, faris same kion ni faris, kaj ofte konkure prenis por si danĝeran laboron. Post deĵoro li ofte iris en nian loĝejon por interbabili kun ni aŭ observi sidante apude, kiel ni studas verkojn de Prezidanto Maŭ. La tempo ju pli pasis, ni des pli familiariĝis kun li kaj sciiĝis, ke li havas patrinon kaj fraton laborantan en Dar-es-salaam, kaj lia patro martiriĝis en batalo por renversi la feŭdan dinastion. Ĉifoje, kiam li forlasis Pemba, lia patrino malsanis, sed informiĝinte, ke Ĉinio sincere helpas tanzanian konstruadon, li tuj faris necesan aranĝon por sia patrino kaj venis al ni. Ĉiufoje, kiam Mechini menciis tion, ni estis forte emociitaj. Amikiĝi kun la ĉina popolo deziras ja ne nur Mechini, sed ankaŭ la tuta tanzania popolo.

Kiam pli kaj pli proksimiĝis la Festo de la Januara Revolucio de Tanzanio, la ĉinaj teknikistoj kaj tanzaniaj popolanoj tagnakte ŝvite batalis sur la konstruejo kaj ĉiuj klopodis por la sama celo: Pli frue finkonstrui la tanejon por prezenti ĝin al la festo de revolucio. Iun vesperon, kiam mi kaj

Mechini estis finanta la labordeĵoron, iu portis al Mechini telegramon. Post lego de la telegramo liaj brovoj tuj kuntiriĝis. La telegramo diris, ke lia malsana patrino troviĝas en danĝero kaj volas ke li tuj revenu al Pemba. Mi sciis, ke lia patrino suferis de kormalsano pro subpremo de koloniistoj en la pasinteco, kaj mi diris al li: “Mechini, iom preparu kaj reiru hejmen. Vian laboron ni plenumos. Iru zorgi vian patrinon kaj revenu post ŝia resaniĝo.”

Mechini silentadis. Li rigardis la verdan kokosarbaron apud la konstruejo kaj la altajn gruojn. Subite li returnis la kapon kaj diris: “Frato Ĝang, vi ofte diris al mi, ke estis kuracisto Bethune, kiu venis de Kanado al Ĉinio por helpi ĝin en la Kontraŭjapana Rezistmilito kaj poste oferis sian vivon. Ni devas lerni de lia internaciisma spirito. Nun vi venis de Azio al Afriko por helpi nin en konstruado. Kiam la konstruado bezonas min, mi ne devas foriri, mi restos kaj batalos kune kun vi!” Lia sinteno estis tiel firma, kaj ni nur povis raporti tion al niaj gvidantoj. Post interkonsiliĝo la gvidantoj sendis en la sama punkto ĉinan kuracan grupon al Pemba-insulo por kuraci la patrinon de Mechini.

Kiam mi revenis al la loĝejo, jam noktiĝis. Survoje mi renkontis Mechini. Li diris al mi, ke ĵus per poŝto li sendis monon al la patrino, petis samvilaĝanon venigi kuraciston por kuraci la patrinon kaj skribis leteron al la frato, por ke li revenu al Pemba, kaj li mem povu labori trankvile. Mi diris al li, ke ĉina kuraca grupo jam iris al Pemba. Mechini diris al mi kun granda emociiĝo: “Post resaniĝo de mia patrino mi alvenigos ŝin por ke ŝi rigardu la tanejon kaj la ĉinajn laboristojn alsenditajn de Prezidanto Maŭ!”

En la sekvinta tago, mi kaj Mechini daŭre muntis lignajn muldilojn. Li ne montris malĝojon pro la hieraŭa informo, sed laboris ŝajne pli entuziasme ol antaŭe. En Tanzanio estas tre varme kaj ni laboris ŝvitegante. Kiam nia laboro proksimiĝis al fino, mi rimarkis, ke de sur la skafaldo falis briko kaj ĝi tuj trafos Mechini. Mi saltis antaŭen

kaj forpuŝis Mechini. Sed la briko peze frapis min, mi falis svene kaj estis portita en hospitalon.

Post ekzameno kuracisto diris, ke rompiĝis mia klaviklo. Mia supra korpo estis gipse bandaĝita. Kuŝante en lito mi maltrankviliĝis, ke eble Mechini vundiĝis, kaj pensis pri la streĉa konstruado. Vespere, kamaradoj venis por vidi min kun donaco. Venis ankaŭ Mechini. Ilia amika zorgo varmigis mian koron. Min kortuŝis precipe Mechini ke li restis tiel firma informiĝinte pri la danĝera malsano de sia patrino, sed pro mia vundo, vundo de alilandano tute ne konata por li, li eĉ larmis kiel infano. Kia sincera amikeco!

Dum mia restado en la hospitalo, Mechini venis vidi min ĉiuvespere, spite al vento kaj pluvo. Li

studis kune kun mi verkojn de Prezidanto Maŭ kaj raportis al mi pri la progreso de la konstruado. Vidinte min resaniĝanta tagon post tago, li ridis kiel infano. En la Festo de Januara Revolucio li venis jam posttagmeze kun du kokosoj en unu mano kaj korbo da mangoj, bananoj kaj mandarinoj en la alia mano. Li estis tre ĝoja kaj mi tuj divenis, ke li partoprenis en la hodiaŭa celebrado. Li detale priskribis al mi la celebradon kaj transdonis al mi profundan amikecon de la tanzania popolo al la ĉina popolo. La sunradioj penetris tra la diafana fenestra vualo kaj plenigis la tutan ĉambron. En la malsanula ĉambro estis milde kaj hele. Liaj ardaĵ sentoj infektitis min. Mia sango bolis kaj la penso galopis kvazaŭ ĉevalo: La amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Tanzanio en interhelpo kaj unuiĝa batalo estas pli profunda ol la Hinda Oceano.



ALTPRODUKTAJ HIBRIDIGITAJ SORGO KAJ MAIZO

En scienca eksperimentado, la vastaj amasoj de komunumanoj de nia lando elkulturis altproduktajn kaj bonajn hibridigitajn sorgon kaj maizon kaj multe ilin disvastigis.

En la lastaj jaroj, rapide disvastiĝis hibridigitaj sorgo kaj maizo en nia lando. En 1970, laŭ nekompleta statistiko de 17 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj, la areo de kampoj de hibridigita sorgo superis 600,000 hektarojn. En 1971, ĝi vastiĝis ĝis pli ol 1,520,000 hektaroj, kio okupis kvinonon de la totala areo de sorgokampoj de la tuta lando. Tia sorgo povas elteni sekecon, inundon, salalkalecon kaj malgrasecon de grundo, havas fortajn akomodigemon kaj vivipovon. Ĝi povas garantii stabilan altan produk-

ton en grandarea kulturado, donas frukton je 30-40% pli multe ol ordinara sorgo kaj povas produkti maksimume pli ol 15 tunojn en ĉiu hektaro.

Membroj de la scienca grupo de Kicun-brigado de Hinhian-gubernio de Ŝanhi-provinco faris artefaritan fekundigon al nova specio de sorgo.



Anestezado en Cerba Operacio per Akupunkturo

MATENE je la naŭa horo ni venis en la operaciejon de la Dependanta Hospitalo de Laboristoj, Kamparanoj kaj Soldatoj de la Dua Medicina Kolegio de Ŝanhajo por rigardi, kiel kirurgoj operacios sur la kapo de laboristo Liu Venĉang sub anestezado per akupunkturo. En la operaciejo ni vidis, ke la paciento jam kviete kuŝas sur la operacia stablo.

Je 15 minutoj post la naŭa, la anesteza kuracisto enigis kelkajn arĝentajn pinglojn en certajn punktojn sur la maldekstra orelo de la paciento. Kiam li enigis la kvaran, la paciento diris: “Vi do enigis ankoraŭ unu . . .” La diro mirigis nin. Oni klarigis al ni, ke la kuracistoj jam antaŭe sciigis al la paciento, kiel iros operacio, por ke la lasta povu pli bone kunagi kun la kuracistoj dum la operacio. Post kiam la kvin pingloj estis ĉiuj enigitaj, la kuracisto kontaktis iliajn finojn kun elektra aparato, por ke ili takte tremetadu. Tio anstataŭigis la manan manipuladojn. La anestezisto diris al ni: “Nun mi faras relative fortan eksciton, por ke la paciento ricevu akupunkturajn sentojn de acideco, ŝveliĝo, pezeco aŭ elektrofrapo.” Dume, la aliaj kuracistoj aŭ lavis siajn manojn, aŭ pretigis instrumentojn. La kirurgo, kiu plenumos la operacion, pendigis kelkajn X-radiajn negativojn sur lumekranon kaj ankoraŭfoje faris detalan raporton al respondeculoj de la hospitalo pri la stato de la paciento kaj la procedoj de la operacio.

Liu Venĉang havas tumoron sur frunta cerbobo en la maldekstra flanko. Se oni ne frue forigus ĝin, ĝi kaŭzos paralizon aŭ eĉ morton. La kazo de Liu Venĉang estis iom neordinara. Ĉar tumoron en la dekstra flanko, ordinare, kaŭzas paralizon al la maldekstraj membroj dum tiu en la maldekstra kaŭzas paralizon al la dekstraj. Tamen la tumoron de Liu Venĉang en la maldekstra flanko kontraŭe kaŭzis preskaŭ paralizon al liaj maldekstraj membroj. Tio alportis komplikojn.

La elektra horloĝo montris 50 minutojn post la 9-a. La akupunkturo jam daŭris pli ol duonan horon kaj oni jam povis komenci la operacion. La paciento demandis tiam la ĉefkirurgon: “Ĉu mi kuŝas en konvena pozicio? Ĉu ĝi estas oportuna por via laboro?” La kuracisto jesis.

La ĉefoperaciisto rapide entrancis la haŭton de lia kapo. Du aliaj kuracistoj rapide haltigis la sangadon per elektra kaŭterizado kaj sur la angiaj prem-pinĉiloj flagradis bluaj sparkoj. Ĉiufoje kiam la kirurgo etendis sian manon, flegistino tuj donis al li necesan instrumenton. Ĉiuj kuracaj laborantoj ĉirkaŭ la stablo koncentras sian atenton al la operacio. Iliaj movoj estis tiel certaj, precizaj, lertaj kaj rapidaj kaj ili kunagadis tiel bone kaj konkorde sen ia hezito kaj malakordo.

La kirurgo entrancis la haŭton sur la kapo de la paciento en formo de kvadrato kun 96 kvadrataj centimetroj. Laŭ informo, la haŭto estas plej sentema, kaj tranĉo en ĝin estas plej dolora en operacio, kaj tio estas provo de la sendoloriga efiko de akupunktura anestezo.

Aŭdinte tion, ni demandis la pacieron iom maltrankvile: “Kamarado Liu, kiel vi sentas vin?”

Liu ekridetis kaj diris: “Tre bone, mi havas nur ioman varmosenton en la ventro kaj krome ankaŭ dormemon.” Ĉar estis varmega somero, iu flegistino alportis tason da glacia akvo. La paciento prenis kelkajn glutojn, denove fermis siajn okulojn kaj ripozis kviete. Iu kuracisto diris al ni, ke post kiam ili komencis efektivi la principon de Prezidanto Maŭ kombini la ĉinan kaj okcidentan medicinojn, la hospitalo jam akiris rimarkindan sukceson en akupunktura anestezo.

Je 5 minutoj post la deka, oni jam distrancis la necesan parton de la kaphaŭto. La kuracisto prenis

kirurgan man-drilon kaj konsolis la pacieron:
“Nun mi boros vian kranion. Ne timu.”

Liu Venĉang diris: “Faru tion trankvile. Mi ne timas.”

La kuracisto ekturis la drilon kaj faris kvin truetojn sur la kranio en nur 10 minutoj. Poste, li malfermis rapide la kranion per dratsimila segilo kaj ni ekvidis la meningon plenan je angioj kaj nervoj.

Je 30 minutoj post la 10-a, oni komencis serĉi la tumoron. La kirurgo diris al ni mallaŭte: “Nun estas la vere grava momento. Tie ĉi estas plena je angioj kaj nervoj kaj ĉiu eta neglekto povas kaŭzi akcidenton. Ĝuste nun estas bezonata la kunago de la paciento.”

La kirurgo lerte distranĉis la meningon per delikataj movoj de brodistino kaj rapide trovis la tumoron. Vere streĉa estis tiu momento por la kuracistoj, kiuj ŝvitegis, kvankam la operaciejo estis ekipita per malvarmiga sistemo. Ĉiuj kuracistoj plene koncentris sian atenton al la laboro. La ĉefoperaciisto kaj la du helpantoj forprenis la tumoron per pinĉiloj pecon post peco.

Je 40 minutoj post la 10-a, kiam la operacio estis streĉe farata la pacieron subite atakis epilepsio; li svenis kaj konvulsiis tutkorpe. Vizaĝe al tiu stato, la kuracistoj senhezite faris novan decidon: “Faru urĝan savon laŭ la dua projekto!” Ili aplikis akupunkturajn kvietigajn medikamentojn al Liu Venĉang. Je 50 minutoj post la 10-a, la epilepsio forpasis. La paciento diris, ke li iom sentas malvarmon. Iu flegistino kovris lin per littuko.

La operacio estis streĉe daŭrigata.

Kuracisto diris al ni, ke epilepsio ofte okazas dum operacio al cerbo. Ĝi estas kaŭzita de ektuŝo de nervo dum ektomio de tumor.

Pasis sekundo post sekundo, la kuracisto elprenis la tumoron peceton post peceto el profundo de la kranio per suĉilo. Ĉar la lumo de senombra lampo ne povis atingi tiel profundan lokon, oni starigis alian lampon ĉe flanko.

“La tumoron etendiĝis al la dekstra flanko.” La ĉefoperaciisto sin rektigis kaj profunde elspiris. Sed lia voĉo sonis trankvile, kvazaŭ la nova stato estis en lia antaŭvido. Ili rapide malfermis ankaŭ la dekstran flankon de la kranio. Kiam la lasta peco de la tumoron estis elprenita, la paciento jam kviete endormiĝis. Kiam kuracisto vekis lin, li demandis: “Kioma horo estas nun?” La kura-



Sukcesis la operacio de elpreno de cerbotumoro.

cisto diris al li: “50 minutoj post la 12-a. La tuta tumoron estas jam elprenita.”

La kuracisto petis la pacieron, ke li movu sian dekstran piedon. Ĝi moviĝis bone. La kuracisto petis tiam, ke la paciento movu ankaŭ la maldekstran piedon. Ankaŭ ĝi moviĝis bone. La kuracisto montris sian fingron al la paciento kaj la lasta diris, ke li bone vidas ĝin. La kuracisto diris: “Neniu nervo estas difektita. Nun ni povas kunkudri la vundrandojn.”

Tiam, la anesteziisto denove intensigis tremetadon de la pingloj. Laŭ lia klarigo, “kunkudro de la kaphaŭto estas ankoraŭ pli dolora ol la tranĉado. En la pasinteco, iuj pacientoj eĉ ne povis ĝin elteni. Post esploro ni trovis, ke nervoj havas ‘inertecon’. Se oni daŭre ĝin stimulas fortege per akupunkturo, ties sendoloriga efiko fariĝas ne tiel bona, kiam oni volas plialtigi ĝin je la fino de la operacio. Por ke forta ekscito bone efiku nun, ni faris malfortan eksciton dum la meza parto de operaciado.”

Je 40 minutoj post la 13-a horo, la tuta operacio finiĝis. La paciento estis en bona spiritostato.

Pli ol dudek tagojn post la operacio, ni denove iris al la hospitalo por vidi Liu Venĉang. Tiam li estis lernanta kune kun aliaj pacientoj. Ekvidinte nin, Liu Venĉang manpremis kun ni renkonte kaj kun tia forto, ke doloretis al ni la manoj. Li diris ĝoje: “Jen forto denove venis al mi, ĉu ne? Mi povos fari ree stablajn metallaborojn kaj bone labori por la Partio.”



Nova Laboro de Grenvendejo en Profundaj Montoj

EN profundaj montoj de norda Guanghi-a Ĝuang-nacia Aŭtonoma Regiono estas multe laŭdata Bahie-grenvendejo de Duntong-komunumo de Sangiang-a Dong-nacia Aŭtonoma Gubernio, kie loĝas dong-, mjaŭ-kaj han-nacianoj. En la grenvendejo laboras nur 3 homoj de la nacioj Mjaŭ kaj Han, sed ili tre bone servas al la lokaj loĝantoj.

Iun fruan matenon, iu frapis je la pordo de la grenvendejo. Laboranto malfermis la pordon kaj trovis, ke unu dong-nacia avino staras ekstere. Ŝi estas malriĉkampanino de proksima brigado. Ŝia nepo akre tuis kaj ŝi volis aĉeti botelon da kontraŭtusa siropo. Tiu kamarado donis al ŝi la siropon. La avino multe lin dankis kaj kontente foriris.

Kial oni aĉetas de la grenvendejo medikamenton? Ĉar krom greno la grenvendejo vendas ankaŭ ĉiutagajn bezonaĵojn al la loĝantoj. De oleo, salo, vinagro kaj aliaj kuiraj necesajoj ĝis skribiloj, paperoj kaj ofte uzataj medikamentoj, sume pli ol 40 varojn ili liveras.

Sed en komenco la grenvendejo ne vendis tiujn varojn. En septembro de 1970, iu komunumano tie aĉetis grenojn kaj poste volis ankaŭ alumeton. Sed li bone sciis, ke la vendejo tion ne havis. Li murmuris al si mem: "Kiom bone estus, se la grenvendejo vendas ankaŭ aliajn ofte uzatajn varojn! Tiam oni ne bezonus iri longan vojon por aĉeti ilin."

La vortoj altiris atenton de k-do Vu Tianlong, estro de la grenvendejo. Li pensis, ke en profundaj montoj la loĝantoj loĝas tre dise kaj la trafiko estas malfacila. Por ion aĉeti oni devas iri longan vojon. Tio ne nur bezonas tempon, sed ankaŭ malhelpas la revolucion kaj produktadon. Se nia vendejo liveros ankaŭ iom da ofte uzataj varoj, tio multe favoras al la amasoj.

Vu Tianlong diris sian opinion al la aliaj du kamaradoj. Unu el ili konsentis, sed la alia malsame opiniis. Tiam Vu Tianlong kaj la du kamaradoj kune lernis la instruon de Prezidanto Maŭ "konsideri ĉion pro la interesoj de la popolo" kaj diskutis pri tio, ĉu eblas por ili vendi aliajn varojn en loko sen magazeno. Post diskuto ili konis ke laŭ pro-

fesio la laboro estas limigita, sed servi al popolo ne. Se la popolo bezonas kaj ekzistas ebleco, oni devas klopodi por tio. Estas vere, ke en la grenvendejo la manoj ne estas multaj, sed ekzistas ebleco por vendi ion alian. Kaj krome, tian servon la popola amaso tre bezonas.

Kiam ili venis al la sama opinio, ili tuj pretigis varojn kaj aranĝis necesan lokon. Post kelkaj tagoj la grenvendejo komencis vendi al la amasoj varojn. La tri laborantoj pensis same kaj laboris energie. Tial kvankam la laboroj pli-multiĝis, sed ili estis pli bone faritaj. Per tio la vendejo solvis multajn malfacilojn por la amasoj, akcelis la revolucion kaj produktadon kaj akiris varman laŭdon de la komunumanoj.

La Horaro de Radio Pekino

(En Esperanto)

Pekina Tempo	GMT	Al Regionoj	Ondoj(m)
	Vendredo kaj Sabato 20:00—20:30	Eŭropo	47 45 31 25
Sabato kaj Dimanĉo 19:00—19:30		Japanio, Koreio	47 40
Sabato kaj Dimanĉo 20:30—21:00		Sudorienta Azio	25 19



KURANTAJ AFEROJ

ABUNDA RIKOLTO DE KOKONOJ

Hanggiahu-ebenejo, fame konata produkto de kokonoj de Ĝegiang-provinco, akiris abundan rikolton de kokonoj en 1971. La produktokvanto de printempaj kaj someraj kokonoj de ĝiaj 10 gubernioj rompis la plej altan rekordon post la Liberiĝo. Tiu kvanto estas je 70% pli granda ol tiu de 1965 kaj estas 5-oblo de tiu en la komenca periodo post la Liberiĝo.

En la disvolvo de kokona produkto kaj morusa kulturado, la gubernioj praktikis sciencajn metodojn kaj senĉese disvastigis novajn altproduktajn kaj bonajn specojn. Samtempe ili senĉese plibonigis metodon de kokonproduktado kaj per tio kreis favorajn kondiĉojn por riĉa rikolto de kokonoj.

DISVOLVIĜO DE FIŜBREDADO EN HINGIANG

La Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono utiligas lagojn kaj akvokonservejojn por aktive disvolvi fiŝbredadon. Krom la pli ol 20 specialaj fiŝbredejoj, ankaŭ armeaj kultivejoj, ŝtataj kultivejoj kaj gubernioj, municipoj kaj popolaj komunumoj bredas fiŝojn.

En la dekkelkaj riveroj kaj pli ol 40 lagoj de Hingiang, vivas multaj specoj de fiŝoj. En Burultokaj-lago kaj Irtis-rivero en la malvarma regiono de Altaj-montaro abundas lojtoj, karpoj, ezokoj kaj sturgoj; en Bosteng-lago de suda Hingiang abundas grandaj grasaj moruoj kaj pintbuŝaj fiŝoj. Burultokaj-lago ĉiujare liveras pli ol mil tunojn da fiŝoj kaj sur Bosteng-lago motoraj velŝipoj fiŝkaptas per troloj. Per ĉiu ĵeto de trolo oni povas kapti 500-1,000 kilogramojn da fiŝoj. Ne nur kamparanoj, sed ankaŭ urbanoj povas akiri fiŝojn.

Membroj de Vejdong-brigado de Gaŭĝaŭ-komunumo de Ĝiaĥing-gubernio, Ĝegiang kolektas kokonojn.



Tajvan Deantikve Estas Sankta

Teritorio de Ĉinio

TAJVAN estas la plej granda insulo en la maro sudoriente de nia lando. En tre antikva tempo Tajvan jam havis intiman kulturan kaj ekonomian rilaton kun la ĉeftero de Ĉinio. En la jaro 230-a p. K., nome en la epoko de la Tri Regnoj, la reĝlando Vu ekspedis generalojn Vej Ven kaj Ĝuge Ĝi kun pli ol 10,000 soldatoj sub ilia komando al "Jiĝou". "Jiĝou" ja estas la nuna ĉina provinco Tajvan. Dum la dinastio de Suda Song en la 12-a jarcento, Penghu-insularo jam submetiĝis al Gjang-gubernio de Fugian-provinco kaj fariĝis jurisdicia distrikto de Ĉinio. Meze de la 13-a jarcento, la tiama registaro de Juan-dinastio establis en Penghu civilan registaran oficejon super Tajvan kaj aliaj insuloj, kaj ĝi estis sub la gubernio Tong-an de la regiono Kjuanĝou. De tiam, Tajvan oficiale fariĝis konsistiga parto de la teritorio de Ĉinio.

Ekde la dinastio Ming, Tajvan kaj Penghu-insularo jam fariĝis grava strategia regiono en defendo de nia marbordo. Nur en la 16-a jarcento okcidentaj koloniistoj komencis konkurenci unu kontraŭ alia sur la maroj en la oriento. En tio partoprenis ankaŭ Japanio. En 1557, Portugalio okupis Aŭmen de nia lando kiel sian bazon kaj poste deklaris, ke Tajvan dependas de Aŭmen, kun la intenco okupi la insulon. En la 17-a jarcento, la hegemonio sur la maroj transiris en la manojn de nederlandaj kaj britaj koloniistoj, kaj ne realiĝis la intenco de portugalaj koloniistoj okupi Tajvan. En 1624 kaj 1626, la eŭropaj koloniismaj landoj Nederlando kaj Hispanio okupis respektive Tajvan kaj Gilong de nia Tajvan-provinco kaj, uzante ilin kiel centrojn, disvastigis siajn agresajn aktivadojn. Tajvan de nia lando estis unufoje forrabita. Depost tio, la du agresantoj komencis en la norda parto de Tajvan intensan batalon por okupi la provincon Tajvan. En 1642, la hispanoj estis venkitaj kaj foriris de la insulo. En la fina periodo de Ming-dinastio, la nacia heroo Ĝeng Ĉengong iris en Tajvan kun potencaj trupoj sub sia komando kaj,

sub la helpo de la popolo de Tajvan, elpelis la nederlandajn agresantojn kaj reprenis Tajvan. En 1684, la registaro de King-dinastio establis Tajvanan "fu"* kaj subordigis ĝin al la Tajvan-Hiamen-a "daŭ"* de Fugian-provinco. En 1885, Tajvan oficiale fariĝis unu el la jurisdiciaj provincoj de nia lando.

Dum pli ol 1,000 jaroj, ĉefe la transloĝiĝintoj el niaj apudmaraj provincoj Fugian kaj Guangdong kaj la popolanoj de la frata ĝaŝan-nacio en Tajvan ekspluatis Tajvan kune. Nun, plejparto de la loĝantoj de Tajvan parolas sud-fugian-an dialekton kaj Kegia-dialekton de Guangdong-provinco. La supre menciitaj historiaj faktoj pruvas: Tajvan delonge jam apartenas al Ĉinio kaj fariĝis nedisigbla parto de la sankta teritorio de nia lando; la nacio Ĝaŝan en Tajvan-provinco estas unu el la nacioj de nia lando kaj la sampatrianoj en Tajvan estas konsistiga parto de la granda popolo de Ĉinio.

Ekde la mezo de la 19-a jarcento, post la Opia Milito, imperiismaj potencoj, precipe la usona kaj japana imperiismoj, ĉiam avidis nian riĉan provincon Tajvan kaj senĉese intensigis sian agresan aktivadon intencante kapti Tajvan kaj fari ĝin transira tabulo por plue agresi la ĉefteron de Ĉinio. Post la Ĉina-Japana Milito en 1894, la putra registaro de King-dinastio subskribis la neegalrajtan "Simonoseki-an Traktaton", pro kio Tajvan-provinco estis maljuste okupita de la japana imperiismo. Dum la 50 jaroj de kruela koloniisma regado de la japana imperiismo, neniam ĉesis la batalo de niaj sampatrianoj en Tajvan por reveni en la sinon de la Patrio. Ili batalis malcedeme kaj senĉese unuj post aliaj spite al morto. Ili faris longdaŭrajn heroajn batalojn kontraŭ la japanaj imperiistoj-okupantoj. Okazis pli ol 20 insurekcioj kun relative granda skalo, inkluzive de la heroa leviĝo de la popolo de Ĝaŝan-nacio en Tajgong, kaj martiriĝis centmiloj da homoj. Pri tio, eĉ la Usona Ŝtata Departemento ne povis ne konfesi en sia

blanka libro «Usonaj Rilatoj kun Ĉinio»: “Dum 50 jaroj la loĝantoj de Tajvan troviĝis sub la regado de alilandaj okupantoj, tial ili bonvenigis la ĉinajn fortojn kiel liberigantojn. Dum la japana okupado la ĉefa espero de la popolo estis reunuiĝo kun la ĉeftero.”

Ĝuste sur la bazo de la fakto, ke Tajvan deantike estas teritorio de Ĉinio, la Kaira Deklaracio subskribita de Ĉinio, Usono kaj Britio, je la 1-a de decembro de 1943, klare difinis, ke la ĉinaj teritorioj uzurpitaj de Japanio, kiaj Manĉurio, Tajvan, Penghu-insularo k. a., devas esti redonitaj al Ĉinio. La 8-a artikolo de la Potsdama Proklamo por akceli Japanion kapitulaci senkondiĉe, publikigita de Ĉinio, Usono kaj Britio en la 26-a de julio de 1945, poste konsentita ankaŭ de Sovetunio, denove konfirmis, ke “la kondiĉoj de la Kaira Deklaracio nepre devas esti plenumitaj kaj la japana suvereneco estos limigita en la insuloj Honŝu, Hokkaido, Kiuŝu, Ŝikoku kaj tiuj malgrandaj insuloj kiujn ni determinas.” La 14-an de aŭgusto de 1945, Japanio estis venkita kaj proklamis senkondiĉan kapitulacion. En la 25-a de oktobro de la sama jaro, laŭ la difinoj de la Kaira Deklaracio kaj Potsdama Proklamo, la tiama ĉina registaro aranĝis en Tajbej akceptan ceremonion de la kapitulaco de la japanaj trupoj en Tajvan, tiel Tajvan fine revenis en la sinon de la Patrio. De tiam Ĉinio restarigis sian suverenecon super Tajvan-provinco.

La antaŭa prezidanto de Usono Truman konfesis en sia deklaro pri Tajvan en la 5-a de januaro de 1950: La celo de la Kaira Deklaracio kuŝas en tio, ke la ĉinaj teritorioj uzurpitaj de Japanio, kia estas Tajvan, estu redonitaj al Ĉinio. “Kapitulacante ankaŭ Japanio akceptis la difinojn de la deklaro. . . . Dum la pasintaj 4 jaroj, Usono kaj la aliaj aliancaj landoj ankaŭ rekonis la suverenecon de la ĉinaj aŭtoritatoj super la insulo.” La 9-an de februaro de la sama jaro, en la publika respondo al la Komisiono de Eksteraj Aferoj de la Usona Domo de Reprezentantoj pri la problemo de Tajvan la Usona Ŝtata Departemento diris, ke de post la kapitulaco de la japanaj trupoj en Tajvan al Ĉinio, Tajvan estas administrata de Ĉinio; “ĝi estis inkluzivita de Ĉinio kiel unu provinco. . . . La aliancaj landoj, kiuj partoprenis en la milito kontraŭ Japanio, ne elmetis dubon pri tiuj paŝoj. Ankaŭ la usona registaro ne elmetis dubon pri tiuj paŝoj, ĉar ili evidente konformis al la promesoj donitaj en Kairo kaj denove rekonitaj en Potsdam. Alivorte, la aliancaj landoj inkluzive Usonon, en la pasintaj 4 jaroj jam rigardis Formoson (nome la provincon Tajvan de Ĉinio — La Red.) kiel parton de Ĉinio.”

La supre menciitaj faktoj pravas, ke Tajvan estas nedisigebla parto de la teritorio de Ĉinio, tiel laŭ ĝia historio kiel laŭ ĝia nuna stato. Tajvan jam estis tute redonita al Ĉinio, post la kapitulaco de la japana imperiismo kiel venkito en la Dua Mondmilito. La Ĉina Popola Respubliko havas plenan suverenan rajton super ĝi. Ke la kliko de Ĉiang Kajŝek delonge elkraĉita de la ĉina popolo povas barakte vivi en Tajvan, tio estas kaŭzita sole de la usona registaro. Por atingi sian celon de agreso, Usono agis en tia memkontraŭdira maniero tute ignorante internacian kredindecon kaj tretis internaciajn kontraktojn de ĝi subskribitajn. En la 25-a de junio de 1950, Usono komencis agresan militon kontraŭ Koreio kaj tuj poste, en la 27-a de la sama monato, la antaŭa prezidanto de Usono Truman senskrupule ordonis la Sepan Floton de Usono eniri en la regionon de la Tajvan-a Markolo, perforte okupis la ĉinan teritorion Tajvan kaj metis la klikon de Ĉiang Kajŝek sub la protektadon de la usona bazoneto. Samtempe kun tio, Truman perfide kaj arbitre proklamis, ke la difino de la estonta pozicio de Tajvan “devas atendi ĝis la restarigo de sekureco sur Pacifiko”. De tiam, en koluzio kun la fortoj de la japana militarismo, Usono fabrikis kaj disvastigis la absurdajn dirojn kiel “la pozicio de Tajvan restas nedifinita” kaj la suvereneco super Tajvan estas “nedecidita”, kaj subinstigis kaj manipulis plenmanon da elementoj kreantaj “sendependan Tajvan” fari intrigajn aktivadojn de “movado por sendependiĝo de Tajvan”, kun la intenco apartigi Tajvan for de la teritorio de Ĉinio kaj longe okupi ĝin por turni ĝin en militan bazon en plua agreso kontraŭ la ĉeftero de Ĉinio kaj aliaj aziaj landoj. Tio estas neniel tolerebla por la ĉina popolo kaj ankaŭ por la personoj, kiuj persistas ĉe justeco kaj respektas internaciajn interkonsentojn.

Frue, en la 28-a de junio de 1950, Ĉefministro Ĝou Enlaj publikigis deklaron, en la nomo de la ĉina registaro, kiu montris: la proklamo de Truman kaj la agoj de la usona mara armeo “signifas armitan agreson kontraŭ la teritorio de Ĉinio kaj ĝisfundan detruon al la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj”. La deklaro solene proklamis: “La tuta popolo de nia lando batalos unuanime ĝis la fino por liberigi Tajvan el sub la okupo de la usonaj agresantoj.” Certe bankrotos ĉia ajn maĥinacio de Usono kaj certe venkos la justa afero de la ĉina popolo.

*“Fu” kaj “daŭ” estas administraj unuoj de Kingdinastio.

Certe Bankrotos la Intrigo de la Usonaj kaj Japanaj Reakciuloj

LA usonaj kaj japanaj reakciuloj daŭre komplotas por elkovi "sendependan Tajvan", kun la vana espero detranĉi nian Tajvan-provincon por ĉiam kaj efektiviĝi sian frenezan ambicion longe okupadi ĝin.

La 16-an de oktobro de 1971, ĉirkaŭ 300 uloj kreantaj "sendependan Tajvan" kaj japanaj dekstraj reakciuloj kunvenis en Hibija-parko de Tokio kaj freneze kriis: "Sendependiĝu Tajvan". Post la kunveno, ili faris t. n. "manifestacion" en trafikoplena kvartalo de Tokio, kondukate de japanaj policaj aŭtoj kaj protektate de japanaj policanoj. Ili freneze kriis: "Tajvan ne estas ĉina teritorio", "Unu Tajvan kaj unu Ĉinio" kaj "Lasu la loĝantaron de Tajvan fari memdecidon". Tio plene malkaŝis la ambicion de japanaj reakciuloj, kiuj manipulas la t. n. "movadon de sendependiĝo de Tajvan" kun la vana espero okupadi nian sanktan teritorion Tajvan. Antaŭ la "manifestacia" farso, la militkrimulego Nobuske Kiŝi, frato de la japana ĉefministro Eisaku Sato, gvidis kiel konsilanto 42-membran japanan delegacion por fi-vizito al nia Tajvan-provinco de la 6-a ĝis la 9-a de oktobro. La celo de lia vizito estis fari novan paŝon en koluzio kun Ĉiang Kajŝek. Senskrupule li distrumpetis, ke Japanio kaj Ĉiang-kliko disvolvos siajn "amikajn kaj kunlaborajn rilatojn" kaj "firme manpremos" en kuna oponado kontraŭ komunismo. Japanaj reakciuloj ripetfoje kriis, ke "la pozicio de Tajvan ankoraŭ restas nedifinita". La 8-an de oktobro, Eisaku Sato kriis: "La rilatoj inter Japanio kaj Tajvan estas nerompeblaj."

De multaj jaroj, Usono kaj Sato-registaro de Japanio kaŝe kaj publike kovadas kriman intrigon por kreo de "sendependa Tajvan". La japana

gazeto «Ŝukan Gendaj» malkaŝis, ke Douglas Mendel, agento de la usona Centra Informa Agentejo, kiu havas intimajn rilatojn kun Peng Ming-min, elemento klopodanta por "sendependa Tajvan", iris al Japanio en aŭgusto de 1971 por koluzii kun iu japano nomata Kagehisa Tojama. Ili kunvenis kun la gvidantoj de diversaj organizoj en Japanio, kiuj inspiras krei "sendependan Tajvan", en Okura-hotelo en Minato-kvartalo de Tokio. En tiu "komuna kunveno" ili ellaboris planon por intensigi intrigajn aktivadojn. Samtempe, la "Ligo por Sendependiĝo de Tajvan", kies ĉefa oficejo sidas en Usono, senhonte diris en sia "novaja komunikilo" de la 2-a de aŭgusto 1971: "Ni kredas, ke la politiko de 'unu Tajvan kaj unu Ĉinio' . . . estas plej konforma al la realo, plej bona kaj plej favora al la Unuiĝintaj Nacioj, Usono kaj la popolo de Tajvan." Ankaŭ artikolo lastatempe publikigita en la organo de la t. n. "Ligo por Sendependiĝo de Tajvan" eldonata en Japanio kriis, ke nun "estas la lasta kaj bona oportuno por sendependiĝo de Tajvan".

La usonaj kaj japanaj reakciuloj songas fabriki altruditan realaĵon de "sendependa Tajvan" por atingi sian kriman celon longe okupi nian sanktan neatenceblan teritorion Tajvan-provincon. Tio estas absolute netolerebla por la ĉina popolo.

La 20-an de aŭgusto de 1971, la Ministerio de Eksteraj Aferoj de la Ĉina Popola Respubliko solene deklaris: La popolo kaj registaro de Ĉinio firme oponas kontraŭ "du Ĉinioj", "unu Ĉinio kaj unu Tajvan" aŭ similaj absurdaj pledoj, firme oponas kontraŭ la absurda aserto, ke "la pozicio de Tajvan restas nedifinita" kaj firme oponas kontraŭ la intrigo por "sendependa Tajvan". Tiu ĉi justa starpunkto de la ĉina registaro estas neŝancelebla.

**LA USONA REGISTRARO DAŬRE
KOVAS INTRIGON POR KREI
“SENDEPENDAN TAJVAN”**

Post kiam la 26-a Sesio de la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj pasigis la projektan rezolucion de Albanio, Alĝerio kaj aliaj 21 landoj, la usona registaro ne voluntas ĉesi je sia malvenko kaj pli intense antaŭenpuŝas sian intrigon por krei “unu Ĉinion kaj unu Tajvan” aŭ “sendependan Tajvan” kun la vana espero plue perforte okupa-di nian teritorion Tajvan-provincon.

La 26-an de oktobro 1971, grava membro de la usona registaro okazigis akceptan kunvenon de ĵurnalistoj en Vaŝingtono, en kiu li proklamis, ke la usona politiko al Ĉiang Kajŝek-kliko ne estos influita de la voĉdono de la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj. Li proklamis, ke Ĉiang Kajŝek-kliko elpelita el la Unuiĝintaj Nacioj “daŭre estos respektata valora membro de la internacia komunumo, kaj la interligo inter ni (Usono kaj Ĉiang-kliko) restos neinfluita de la agado de la Unuiĝintaj Nacioj”. Kaj li proklamis, ke la usonaj “defendaj aranĝoj” kun Ĉiang Kajŝek estos daŭrigataj.

La 27-an de oktobro, iu usona senatano eĉ absurde pledis por “plebiscito” en Tajvan, por ke iutage efektiviĝu “memdecido” en Tajvan, kaj tiam ĝi povos esti akceptita de UN kiel “sendependa lando”.

Kvankam la usonaj kaj japanaj reakciuloj pli intense kovas la intrigon por krei “sendependan Tajvan”, tamen nur plenmano da perfiduloj de la ĉina nacio sin okupas pri kreo de “sendependa Tajvan” sekvante tiujn reakciulojn. La vasta popolo de Tajvan amas la socialisman patrolandon. Ili sopiras fruan liberiĝon de Tajvan kaj reveni en la sinon de la patrolando. La justamaj landoj kaj vastaj popoloj de la mondo simpatias kaj subtenas la ĉinan popolon en ĝia liberiĝo de sia teritorio Tajvan-provinco. La usonaj kaj japanaj reakciuloj vane klopodas apartigi niajn samlandanojn en Tajvan disde la granda ĉina popolo kaj detranĉi

La intensa antaŭenpuŝo de “sendependa Tajvan” fare de la usona registaro estas daŭrigo de ĝia intrigo de persistado en malamikeco kontraŭ Ĉinio kaj kreado de “du Ĉinioj”. Tion neniam permesos la ĉina popolo.

**EISAKU SATO SEKVAS LA USONAN REGIS-
TARON EN KREO DE “SENDEPENDA
TAJVAN” KUN LA VANA ESPERO DENOVE
OKUPI LA ĈINAN TERITORION
TAJVAN-PROVINCON**

La 26-an de oktobro 1971, en la parlamento japana ĉefministro Eisaku Sato plue ludas la intrigon de “du Ĉinioj” dum respondo al interpelacio. Li kriis, ke “en Ĉinio ekzistas du registaroj” kaj la kontraŭleĝa japana-Ĉiang-a traktato inter la japanaj reakciuloj kaj Ĉiang Kajŝek-kliko “ne devas esti simple nuligita”. En la sama tago, la televida stacio de la Japana Disaŭdiga Asocio regata de la japana registaro tuj kolektis nombron da reakciaj literaturistoj al televida forumo por fabriki reakcian publikan opinion por la intrigo de Eisaku Sato en kreo de “unu Ĉinio kaj unu Tajvan” per agitado por starigo de “Tajvan-a ŝtato”.

La aktivado de la japana reakciularo en kreo de “sendependa Tajvan” kaj obstina malamikado kontraŭ la ĉina popolo estas tute kontraŭa al la volo de la vasta japana popolo. Kaj ĝia intrigado neniam efektiviĝos.

Tajvan-provincon disde la sankta teritorio de Ĉinio. Aparte atentinde estas, ke post kiam la 26-a Sesio de la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj aprobis per superega plimulto da voĉoj, en la 25-a de oktobro de 1971, la projektan rezolucion kune elmetitan de Albanio, Alĝerio kaj 21 aliaj landoj, la usonaj kaj japanaj reakciuloj ankoraŭ ne rezignis sian intrigon pri “unu Ĉinio kaj unu Tajvan” kaj “sendependa Tajvan”. Sed la historio estas senkompata. Kian ajn intrigon la usonaj kaj japanaj reakciuloj ludos, ili certe trafos ankoraŭ pli tragikan fiaskon.



SKRIBIS BRITA LEGANTO D.S.L.

Mi kore gratulas vin pri la enhavo de numero 10 de la jaro 1971, tio estas, pri la decido enmeti artikolon kaj fotojn de la nove elfositaj historiaj restaĵoj. Dum sufiĉe longa tempo multaj viaj legantoj atendadis la aperon de tia artikolo. Ankaŭ de granda intereso estis tiu pri akupunkturo.

La kialo estas, ke, kiel antaŭ kelke da jaroj mi skribis al vi, via lando, viaj artoj nuntempaj, viaj metioj kaj via vivmaniero estas ofte preskaŭ absolute nekonataj, kaj la legantoj de EPC

volas konatiĝi kun la ĉina popolo ne sole en politika rilato, sed ankaŭ en rilato hom-al-homa.

Mi do petegas al vi ke vi aperigu artikolojn pri la butikoj, la tipaj manĝoj, la flankokupoj k. t. p. de nuntempa Ĉinio. De plej granda intereso estis viaj artikoloj pasintece pri la opero, sed ĉu ni povas nun anticipi informojn pri moderna pentrarto, skulptoj, poezio — fakte ĉiuj artoj? Sporto ne estas la sola komuna bazo inter ni kaj vi.

SKRIBIS FINNLANDA LEGANTO J.V.

Mi havas sur mia tablo vian plej novan gazeton (n-ro 10, 1971). Laŭ mia opinio ĝi estas la plej bona ĝis nun. Mi regule ricevadis ĝin dum kelkaj jaroj. Nun via gazeto fariĝis varia kaj tre interesa tiel, ke ĉiu leganto certe trovas por si interesajn artikolojn. Mi kredas, ke la

gazeto, kiu estas sendata al multaj, multaj diversaj homoj, devas enhavi ankaŭ multajn diversajn artikolojn, por ke ĉiu leganto trovas ĝin varia kaj interesa. Vi nun sukcesis, mi kredas.

La preskvalito — koncerne la paperon, presmanieron kaj la bildojn — estas alta. Kolorbildoj eĉ luksaj. Precipe mi admiras kaj ŝatas viajn belegajn pejzaĝojn.

Via gazeto ankaŭ klare montras, ke vialanda junularo estas feliĉa kaj tre sana, tiel korpe kiel spirite. En la bildoj de via gazeto ne estas videblaj junul(in)oj kun la tabako inter la lipoj. Nur kelkaj maljunuloj plu uzas tiun malbonan okcidentan kutimon. Mi gratulas vin pro via admirinda junularo. Oni diras, ke en la junularo estas la estonteco de popolo. Via estonteco estas garantiata pere de via sana, forta kaj laborema junularo.



BATALO KONTRAŭ KRONIKA TRAĤEITO DE MALJUNULOJ

Amasa laboro por batali kontraŭ kronika traĥeito de maljunuloj disvolviĝas en nia lando. Pli ol 7,900 preventaj kaj kuracaj grupoj kun pli ol 74,000 medicinaj, higienaj kaj sciencaj laborantoj estas senditaj de ĈPLA kaj lokaj instancoj al vilaĝoj, fabrikoj, minejoj kaj loĝkvartaloj, kune kun tieaj medicinaj laborantoj, por doni kuracon al pli ol kvincent miloj da suferantoj de ĉi tiu malsano. La kuracado akiris diversgradajn sukcesojn por la plejparto de kronikaj traĥetituloj, el kiuj iuj estas fundamente resanigitaj. Ili mobili-

zis la amasojn kolekti pli ol cent mil popolajn receptojn kaj kuracilojn por preventi kaj kuraci kronikan traĥeiton de maljunuloj. La kuracaj, higienaj, scienc esploraj kaj farmaciaj institucioj ripetade provis multajn receptojn kaj kuracilojn en kliniko kaj elektis el ili iujn kuracilojn kun relative bona efiko. Ili plie faris ekstrakton al iuj kuraciloj por plialtigi la kuracefikon.

RIĈA RIKOLTO DE JUNNANA TABAKO

En Juhi-regiono de Junnan-provinco, la totala produktokvanto de Junnana tabako en 1971 estis je 43.2% pli granda ol tiu en 1970, kaj ankaŭ ĝia kvalito estas evidente plibonigita.

La tabako produktita en Juhi-regiono estas orflava, glacea, sukerrika, delikate aroma kaj bonvena al la merkato en kaj ekster la lando.

KVIN FILOZOFIAJ VERKOJ DE PREZIDANTO MAŬ

(En Esperanto)

La kvin verkoj estas:

Pri Praktiko

Pri Kontraŭdiro

**Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo
Parolado en la Tutlanda Konferenco de la Komunista Partio de
Ĉinio pri Propaganda Laboro**

De kie Venas la Korektaj Ideoj de la Homo?

Formato 12.7×8.9 cm, kun ruĝa plasta kovrilo

BILDLIBRO «MINA MILITO»

(En Esperanto)

«Mina Milito» estas redaktita laŭ la samtitola filmo. La libro priskribas, kiel la popolamasoj de Ĝaŭgiaĝuang-vilaĝo de iu kontraŭjapana bazo de Ŝandong-provinco de Ĉinio brave batalis kontraŭ agresantoj sagace uzante minojn sub la gvido de la Kompartio. La libro montras senkomparan potencon de popola milito kaj prikantas la brilan penson de Prezidanto Maŭ pri popola milito.

Kun 178 bildoj, formato de 18.4 × 13 cm.

Eldonitaj de la Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio

Distribuas la Libro servo de la Ĉina Esperanto-Ligo,

P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

(Aĉetebla ankaŭ ĉe ĉiuj perantoj en diversaj landoj)

Sur la Kovrilo:

Amikoj de Siera-Leono, Sudano kaj Sirio partoprenantaj la Tablotenis Amikecan Invitan Turniron de Azio kaj Afriko rigardas artan programon kune kun ĉinaj kamaradoj en la Ĉefurba Sporta Halo.

Sur la Dorskovrilo:

Knabino-tablotenisistino de Togolando kaj ĉinaj geknaboj en amuza kunveno

Korespondi Deziras

*Lukackova Anna, Jacovce 384, okr. Tapalcany, CSSR, kun amikoj de la tuta mondo.

*"Guto en Maro", Esperanto-rondo de gejunuloj, ekonomia liceo, Nowy Sacz, ul. Grodzka 34, Pollando, konstante serĉas novajn gekorespondantojn por spertaj kaj komencantaj gelernantoj 15-19j.

*Jindrich Tomisek, Rikovice 67, okr. Prerov, CSSR, kun ĉl. pri ĉt.

*Tiuj, kiuj dez. kor. kun japanaj espistoj, skribu al la peranto: Japana Esp. Korespondo-Servo, ĉe KLEG, (531) Oyodoku, Nakatu-hamadori 3-10, Osaka, Japanio.

*Dez kor. pri Esperanto stenografisistemoj, originalaj kaj adaptitaj Friedrich Dunisch, Neilreichgasse 95-2-1, Vieno 1100, Aŭstrio.

*Bonvolu noti jenan novan adreson: Y.K. Kuiler, c/o Claremont Hospital, P.O.Box 104, Daviesroad, Claremont, West Australia.

EL POPOLA ĈINIO

人民中國報

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO

P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

N-ro 1 (162) 1972

Ĉefa Enhavo

Plena Sukceso de la Tablotenisa Amikeca Invita Turniro de Azio kaj Afriko	1
Amikeco Disfloras en la Tablotenisa Sporto de Azio kaj Afriko	4
Venki la Flavan Riveron	15
Ŝangĝo de Ali	21
Houhang-brigado Avangardiĝis	24
Intelektaj Gejunuloj en Kamparo	26
Floroj de Venko Pompas Pare en Prospero	29
Rejuniĝo de Kajluan-karbominejo	31
Pli kaj pli Boniĝas la Vivo de Nia Popolo	34
Vizito al Nova Vilaĝo de Korea Nacimalplimulto	38
La Hodiaŭa Kvartalo Kukurbejo	42
Profunda Amikeco	44
Anestezado en Cerba Operacio per Akupunkturo	46
Tajvan Deantikve Estas Sankta Teritorio de Ĉinio	50
Certe Bankrotos la Intrigo de la Usonaj kaj Japanaj Reakciuloj	52

En la Foiro de Ĉinaj Eksportaj Varoj

La Aŭtuna Foiro de Ĉinaj Eksportaj Varoj en 1971 okazis en kantono de la 15-a de oktobro ĝis la 15-a de novembro. La ekspozitaĵoj de tiu ĉi foiro spegulis la novajn venkojn, kiujn la ĉina popolo akiris en politiko, ideologio, ekonomio, kulturo, edukado, sciencoj, tekniko kaj higienaj laboroj, serioze praktikante la grandan orientilon "teni la revolucion, stimuli la produkton, aliajn laborojn kaj preparon kontraŭ milito" sub la direktado de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ Zedong.

La unuan printempan foiron en 1957 partoprenis amikoj el pli ol 20 landoj kaj regionoj, dum ĉifoje la foiron vizitis laŭ invito amikoj el proksimume cent landoj kaj regionoj, ilia nombro kreskis pli ol dekoble kaj multe pli grandiĝis la kvanto de importitaj kaj eksportitaj varoj. La diverslandaj amikoj farintaj amikan viziton al nia lando disvolvis la komercan rilaton inter Ĉinio kaj iliaj landoj surbaze de la principo "egalrajteco kaj reciproka utilo, interŝanĝo de bezonaĵoj". La amikaj kontaktoj pliiĝis la amikecon inter la popoloj de nia lando kaj la aliaj landoj.

Vang Bo, flegistino de la Unua Hospitalo Dependanta de la Gilin-a Medicina Kolegio, trovis novajn terapiojn por kuraci senregpovon de urino per akupunkturo. La foto montras ke resanigita laborista filino Liu Huijing, kiu suferis de senregpovo de urino dum 14 jaroj, intervidiĝas kun vjetnamaj gekamaradoj.








En la foiro, albanaj kamaradoj rigardas modelon de la Kloŝ-tipa Aŭtomata Nafto-mezurilo projektita kaj farita mem de laboristoj de Daking-olekampo.




Nove produktita preciza ilmaŝino montrita en la ekspoziciejo de maŝinoj spegulas la novan disvolvigon de la maŝinfabrika industrio de Ĉinio.






La agrikultura kaj flankokupaj produktoj de la antaŭurboj de Ŝanhajo akiris ampleksan riĉan rikolton en 9 sinkvaj jaroj. La foto montras, ke Hongkong-aj kaj Aŭmen-aj samlandanoj rigardas modelon de la nova fizionomio de la antaŭurboj de Ŝanhajo.

Zambijaj amikoj interesiĝas pri la mantraktoro Dongfeng Nro 12 kaj petas de laboranto de la foiro informon pri ĝia laborkapablo.



Nova produktaĵo unuafoje montrita en la foiro —
hidrostatika solkristala forno.





Ujgura komunumanino de Hingiang montras hamian retmelonon al japana amikino.

Fremdlandaj geamikoj rigardas diversajn vestojn montritajn en la foiro.



Prezidanto Maŭ Intervidiĝis kun la Partia kaj Registara Delegacio de Vjetnamio Estrata de Ĉefministro Pham Van Dong

Prezidanto Maŭ varme manpremas kun Ĉefministro Pham Van Dong.



La 22-an de novembro, 1971, kamarado Maŭ Zedong, la granda gvidanto de nia popolo kaj la prezidanto de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, intervidiĝis kun kamarado Pham Van Dong, membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Labora Partio de Vjetnamio kaj ĉefministro de la registaro de la Vjetnama Demokratia Respubliko, kaj la membroj de la Delegacio de la Labora Partio de Vjetnamio kaj la Registaro de la Vjetnama Demokratia Respubliko, kiun li gvidis.

La intervido okazis en ekstreme intima kaj amika atmosfero. Kiam la vjetnamaj kunbatalantoj venis en la intervidan halon, Prezidanto Maŭ iris renkonte al ili kaj varme manpremis kun Ĉefministro Pham Van Dong kaj Vicĉefministro Nguyen Duy Trinh, kaj esprimis varman bonvenigon al la amikaj delegitoj de la frata vjetnama popolo venintaj de la fronto de kontraŭsona batalo. Tiam la ĉeestantaj ĉinaj kaj vjetnamaj gekamaradoj ĝoje manklakadis. Prezidanto Maŭ intime svingis sian manon salute al la vjetnamaj kamaradoj kaj sin fotigis kune kun ili.

Poste, Prezidanto Maŭ faris intiman kaj amikan interparolon kun kamaradoj Pham Van Dong, Nguyen Duy Trinh, Tran Quy Hai, Ly Ban, Ngo Thuyen kaj Nguyen Co

Prezidanto Maŭ intervidiĝas kun la partia kaj registara delegacio de Vjetnamio estrata de Ĉefministro Pham Van Dong.



Thach, kaj Nguyen Van Quang, ambasadoro de la Respubliko de Suda Vjetnamio al Ĉinio. Dum la interparolado, ĉeestis de la ĉina flanko kamaradoj Ĝoŭ Enlaj, Je Gianjing, Li Hiannian, Geng Biaŭ, Han Nianlong kaj Li Kiang. Ĝin partoprenis laborantoj Nguyen Lung kaj Ho Han de la vjetnama flanko kaj Liang Feng, Lian Ĝengbaŭ kaj Hu Kianven de la ĉina flanko.

Ĉeestis krome ankaŭ la vjetnamaj kamaradoj akompanantoj de la delegacio Luu Van Loi, Hoang Bao Son, Ngo Dien, Nguyen Ngoc Uyen, Nguyen Van Ly, Hoang Quoc Dung, Nguyen The Khanh, Dinh Van Tram, Hoang Nghia Khanh, Tran Hoan, Phung Cong Duc, Tran Kim An, Tran Duy Khang, Pham Cong Bai, Chu Van Lap, Ha Van Le, Nguyen Huu Nghia, Bui Van Tien, Dinh Thi Khang, Hoang Nhu Ly, Dang Duc Khoi, Ha Huy Tam, Le Tu Vinh, Dang Phuc Khanh, Ma Van Cuong, Nguyen Quy Khoi, Nguyen Thanh Tinh kaj Pham Van A; la laborantoj de la speciala aeroplano de la delegacio; kaj diplomaciaj oficistoj de la ambasadorejo de Vjetnamio en Pekino Nguyen Tien, Tan Phong kaj Phan Nhu Sam.

Inter la ĉinaj gekamaradoj ĉeestantaj estis ankaŭ Han Zonggeng, Vang Joŭping, Juan Huabing, Han Hju, Lu Vejgaŭ kaj Ĝang Jing.




Inter Vjetnamio kaj Ĉinio ja Profundas la Amikeco: Samideaneco plus Frateco

DE la 20-a ĝis la 27-a de novembro, 1971, la partia kaj registara delegacio de Vjetnamio estrata de kamarado Pham Van Dong, membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Labora Partio de Vjetnamio kaj ĉefministro

de la registaro de la Vjetnama Demokratia Respubliko, vizitis Ĉinion.

Je la 14-a horo de la 20-a de novembro, arĝenta aviadilo surteriĝis kun la gloraj senditoj de la vjetnama popolo. La tuta Ĉefurba Aerodromo en



La 23-an de novembro, Samdek Norodom Sihanuk, la kamboĝa ŝtatestro kaj prezidanto de la Nacia Unueca Fronto de Kamboĝo intime intervidiĝis kun Pham Van Dong, membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Labora Partio de Vjetnamio kaj ĉefministro de la registaro de la Vjetnama Demokratia Respubliko kaj interparolis kun li.

Pekino ekbolis de ĝojo. Kiam Ĉefministro Pham Van Dong, Vicĉefministro Nguyen Duy Trinh kaj aliaj descendis de la aviadilo, partiaj kaj ŝtataj gvidantoj de nia lando kamaradoj Ĝou Enlaj, Je Gianjing, Ĝang Ĉunkiaŭ, Jaŭ Venjuan kaj Li Hiannian iris renkonte al ili kaj varme bonvenigis la vjetnamajn kunbatalantojn per intima manpremo kaj brakumo.

“Inter Vjetnamio kaj Ĉinio ja profundas la amikeco: samideaneco plus frateco”. Kiel emociiĝis la popolo de Pekino, kiam la vjetnamaj kunbatalantoj venis de la kontraŭsona fronto al la vasta postfronto! Ĝi aranĝis solenan bonvenigan ceremonion por danki la vjetnamajn kunbatalantojn, kiuj alportis ĝojigan novaĵon pri venkoj en la kontraŭsona naciŝa milito kaj profundan amikecon de la vjetnama popolo al la ĉina popolo.

En Pekino regis ĝoja festa atmosfero. El la densaj vicoj de bonvenigantoj pli ol dek kilometrojn longaj





ŝpruciĝis koraj vortoj alte laŭdantaj la bravan kaj obstinan batalŝpiriton de la heroo vjetnama popolo manifestitan en la kontraŭsona naciŝa milito. Inter la bonvenigantoj, laboristoj de Hin-hua-presejo parolis pri la grandaj venkoj akiritaj de la vjetnama popolo sub la gvido de la Labora Partio de Vjetnamio en la kontraŭsona naciŝa milito. Ju pli ili parolis, des pli forte ili emociiĝis. Ili diris: “La heroo vjetnama popolo donis al la popolo de la tuta mondo brilan ekzemplon, ke malgranda lando povas venki la grandan kaj malforta lando povas venki la fortan. Ni nepre bone lernos de la vjetnama popolo.” Laboristoj de la aŭtofabriko Dongfanghong rememoris la viziton al la fabriko, faritan de la kamaradoj de la Vjetnama Esplora Delegacio de Aŭtoindustrio antaŭ unu monato. Ili diris: Ni aŭtofaristoj firme sekvas la instruon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, energie tenos la revolucion kaj stimulos la produktadon por fabriki multajn kaj bonajn aŭtojn por subteni la kontraŭsonan naciŝan militon de la vjetnama popolo ĝis la fina venko.

Dum sia restado en Ĉinio, la partia kaj registara delegacio de Vjetnamio vizitis Pekinon, Ŝanhajon kaj Kantonon kaj trovis varman akcepton de laboristoj, komunumanoj, gemilicanoj kaj komandantoj kaj batalantoj de la teraj, maraj kaj aeraj trupoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo. Kun profunda klasa sentimento de la proletaro al la vjetnama popolo batalanta sur la kontraŭsona fronto, ili firme esprimis, ke Ĉinio kaj Vjetnamio estas intimaj najbaraj landoj kun intertuŝigantaj montoj kaj akvoj, iliaj popoloj estas kunbatalantoj subtenantaj unu la alian. La ĉina popolo ĉiam kaj en ĉia situacio unuiĝos, batalos kaj venkos kune kun la popoloj de Vjetnamio, Laoso kaj Kamboĝo same kiel antaŭe.

La komuna komuniko publikigita je la 25-a de novembro post la interparoloj inter partiaj kaj ŝtataj gvidantoj de Ĉinio kaj Vjetnamio refoje montris vivece la intiman amikecon kaj batalan unuiĝon inter la partioj kaj popoloj de ambaŭ landoj surbaze de Marksismo-Leninismo kaj proletara internaciismo. Tiaj amikeco kaj batala unuiĝo estas detruiblaj de neniam forto.

Vivu eterne la amikeco kaj batala unuiĝo inter la popoloj de Ĉinio kaj Vjetnamio!





Popolamasoj de nia ĉef-urbo solene kunvenas por varme bonvenigi la partian kaj registaran delegacion de Vjetnamio. Supre: la podio. Sube: la kunvenejo.



La 21-an de novembro, gvidantaj kamaradoj de la partio kaj registaro de Ĉinio faris interparoladon kun gvidantaj kamaradoj de la partio kaj registaro de Vjetnamio en tre intima kaj amika atmosfero.

La partia kaj registara delegacio de Vjetnamio estrata de Ĉefministro Pham Van Dong ricevis solenan kaj varman bonvenigon de la revoluciaj amasoj de nia ĉefurbo.



La Delegacio de la Ĉina Popola Respubliko al la 26-a Sesio de la Ĝenerala Asembleo de UN Ricevis Varman Bonvenigon

EN la 15-a de novembro, la Delegacio de la Ĉina Popola Respubliko kun Kiaŭ Guanhua kiel la estro kaj Huang Hua kiel la vicedestro ĉeestis la plenan kunvenon de la 26-a Sesio de la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj kaj ricevis ekstreme varman bonvenigon. Estro de la delegacio Kiaŭ Guanhua faris gravan paroladon en la kunveno. (Legu ĝin sur p. 3) Lia parolado vekis varman aplaŭdon en la kunvena halo.

La plena kunveno komenciĝis je 30 minutoj post la 10-a horo antaŭtagmeze laŭ la novjorka tempo. Kiam estro de la delegacio Kiaŭ Guanhua, vicedestro Huang Hua kaj ĝiaj reprezentantoj Fu Haŭ, Hjong Hianghuj kaj Ĉen Ĉu eniris en la halon kaj prenis la sidlokojn de Ĉinio, la reprezentantoj de multaj amikaj landoj tuj venis al ili por esprimi sian gratulon kaj bonvenigon. Malik, prezidanto de la Sesio de la Ĝenerala Asembleo, la unua faris bonvenigan paroladon. Li diris: “Kiel prezidanto de la sesio, mi tre ĝoje bonvenigas la Delegacion de la Ĉina Popola Respubliko.” Li emfaze montris, ke la partopreno de la Ĉina Popola Respubliko en la laboro de la

organizo de la Unuiĝintaj Nacioj “estas momento kun historia signifo”.

Post Malik, reprezentantoj de multaj landoj sinsekve ascendis la podion kaj faris bonvenigan parolon al la delegacio de Ĉinio. Dum la iro de iliaj paroladoj, senĉese plimultiĝis reprezentantoj kiuj esprimis la deziron fari parolon. Fine reprezentantoj de 57 landoj faris bonvenigajn parolojn en la kunveno, inter kiuj estis laŭ la vico de iliaj paroloj reprezentantoj de Kuvajto (en la nomo de la aziaj landoj), Ĉeĥoslovakio (en la nomo de la orienteŭropaj landoj), Nederlando (en la nomo de la okcidenteŭropaj kaj aliaj landoj), Danlando (en la nomo de la kvin nordeŭropaj landoj), Maroko (en la nomo de la arabaj landoj), Usono (kiel mastro-lando), Albanio, Francio, Ĉilio, Burundio, Kostariko (en la nomo de la latinamerikaj landoj), Zambio, Kubo, Supra Volto (en la nomo de la afrikaj landoj), Maŭritanio, Pakistano, Rumanio, la Unuigita Respubliko de Tanzanio, Italio, Ganao, Malajzio (en la nomo de Indonezio, la Filipinoj, Singaporo kaj Tajlando), Nepalo, Aŭstrio, Jugoslavio, Alĝerio, la Ekvatora Gvineo, Peruo, Sudano, Malio, la Popola



La Delegacio de la Ĉina Popola Respubliko en la plena kunveno de la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj.

Demokratia Respubliko de Jemeno, Ugando, Birmo, Gvineo, la Popola Respubliko de Kongolando, Japanio, Afganio, Cejlono, Meksikio, Irako, Kameruno, la Araba Respubliko de Sirio, Etiopio, Turkio, Sovetunio, Irano, la Araba Jemena Respubliko, Hungario, Cipro, Pollando, Mongolio, Hindio, Libano, Togolando, Somalio, Tunizio, Niĝerio kaj Bulgario.

Post la bonvenigaj paroladoj de diverslandaj reprezentantoj, estro de la delegacio Kiaŭ Guanhua ascendis la podion de la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj en longtempa manklakado kaj huraado kaj faris gravan paroladon. En sia parolado li antaŭ ĉio esprimis dankon al prezidanto de la Ĝenerala Asembleo kaj reprezentantoj de diversaj landoj pro ilia bonvenigo. En la nomo de la ĉina registaro kaj la ĉina popolo, li esprimis koran dankon al Albanio, Alĝerio kaj aliaj 21 rezolucio-proponantaj landoj, kiuj faris senlacajn efikajn klopodojn por restarigi la leĝajn rajtojn de nia lando en la Unuiĝin-

taj Nacioj persistante en principo kaj subtenante justecon, al multaj amikaj landoj, kiuj subtenis tiun projekton kaj al iuj aliaj landoj, kiuj en tiu aŭ alia formo esprimis simpatian al nia lando. Li ankaŭ ĉiuflanke eksplikis la principan starpunkton de nia registaro rilate al serio da gravaj internaciaj problemoj. La parolado de estro de la delegacio Kiaŭ Guanhua estis varme bonvenigata de plejparto de la reprezentantoj. Dum lia parolado, regis kvieto en la halo kaj reprezentantoj absorbite aŭskultis lin. Kiam finiĝis lia parolado, refoje eksplodis longtempa varma manklakado en la halo, kaj reprezentantoj de multaj amikaj landoj ankoraŭfoje iris al la sidlokoj por la delegacio de Ĉinio kaj intime manpremis kun estro de la delegacio Kiaŭ Guanhua, vicestro Huang Hua kaj ĝiaj aliaj reprezentantoj, esprimante varman gratulon.

De la komenco ĝis la fino, la tutan kunvenon regis atmosfero de amikeco al Ĉinio.

Parolado de Kiaŭ Guanhua, Estro de la Delegacio de la Ĉina Popola Respubliko, en la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj

Sinjoro Prezidanto,
Sinjoroj Rezentantoj,

Antaŭ ĉio, permesu al mi danki, en la nomo de la Delegacio de la Ĉina Popola Respubliko, sinjoron prezidanton kaj la reprezentantojn de multaj landoj pro ilia bonvenigo al ni.


Multaj amikoj faris tre entuziasmajn paroladojn, esprimante la konfidon, kuraĝigon kaj fratan sentimenton al la ĉina popolo. Tio profunde kortuŝis nin. Ni transdonos ĉion ĉi tion al la tuta ĉina popolo.

Estas plezure por la Delegacio de la Ĉina Popola Respubliko hodiaŭ ĉeesti ĉi tie la 26-an Sesion de la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj kaj partopreni kune kun vi en la laboro de la Unuiĝintaj Nacioj.

Ĉiuj scias, ke Ĉinio estas unu el la fondintaj membroj de la Unuiĝintaj Nacioj. En 1949, la ĉina popolo renversis la reaktivan regadon de Ĉiang Kajŝek-kliko kaj fondis la Ĉinan Popolan Respublikon. De

tiam la leĝaj rajtoj de Ĉinio en la Unuiĝintaj Nacioj kompreneble devis aparteni al la Ĉina Popola Respubliko. Nur pro la obstrukco de la usona registaro, la Ĉina Popola Respubliko estis senigita je la leĝaj rajtoj en la Unuiĝintaj Nacioj dum longa tempo, kaj Ĉiang Kajŝek-kliko, antaŭlonge forĵetita de la ĉina popolo, povis uzurpi la leĝan sidlokon de Ĉinio en la Unuiĝintaj Nacioj. Tio estas kruda interveno en internajn aferojn de Ĉinio kaj arbitra tretado sur la Ĉarton de la Unuiĝintaj Nacioj. Nun tia maljusta situacio finfine ŝanĝiĝis.

En la 25-a de oktobro, 1971, la iranta sesio de la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj adoptis per superega plimulto da voĉoj la rezolucion pri restarigo de ĉiuj leĝaj rajtoj de la Ĉina Popola Respubliko en la Unuiĝintaj Nacioj kaj tuja forpelo de la reprezentantoj de Ĉiang Kajŝek-kliko el la Unuiĝintaj Nacioj kaj ĉiuj organizoj subordigitaj al ĝi. Tio estas bankroto de la politikoj de malamikeco, izolado kaj blokado kontraŭ la ĉina popolo. Tio estas malvenko de la plano de la usona




Kiaŭ Guanhua, estro de la ĉina delegacio, faras gravan paroladon en la plena kunveno de la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj.

registaro en koluzio kun la japana Sato-registaro por krei “du Ĉiniojn” en la Unuiĝintaj Nacioj. Tio estas venko de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ Zedong en eksteraj aferoj. Tio estas komuna venko de la popoloj tra la tuta mondo.

Persistante en principo kaj subtenante justecon, la 23 rezolucio-proponantaj landoj Albanio, Alĝerio, Birmo, Cejlono, Kubo, la Ekvatora Gvineo, Gvineo, Irako, Malio, Maŭritanio, Nepalo, Pakistano, la Popola Demokratia Respubliko de Jemeno, la Popola Respubliko de Kongolando, Rumanio, Siera-Leono, Somalio, Sudano, Sirio, la Unuigita Respubliko de Tanzanio, la Araba Jemena Respubliko, Jugoslavio kaj Zambio faris senlacajn kaj efikajn penojn por la restarigo de la leĝaj rajtoj de nia lando en la Unuiĝintaj Nacioj, ankaŭ multaj amikaj landoj subtenantaj tiun rezolucion faris kontribuojn por tio. Krome iuj aliaj landoj esprimis simpatian al nia lando en diversaj manieroj. En la nomo de la ĉina registaro kaj la ĉina popolo, mi es-

primas koran dankon al la registaroj kaj popoloj de ĉiuj ĉi tiuj landoj.

26 jaroj jam forpasis de post la fondiĝo de la Unuiĝintaj Nacioj. En la homa historio 26 jaroj estas nur mallonga momento, sed dum tiu periodo profundaj ŝanĝiĝoj okazis en la monda situacio. En la komenca periodo de la fondiĝo de la Unuiĝintaj Nacioj estis nur 51 membroj-landoj, kaj nun la nombro de la membroj kreskis ĝis 131. La plejmulto el la poste aliĝintaj okdek membroj estas landoj, kiuj akiris sendependecon post la Dua Mondmilito. Dum la pasintaj pli ol dudek jaroj, la popoloj de la aziaj, afrikaj kaj latinamerikaj landoj faris obstinajn kaj neflekseblajn batalojn por gajni kaj defendi nacian sendependecon kaj oponi kontraŭ eksteraj agreso kaj subpremado. Ankaŭ en Eŭropo, Norda Ameriko kaj Oceanio leviĝas amasaj movadoj kaj sociaj fluoj postulantaj ŝanĝon de la nuna stato. Pli kaj pli multaj mezgrandaj kaj malgrandaj landoj unuiĝas por oponi kontraŭ la hegemoniismo kaj potenco-



politiko de unu aŭ du superpotencoj kaj gajni la rajton por solvi siajn proprajn aferojn kiel sendependaj kaj suverenaj ŝtatoj kaj la egalan pozicion en internaciaj rilatoj. Landoj volas sendependiĝon, nacioj volas liberiĝon kaj la popoloj volas revolucion, tio jam fariĝis nekontraŭstarebla historia fluo.

Homa socio ĉiam senĉese progresas. Kaj tia progreso ĉiam estis atingita tra sennombraj revolucioj kaj transformoj. Ni prenu Usonon kiel ekzemplon, kie sidas la Ĝenerala Stabejo de la Unuiĝintaj Nacioj. Ĝuste dank' al la venko de la revolucia milito de 1776 gvidata de Vaŝington, la usona popolo akiris sendependecon. Kaj ĝuste dank' al la granda revolucio de 1789, la franca popolo sin liberigis el la kateno de feŭdismo. Post kiam la homaro eniris en la dudekan jarcenton, la venko de la Oktobra Socialisma Revolucio de 1917 en Rusio gvidata de la granda Lenin malfermis por la subpremataj nacioj kaj subpremataj popoloj de la tuta mondo larĝan vojon al

libero kaj emancipiĝo. La historia disvolviĝo kaj socia progreso ĝojigas kaj inspiras la popolojn de la mondo kaj ĵetas en panikon plenmanon da dekadencaj reakciaj fortoj kiuj plenforte faras antaŭmortan baraktadon. Ili agresas aliajn landojn per armitaj fortoj, renversas la leĝajn registarojn de aliaj landoj, intervenas en la internajn aferojn de aliaj landoj, superregas aliajn landojn en politiko, militaj aferoj kaj ekonomio kaj laŭplaĉe tiranas aliajn landojn. Post la Dua Mondmilito, nova monda milito ne okazis, tamen neniam ĉesis lokaj militoj. Nun la danĝero de nova mondmilito ankoraŭ ekzistas, sed hodiaŭ la ĉefa tendenco de la mondo estas revolucio. Kvankam estas zigzagoj kaj returniĝoj en la bataloj de la popoloj, tamen la kontraŭfluo kontraŭ la popolo kaj kontraŭ progreso, analizite ĝis la fino, ne povos obstrukci la ĉefan fluon de kontinua disvolviĝo de la homa socio. La mondo certe iros al progreso kaj lumo, kaj definitive ne al reakcio kaj mallumo.

Sinjoro Prezidanto kaj Sinjoroj Rezentantoj,

La ĉina popolo multe suferis de imperiisma subpremado. Dum la pasintaj pli ol cent jaroj, imperiismo plurfoje faris agreŝajn militojn kontraŭ Ĉinio kaj devigis ĝin subskribi multajn neegalrajtajn traktatojn. Ili dividis Ĉinion en siajn influo-sferojn, prirabis ĉinajn riĉfontojn kaj ekspluatis la ĉinan popolon. La grado de malriĉeco kaj libermanko suferataj de la ĉina popolo en la pasinteco estas konata de ĉiuj. Por gajni nacian sendependecon, liberecon kaj emancipiĝon, la ĉina popolo, unuj sekvante aliajn, kun refleksiĝo, faris longtempajn heroajn batalojn kontraŭ imperiismo kaj ĝiaj lakeoj kaj finfine gajnis la venkon de la revolucio sub la gvido de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ Zedong kaj la Komunista Partio de Ĉinio. Post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, la ĉina popolo, defiante la firmajn blokadojn de imperiismo, kontraŭstarante la gigantan pre-

mon de ekstere, sin tenante memdecide kaj sinapogante sur propraj fortoj, konstruis nian landon en socialisman landon kun unuapaŝa prospero. Faktoj pruvis, ke ni, la ĉina nacio, tute kapablas memstari inter la nacioj de la mondo.

Tajvan estas unu el la provincoj de Ĉinio kaj la 14 milionoj da popolanoj, kiuj vivas en Tajvan, estas niaj sangaj samlandanoj. Laŭ la Kaira Deklaracio kaj Potsdama Proklamo, post la Dua Mondmilito, Tajvan jam estis redonita al la patrolando kaj niaj samlandanoj en Tajvan jam revenis en la sinon de la patrolando. En 1949 kaj 1950, la usona registaro oficiale konfirmis tiun fakton je pli ol unu okazoj, kaj publike deklaris ke la problemo pri Tajvan estas interna afero de Ĉinio kaj ke la usona registaro ne havas intencon por interveni en tion. Nur pro la eksplodo de la Korea Milito, la usona registaro perfidis sian promeson kaj ekspedis armitajn fortojn invadi kaj okupi ĉinan Tajvan kaj la Tajvan-markolon kaj nun ili ankoraŭ restas tie. La absurdaĵo ke “la pozicio de Tajvan restas nedifinita” nun dissemata en iuj lokoj estas konspiro por fabriki “sendependan Tajvan” kaj daŭrigo por krei “unu Ĉinion kaj unu Tajvan”, fakte krei “du Ĉiniojn”. En la nomo de la registaro de la Ĉina Popola Respubliko, mi ankoraŭfoje deklaris ĉi tie, ke Tajvan estas neapartigebla parto de la ĉina teritorio, kaj per la armitaj invado kaj okupo de ĉina Tajvan kaj Tajvan-markolo Usono povas neniom ŝanĝi la suverenecon de la Ĉina Popola Respubliko super Tajvan; ke ĉiuj armitaj fortoj de Usono nepre devas retiriĝi el Tajvan kaj Tajvan-markolo; kaj ke ni firme oponas kontraŭ ĉia ajn intrigo apartigi Tajvan de la patrolando. La ĉina popolo nepre liberigos Tajvan, kaj nenia forto povas bari nin en tio.

Sinjoro Prezidanto kaj Sinjoroj Rezentantoj,

La ĉina popolo, kiu suferis de la agreso kaj subpremado de imperiismo dum longa

tempo, ĉiam oponas kontraŭ la imperiismaj politikoj de agreso kaj milito kaj subtenas ĉiujn subprematajn popolojn kaj subprematajn naciojn en iliaj justaj bataloj por gajni liberecon kaj emancipiĝon, oponi kontraŭ deekstera interveno kaj fariĝi mastroj de sia propra sorto. Tiu starpunkto de la ĉina registaro kaj ĉina popolo estas konforma al la fundamentaj interesoj de la popoloj de la mondo kaj ankaŭ akorda kun la spirito de la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj.

La usona registaro agresas Vjetnamion, Kamboĝon kaj Laoson per armitaj fortoj, atencas la teritorian integrecon kaj suverenecon de tiuj tri landoj. Tio intensigas la streĉitan situacion en la Malproksima Oriento kaj renkontis fortan oponon de la popoloj de la mondo, inkluzive de la usona popolo. La ĉina registaro kaj la ĉina popolo firme subtenas la popolojn de la tri landoj de Hindoĉinio en ilia nacisava milito kontraŭ la usona agreso kaj firme subtenas la Komunan Deklaracion de la Plej Alta Konferenco de la Hindoĉiniaj Popoloj kaj la sep-punktan pacan proponon elmetitan de la Provizora Revolucia Registaro de la Respubliko de Suda Vjetnamio. La ŝlosilo por mildigi la streĉitan situacion en la Malproksima Oriento kuŝas en tio, ke la usona registaro devas senprokraste, senkondiĉe kaj komplete retiri ĉiujn armitajn fortojn de Usono kaj ĝiaj vasaloj el la tri landoj de Hindoĉinio, por ke la tri hindoĉiniaj popoloj povu sendepende solvi siajn proprajn problemojn sen deekstera interveno.

Hodiaŭ, Koreio ankoraŭ restas dividita. La Ĉinaj Popolaj Volontuloj antaŭlonge jam retiriĝis el Koreio, sed nun la usonaj trupoj ankoraŭ restas en suda Koreio. Paca unuigo de la patrolando estas la komuna deziro de la tuta korea popolo. La ĉina registaro kaj la ĉina popolo firme subtenas la ok-punktan programon por paca unuigo de la patrolando elmetitan de la Demokratia Popola Respubliko de Koreio en aprilo ĉijare kaj firme subtenas ĝian justan postulon nuligi ĉiujn kontraŭleĝajn resoluciojn

adoptitajn de la Unuiĝintaj Nacioj pri la korea problemo kaj malorganizi la “Komisionon de la Unuiĝintaj Nacioj por la Unuigo kaj Res’arigo de Koreio”.

La esenco de la mez-orienta problemo estas agreso kontraŭ la palestina popolo kaj aliaj arabaj popoloj fare de la izraela cionismo kun la subteno kaj instigo de la superpotencoj. La ĉina registaro kaj la ĉina popolo firme subtenas la palestinan popolon kaj aliajn arabajn popolojn en ilia justa batalo kontraŭ agreso kaj kredas, ke la heroaj palestina popolo kaj aliaj arabaj popoloj, persistante en batalo kaj unuiĝo, certe povos reakiri la perditajn teritoriojn de la arabaj landoj kaj restarigi al la palestina popolo ĝiajn naciajn rajtojn. La ĉina registaro opinias, ke ĉiuj landoj kaj popoloj tra la mondo, kiuj amas pacon kaj subtenas justecon, havas la devon subteni kaj helpi la batalon de la palestina popolo kaj aliaj arabaj popoloj; kaj neniu havas la rajton fari post ilia dorso politikan negocon je la kosto de ilia rajto por ekzisto kaj iliaj naciaj interesoj.

La kontinua ekzisto de koloniismo en diversaj formoj estas provoko kontraŭ la popoloj de la mondo. La ĉina registaro kaj la ĉina popolo firme subtenas la popolojn de Mozambiko, Angolo, Gvineo (Bissau) en ilia batalo por nacia liberiĝo; firme subtenas la popolojn de Azanio, Zimbabveo kaj Namibio en ilia batalo kontraŭ la blankula koloniisma regado kaj rasa diskriminacio. Ilia batalo estas justa kaj justa afero certe venkos.

Sen ekonomia sendependeco, la sendependeco de lando estas nekompleta. La ekonomia postiĝinteco de la aziaj, afrikaj kaj latinamerikaj landoj estas rezulto de la prirabo de imperiismo. Opono kontraŭ ekonomia prirabo kaj protekto de la landaj riĉfontoj estas neseniĝeblaj suverenaj rajtoj de sendependa lando. Ĉinio estas lando ankoraŭ postiĝinta ekonomie, kaj ankaŭ

lando disvolviĝanta. Ĉinio, same kiel la plejmulto de la aziaj, afrikaj kaj latinamerikaj landoj, apartenas al la tria mondo. La ĉina registaro kaj la ĉina popolo firme subtenas la batalojn iniciatitajn de la latinamerikaj landoj kaj popoloj por defendi siajn rajtojn super la teritoria maro de 200 marmejloj kaj protekti la riĉfontojn de siaj landoj, kaj firme subtenas la batalojn disvolvitajn de la petrol-eksportantaj landoj en Azio, Afriko kaj Latinameriko kaj aliaj regionaj kaj specialaj organizoj por defendi la naciajn rajtojn kaj interesojn kaj oponi kontraŭ ekonomia prirabo.

Ni ĉiam pledas por tio, ke ĉiuj landoj, grandaj aŭ malgrandaj, devas esti egalrajtaj kaj la kvin principoj de paca kunekzisto devas servi kiel la principoj gvidantaj la rilatojn inter landoj. La popoloj de ĉiuj landoj havas la rajton elekti la socian sistemon de sia propra lando laŭ sia propra volo kaj protekti la sendependecon, suverenecon kaj teritorian integrecon de sia propra lando. Neniu lando havas la rajton por fari agreson, renverson, superregon, intervenon kaj tiranadon al alia lando. Ni oponas kontraŭ la imperiisma kaj koloniisma teorio pri supereco de grandaj landoj super malgrandaj landoj kaj dependeco de malgrandaj landoj al grandaj landoj. Ni oponas kontraŭ la potenco-politiko kaj hegemoniismo ke grandaj landoj tiranas malgrandajn landojn aŭ fortaj landoj tiranas malfortajn landojn. Ni pledas por tio, ke la aferoj de ĉiu ajn lando devas esti deciditaj de ĝia propra popolo; la aferoj de la mondo devas esti deciditaj de ĉiuj landoj de la mondo; kaj la aferoj de la Unuiĝintaj Nacioj devas esti deciditaj de ĉiuj ĝiaj membroj-landoj, kaj estas malpermesate al la superpotencoj manipuli kaj monopoligi ilin. La superpotencoj deziras superi aliajn kaj tirane rajdi sur la nuko de aliaj. Ĉinio neniam, nek nun, nek en la estonteco, elpaŝos kiel superpotenco agre-santa, renversanta, superreganta, intervenanta kaj tirananta aliajn.

La unu aŭ du superpotencoj intensigas siajn armad-ekspansion kaj militpreparon kaj energie disvolvas nukleajn armilojn, kio serioze minacas internacian pacon. Estas kompreneble ke la mondaj popoloj soifas al malarmado, precipe nuklea malarmado. Justa estas ilia postulo pri malorganizo de militaj blokoj, retiro de fremdlandaj trupoj kaj likvido de fremdlandaj militaj bazoj. Sed, la superpotencoj ĉiutage parolas surcipe pri malarmado, fakte faras armad-ekspansion ĉiutage. La tiel nomata nuklea malarmado de ili entreprenata celas tute la monopolon de nukleaj armiloj por fari nuklean minacon kaj nuklean ĉantaĝon. Ĉinio neniam partoprenos en la tiel nomata intertraktado de nukleaj potencoj pri nuklea malarmado post la dorso de la sen-nukleaj landoj. La nukleaj armiloj de Ĉinio ankoraŭ restas en eksperimenta stadio. Ĉinio disvolvas nukleajn armilojn nur por defendo kaj por rompo de ilia nuklea monopolon kaj finfine elimino de nukleaj armiloj kaj nuklea milito. La ĉina registaro ĉiam pledas por ĉiufanka malpermeso kaj kompleta detruo de nukleaj armiloj kaj proponas kunvoki konferencon de ĉefoj de ĉiuj landoj de la mondo por pridiskuti tiun problemon kaj, kiel la unua paŝo, atingi interkonsenton pri neuzo de nukleaj armiloj. La ĉina registaro en multaj okazoj deklaris, kaj nun, en la nomo de la ĉina registaro, mi refoje solene deklaras, ke neniam kaj sub neniamaj cirkonstancoj Ĉinio la unua uzos nukleajn armilojn. Se Usono kaj Sovetunio vere volas malarmadon, do ili devas preni sur sin la devon ne uzi la unuajn nukleajn armilojn. Tio ja estas ne malfacile farebla. Ĉu tio estos farita aŭ ne, kio estas severa provo, ĉu ili vere havas la deziron de malarmado.

Ni ĉiam opinias, ke la justaj bataloj de la popoloj de ĉiuj landoj subtenas unuj aliajn. Ĉinio ĉiam ricevas simpatian kaj subtenon de la diverslandaj popoloj en siaj socialisma revolucio kaj socialisma

konstruado. Subteni la justajn batalojn de diverslandaj popoloj estas nia plenumenda devo. Por subteni diverslandajn popolojn en iliaj bataloj kaj helpi ilin disvolvi sendepende kaj memstare sian nacian ekonomion, ni donis helpon al iuj amikaj landoj. En dono de helpo ni ĉiam strikte respektas la suverenecon de la helpataj landoj, aldonas nenian kondiĉon kaj postulas nenian privilegion. Ni provizas senpagan militan helpon al tiuj landoj kaj popoloj, kiuj kondukas kontraŭagresajn batalojn. Ni neniam fariĝos komercistoj de municio. Ni firme oponas, ke iuj landoj intencas superregi kaj prirabi la helpatajn landojn, per manieroj de "helpo". Sed, ĉar la ĉina ekonomio ankoraŭ estas relative postgiganta, la materia helpo de ni provizita estas limigita kaj nia subteno estas ĉefe politika kaj morala. Ĉinio havas 700-milionan loĝantaron kaj devas fari relative grandan kontribuon al la progreso de la homaro. Ni esperas paŝo-post-paŝe ŝanĝi la staton, ke nia forto ne povas kontentigi nian deziron.

Sinjoro Prezidanto kaj Sinjoroj Rerezentantoj,

Laŭ la celoj de la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj, la Unuiĝintaj Nacioj devas ludi sian plenumendan rolon en defendo de internacia paco, en opono kontraŭ agreso kaj interveno kaj en disvolvo de rilatoj de amikeco kaj kunlaboro inter landoj. Sed, en la pasinta longa periodo, utiligante la Unuiĝintajn Naciojn, la unu aŭ du superpotencoj faris multajn aferojn kontraŭ la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj kaj la volo de la popoloj de diversaj landoj. Tia situacio ne devas esti daŭrigata. Ni esperas, ke la spirito de la Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj estos efektive kaj vere sekvata. Ni staros kune kun ĉiuj landoj kaj popoloj, kiuj amas pacon kaj subtenas justecon, kaj penas kune kun ili por defendi la nacian sendependecon kaj ŝtatan suverenecon de diversaj landoj, kaj por la afero de defendo de internacia paco kaj akcelo de homara progreso.

Traktoristino (Ŝtona Skulptaĵo)



